

RET MARUT

RAKONTOJ

krome eseoj & aliaj tekstoj



Fruaj verkoj kaj verketoj de B.Traven, kiam li ankoraŭ vivis en Germanio kaj havis aliajn pseŭdonomojn.

BRIKOFARISTO

La gazeto brikofaristo

Antagonismo

Frapdiroj de la gazeto

Ĝentileco de la reĝoj

Interparolado

La memulo

La timo vivi

Mortulaj kantadoj de Hyotamore de Kyrena

La gazeto „Brikofaristo“ kaj Ret Marut

„La Brikofaristo“ estis la ununura kontraŭmilita gazeto, kiu ekzistis en Germanio antaŭ la fino de la Unua Mondmilito, eldonita de Ret Marut, kiu kiel serĉata ŝtatkrimulo devis senhaŭtigi sin de sia malnova pseŭdonomo, kaj tial nomiĝis B. Traven.

La krimo de Marut estis, ke li batalis kontraŭ la milito kaj kontraŭ koruptega socialdemokrata registaro, kiu helpe de Noske kaj de aliaj reakciuloj murdis laboristojn kaj revoluciulojn. La devizon donis la socialdemokrata militisto Noske, kiu diris, "ke unu el ni devas esti la sangohundo“.

Ret Marut laboris en la komitato de la konsilia respubliko de Bavario (Baiern) kiel cenzuristo flanke de Gustav Landauer. Post la falo de la „Ruĝa Respubliko“ li estis arestita kaj fuĝis laŭdire en la vestoj de ino la unuan de majo en la jaro 1919. Miloj de homoj tie estis murditaj post la falo de la „ruĝa respubliko“. En la biografio de Chris Hirte pri Erich Mühsam, kiu estis aktiva partoprenanto en Munkeno, mi trovis el tiu tempo bildon kun mitralaro,

kiu troviĝis en la postlasaĵo de Mühsam. Mühsam estis unu el la unuaj, kiuj supozis, ke Marut estas B.Traven.

Maldekstre sur la bildo videblas Oskar Maria Graf, fama bavara verkisto, el kies romano "Bolwieser" reĝisoro Fassbinder faris bonegan filmon, en la fono staras Irene Mermet, bataalkunulino de Marut, kiu ankoraŭ en Meksiko kaj poste estis lia amikino; antaŭ ŝi staras nekonato, kiu aspektas kiel Fiete Jansen, juna komunisto, kiu partoprenis en komunista ribelo en Hamburgo flanke de Thälmann, (sed mi ne certas, ĉu li vere estas Jansen). La dua dekstre sur la bildo estas Ret Marut, kiu neniam eliris sen bantkravato, eĉ ne en la batalon, kiel oni vidas ĉi tie, dekstre apud li staras Max Hoelz, moderna Robin Hood el la regiono de Vogtlando, kiu kunvokis post la hombuĉado en Bavario batalantaron, kiu nomimiĝis Ruĝa Armeo. Supozeble la foto ekestis ankoraŭ en la jaro 1919. Hoelz iris poste al Sovetunio, tie lia spuro perdiĝis, ĝis oni trovis lin tie pafmortita en rivero. Certe li estas viktimo de la stalinista teroro. (cez)

Antagonismo

Mi ne povas foriri el mia tago. Sed mi staras super ĝi. Mi volas kaj ĝi estas. Ĉu reĝo iam povis fari pli?

Registaro super mi, ĉu?

Kie?

Kaj se mi ne agnoskas la registaron?!

Mi devas nur voli, kaj ĝi ne plu estas.

Registaro sen regatoj. Nu, kie estas la registaro?

Mi ne havas iun, ĉar mi ne respektas ĝin, ĉar mi ne agnoskas ĝin.

Ĝi povas mortigi min. Ĉu ĝi tial estas registaro?

Ŝtono, kiun knabo ĵetas al mi, povas mortigi min; ĉevalo, kiu furioze forkuras, povas mortigi min. Ĉu ŝtono, knabo, ĉevalo tial estas registaro?

Sed mi ripozigas miajn manojn sur mia sino.

Registara soldato povas malhelpi utilan laboron de mi – kaj nur necesa laboro estas utila. Ununura soldato! Sed mil da registaraj soldatoj, kiuj havas kanonojn kaj tankojn, ne povas devigi min fari laboron. Ili povas devigi min stari je la laborloko, sed ili ne povas devigi min, ke la laboro, al kiu ili devigas min, estas uzebla.

Kiu havas orelojn por aŭskulti, tiu aŭdu!

Kiu havas manojn por senti, tiu sentu!

Ĉu ekzistas registaro, kiu staras super mi? Ĝi povas mortigi min. Sed mi perdas nenion per tio, mi gajnas. Mortigito estas akuzanto, kiun neniuj tribunalo kaj neniuj prizonmuroj povas silentigi.

La registaro povas mortigi min. Mi perdas nenion per tio. Sed la registaro perdas viron, pri kiu ĝi esperis, ke ĝi rajtas regi lin. Sed kio estas registaro sen viroj, kiuj ne estis regeblaj?

Kaj se mia „ne voli esti regata“ por mi estas pli grava ol mia vivo, ĉu? Mia vivo esas limigita, estis regata estas senlimigita.

Ho, kiel mizera vi estas, registaro! Vi, registaro, kiu vi supozas, ke vi regas, kaj kiu vi tamen ne estas, se mi neas vin.

Ho, kiel mizeraj vi estas, vi, en viaj kunsidoj, kie vi parolas kaj ne agas.

Vi plenigas vin per malamo kontraŭ Noske, kiu jam per sia unua sanga ago ordonis la pereon al si mem.

Via malamo kontraŭ li, ĉu? Tiu, kiu ne havas konscion kaj ne animon, de malamo neniam plu estas trafebla. Kaj kiel malamo povus trafi lin, ĉar li ne konis la amon, ĉar li estis nur gvidanto, kiu uzis la gvidatojn por povi fariĝi reganto.

Ĉu unu el viaj gvidantoj havas alian celon ol povi regi vin aŭ por regi kun vi aliajn?

Estu ĉiu mem gvidanto!

Estu ĉiu sia propra gvidanto!

Mi ne bezonas gvidanton. Por kio do vi, kiaj vi estas tiaj bonaj kiaj mi, kiuj vi povas pensi kiel mi?

Mi volas eduki neniun.

Mi volas konvinki neniun.

Mi volas konverti neniun. Sed, se vi pensas, vi scios la veron, kaj scios kion fari.

Pensu! Tion postuli de vi, ĉar vi estas ja homoj kaj povas pensi, estas mia rajto. Mia rajto. Mia praeterna rajto.

Donu al Noske du milionojn da registaraj soldatoj. Lasu elekti lin la soldatojn kaj oficirojn el rondoj, kiuj staras kiel homoj sur evoluŝtupo pli malalta ol tiu de tiuj, kun kiuj li volas regi. Kion tio ŝanĝus?

Kiom da eternaj valoroj, kiom da neanstaŭigeblaj fortoj vi disipas, se vi krias: Sangohundo, ĉu? Li ridas pri tio. Li ridas kun konsidero. Malamplenaĵoj homoj ne damaĝas al la malamatoj. Malamplenaĵoj homoj plej facile estas subigeblaj, plej facile regataj de lertaj regantoj kaj gvidantoj.

Lasu nin prudenti! Ne, mi ne volas prudenti. Ne, mi ne volas fari realpolitikon, per kiu la homaro estas pereigita.

Mi ne volas plenumi pozitivan kunlaboron. La pozitivaj proponoj estas tiuj, kiuj faras el mi regaton kaj mortigas la homon en mi.

La registaro povas murdi. Ĝi povas, se ĝi volas – murdi milojn da homoj – kaj ĝi faros tion je certa horo. Tiun grandan kapablon ĝi havas. Sed ĝi ne havas la kapablon devigi min, ke mi laboru por ĝi. Kion ĝi faru, se la fervojoj ne plu veturas, se neniu karbo estas plu prenebla el la minejoj, se neniu homo plu faros municion por ĝi? Tiukaze ĝi rifuzus al mi la nutraĵojn de la *Entente*. Kaj se mi do ne havas plu eĉ la plej etan intereson pri tiuj nutraĵoj, kiuj estas senvalidigitaj al mi per tio, ke oni subigas per ties helpo homojn al penspigraj sklavoj?

Se mi diras: prefere ankoraŭ pluan jaron „elteni“, prefere lasi mortaĉi inon kaj infanon, prefere preni panon kaj ŝuojn, kiuj estas tavoligitaj malantaŭ vitrotabulo por forlogi min kun senprecedenca impertinenteco pacience porti la skavĉenojn! Tiukaze tio estas la unua konscia ekkrio: revolucio!

Sed en viaj kunsidoj kaj en viaj partioj vi babilaĉas kaj

ŝakras aĵojn, kiuj ne koncernas vin, ĉar ili koncernas viajn tiranojn. Ridindaj marionetaj figuroj, kiuj pendas je fadenoj kaj vidas la fingrojn al kiuj, ili estas ligitaj kaj tamen ne ekrias, ke ne!

Gvidatoj! Misgvidatoj! Mistifikatoj! Vi ekscitiĝas pri perforta regado, ĉu? Sed ne ekzistas perforta regado sen tiuj, kiu volas esti regataj. Mi lasas ripozu miajn manojn sur mia sino kaj la registaro bezonas dudek oficistojn por devigi min fari ion, kion mi ne volas fari.

Se vi havas orelojn por aŭskulti, aŭskultu!

Se vi havas manojn por kapti, kaptu!

Ĉu vi atendas la profeton? La apostolon, ĉu? La gvidanton, ĉu? Por eskapi al certa regado, nur por obei al nova?!

La registaro kun ĉiuj siaj monstrecaj potencrimedoj estas nebulspiro, se mi volas tion. Kaj se mi volas tion, oni ankaŭ povas diri, se mi ne volas ĝin. Per mia nevolo mi estas pli forta ol ĉiuj potencoj, kiuj volas ion!

Ĉu vi komprenas?

Kia mizera aĵo estas mangrenado! Potencrimedo de mensmalfortaj servutuloj estas mitralo! Kiu fidas al mangrenadoj kaj mitraloj, estas plej rapide regata, plej facile regata, plej rapide bezonos mastrojn super si. Mi apogas min per mia volo. Kaj per mia nevolo mi estas la plej forta kaj plej potenca el ĉiuj terloĝantoj: Mi ne volas, kaj se mi tuj devus morti. Mi ne moviĝas kaj se mi devus malsatmorti; mi ne laboras, kaj eĉ, se mia korpo elsekiĝus; kial koncernu min edzino, kial min koncernu infano? Lasu ilin almozpeti, se ili estas malsataj! Nur tiukaze mi senigos min de la regatiteco kaj de la servuteco, kaj havos mian panon kaj mian vinon abunde.

Plenigu la truojn kaj tranĉeojn, kiuj malhelpas vin sur via vojo per kadavroj; ĉar ankaŭ ili estas pontoj. Bonaj pontoj, pli bonaj ol partiaj identigiloj por memebroj.

Sed vi devas havi programojn. Se vi scias tion, kion vi volas, vi ne bezonas programojn. Kaj se vi ne scias tion, kion vi volas, la programoj eĉ malpli utilos al vi, ĉar ili havigos al vi tion, kion vi ne volas.

Pensu! Sed vi ne povas pensi, ĉar vi bezonas statutojn, ĉar vi elektas estrarajn membrojn, ĉar vi lanĉas ministrojn, ĉar vi bezonas parlamentojn, ĉar vi ne povas vivi sen registaro, ĉar vi ne povas vivi sen gvidantoj.

Vi fordonas vian voĉon, por perdi ilin. Kaj se vi volas uzi ĝin por vi mem, vi ne plu havas voĉon, ĉar ĝi mankos al vi, ĉar vi fordonis ĝin.

Pensu! Nenion alian vi devus fari. Konsciiĝu pri via trankvila pasiveco, je kiu troviĝas via nevenkebla potenco. Lasu renversiĝi senafliktite kaj kuraĝe la tutan ekonomian vivon, ĝi ne alportis benon al mi kaj ankaŭ ne al vi.

Lasu kun konscio putriĝi la tutan industrion, alikaze pro la industrio forputros vi.

Vi strikas, ĉu? Mian aplaŭdon al vi, servutuloj! La industrio grasiĝas pro viaj strikoj kaj vi malsatmortas. Vi strikas kaj venkas. Ho, venkintoj! Magran bulkon vi ricevis venkinte: sed la venkito trovis je via venkintofesto du bienojn. Ho, venkintoj! Misvenkintoj! Via gvidanto,

fieraj venkistoj, fariĝis dum tio ministro!

Vi ne bezonas pluŝsofon en via loĝejo. La pluŝsofo, kiun vi havas, estas la signo de via servuteco. Tiom longe, kiom la sofo estas necesa por via bonfarto, vi estos sklavoj.

Unu el viaj nazgvidantoj diris: Havi kiom eble plej multajn bezonojn kaj povi kontenigi tiujn bezonojn je konteniga maniero, tio estas socialismo!

Tiu, kiu diris tion al vi, estis vanta babilaĉulo, ĉar li trompis vin pri la antaŭkondiĉoj. Li gvidis vin en la servutecon.

Ne, ne havi bezonojn kaj la malmultan necesan havigi sen servi, nur tio faras el mia reganto ne-plu-reganton. La kapitalo regas nur tie, kie oni aĉetas ion. Ĉu vi komprenas?

Pensu! Rekonsciigu pri vi mem, ne pri via programo! Ĉiu fariĝu memulo!

Vi parolas: Mi volonte volus, sed mia amiko Maks devus kunagi, amiko Maks diras: Mi kunagos, sed mia amiko

Frederiko devos ĉeesti. Kaj via amiko Frederiko diras: Ni ne povas fari tion solaj. La amaso devos far tion, ni devas havi unue la amason.

Vi neniam havos la amason. La amaso ne pensas, ĉar ĝi ne povas pensi, tial ĝi havas partiojn, programojn kaj gvidantojn.

Sed vi, la individuo, pensas, povas pensi.

La amaso postulas unuecon. Sed neniam homoj estis unuecaj, neniam homoj estos unuecaj.

Per ĉiuj viaj saĝoj, per ĉiuj teknikaj artifaĵoj vi eĉ ne kapablas samtaktigi du horloĝojn. Sed la homoj ne estas horloĝoj. Sed vi volas samtaktigi ilin.

Ho, blindigitoj, ĉu vi povus produkti cerbojn por maŝino kaj meti ilin en homojn?

Sed vi volas havi la amason, vi volas havi la unuecon de la amaso. Kiun plian pruvon vi ankoraŭ bezonos por tio, ke vi estas gvidatoj, misgvidatoj?

Mi devas fari ĝin. Tiukaze ankaŭ amiko Maks faros ĝin kaj ankaŭ amiko Frederiko.

Mi estas eta polveto en la amaso. Kiel la amaso povus ekmoviĝi, se mi, la eta polveto ne unue moviĝus? La polveto devas moviĝi, tiukaze ankaŭ la amaso moviĝas. Kaj se la polveto dum tio fariĝos kadavro, ĝi stinkos. Sed ankaŭ la fiodoro de kadavro movos la amason.

Viaj gvidantoj neniam pensis pri si. Ili ĉiam pensis nur pri la popolo kaj la proletaro.

La sukceson vi vidas nun. Se ili estus pensintaj nur pri si, se ili estus rekonsciiĝintaj nur pri si, ili estus fariĝintaj homoj. Sed nun ili fariĝis partiopapoj kaj vi helotoj.

Vivi laŭ miaj propraj leĝoj mi volas. Mia propra reĝo mi volas esti, kies ununura civitano mi samtempe estas. Neniu registaro estu super mi, kaj neniuj regatoj apud mi.

Faru la saman! Diru: Mi volas! Diru: Mi ne volas! Mi ne bezonas vin. Nek por gvidi nek por esti gvidata. Nek, ĉar mi estas forta, nek ĉar mi tro aplombas, sed ĉar mi praktikas uzuron de mia pensado. Ĉar mi ne bezonas la

doton, kiu estas donita al ĉiu, por ke alia praktiku uzuron per ĝi kaj mi estos kondamnita al sklaveco.

Faru la saman!

Se mi volas konstrui domon, kiun mi ne povus finkonstrui, ĉar estus tro da laboro por miaj ambaŭ manoj, tiukaze mi petos vin, ke vi helpu al mi! Tiukaze vi venu kaj mi faros la saman, se vi bezonos helpon. Sed mi certe ne venos por satigi vin por ke vi fariĝu pli bone uzeblaj sklavoj kiel en Ruslando.

Mia vivo estas sekura, tiom longe, kiom mi sankte respektas la vivon de miaj kunhomoj. Mi ne bezonas protektgardaron antaŭ mia domo, ĉar oni ne povas ŝteli ion de mi. Rabistoj ekzistas ĉiam nur tie, kie homo posedas pli ol li bezonas kaj aliaj ne satiĝas.

Sed vi bezonas la policon. Se du el viaj inoj kverelas, ili kuras al policejo. Se iu forprenas de vi malnovan pantoflon, vi alvokas la policon. Per vi la polico fariĝas grasa. Per vi grasigas sin la juĝistoj. Vi vokas la policon kaj donas al ĝi per tio la rajton pruvi sian neceson.

Sed mi diras al vi: Dekfoje pli bone kaj eterne pli bone estas, ke la polico forkonduku vin ol ke vi alkonduku la policon. Tiu, kiu bezonas la policon, estos vorita de ĝi, sed tiu, kiu ĝin ne bezonas, neniigos ĝin.

Murdon post murdo! Sed, se mi malamus la murdiston de revoluciaj homoj, li estus ja honorata per mia malamo. Per lia unua murdo la murdisto ĉesas esti homo. Kiel mi malamu tion, kiu estas nek homo nek besto?

Via partia identigilo faras el vi misgvidaton, mistifikaton! Tial ĝi estas pli bona, se vi lasas vori vian monon de la vermoj ol ke vi donas ĝin al via partio, ĉar la partio konsolas vin per la estonteco, je la bonfarto de via nepoj. Sed tion ankaŭ la eklezio faras, kiu konsolas vin per la ĉiela regno. Estonteco kaj ĉiela regno estas la sama. Ili povas esti belaj, eble. Translasu la estontecon trankilve al la partio kaj la ĉielan regnon al la eklezio. Sed via estu la nuno! Prenu ĝin. Se la estonteco estus pli bona kaj la ĉiela regno pli bela, la bonaj homoj ilin ne intencus vendi al vi por viaj groŝoj.

Mi diras al vi denove: Estas pli bone lasi forbruligi vian

monon ol ke la mastro riĉigas sin je ĝi, ĉar vi aĉetas ties varojn.

Pri viaj strikoj ridas la kapitalisto. Sed je tiu tago, kiam vi unuafoje vualigas viajn gambojn per malnovaj ĉifonaĉoj anstataŭ aĉeti ŝuojn kaj ŝtrumpojn, liaj forte streĉitaj membroj tremados pro palvizaĝiga timo.

Tial detruu la ekonomian vivon ne nur de interne, sed ankaŭ de ekstere. Sur la ruinoj de la industrio ekfloros via libero, ne sur ties fortikaĵoj kaj kasteloj.

Lasu vian monon vori de la vermoj, eldevenu la dudekoblan salajron kaj malpliigu vian laboron je centobla parto de via kapablo kaj ĝi estigos al vi miloblan benon.

Incenso en preĝejo kaj babilaĉo en la kunsidoj estas la sama. Legi gazeton aŭ eĉ pagi ĝin kaj lerni parkere preĝejajn kantojn kondukas al la sama rezulto.

Neniu dio helpas al vi, neniu programo, neniu partio, neniu gvidanto, neniu balota folieto, neniu amaso, neniu unueco. Nur mi mem povas helpi al mi. Kaj en mi mem

mi helpas al ĉiuj homoj, kies larmoj fluas.

Mi helpas al mi, helpu vi al vi, frato! Agu! Estu volo! Estu ago!

Vi krias, ke vivu la mondorevolucio! Tio sonas tre bone. Sed, ĉu la telegrafaj kabloj jam estas en viaj manoj? Ĉu vi jam eksplodigis rotacian maŝinon? Vi krias, ke vivu la mondorevolucio! Sed via frato, kiun vi ĉirkaŭbrakas, jam ne plu aŭdas la krion. Kiel ĝin do aŭdu la mondo?

Ne aĉetu dimanĉan veston kaj ne hontu hejme dormi sur lignokesto kaj sen pantalonmalsupro ridante iri tra la plej elegantaj stratoj, tiel vi faros pli por la revoulicio ol kanti la "Kanton Internacian" kaj studi la galimation, kiun la papoj el Berlino kaj Moskvo vendas al vi.

Tiom longe, kiom vi havas ankoraŭ fajrereton da hontosento, ĉar vi ne povas kontentigi bezonojn, kiuj apartenas al la burĝa deco, tiom longe, kiom vi ankoraŭ hontas diri, ke vi estas fiera pri tio aspekti kiel la plej trivita kanajlo, tiom longe vi ne rajtos esperi pri libero.

La bona deco de la burĝo ne estas mia. Mi havas mian

propran. Honti aspekti kiel vagabondo estas la eksluziva rajto de la burĝo. Ankaŭ havi tiun eksluzivan rajton esti rigardata bona deca burĝo, faras el vi, proleto, servutulon. Esti sama al la burĝoj aŭ same ŝajni faras vin sklavo. Sed mi neniigas la burĝojn, ĉar mi detruas ilian ekziston per tio, ke mi ne enspezigas ilin, ĉar mi volas aspekti kiel li.

Jam ĉiam liberaj popoloj des pli facile lasis subigi sin, je pli facile ili lasis prisvati sin, ke pli bele aspektas, se oni estas vestita per katunpantalono ol ĉirkaŭkuradi nuda. La katunpantalonoj, kiujn ili tute ne bezonus, kiuj vekis nur ilian konvinkon, ke ili per tio fariĝos samrangaj al la eŭropanoj, faris el ili ekspluatitajn sklavojn.

La mizera vitroperla ĉeno de la negrino kaj la pluŝsofo de la proleta ino estas la sama. Tio faras la viron kaj la tutan klason helotoj.

Kaj ankoraŭfoje mi diras: Devigu per ĉiuj rimedoj la dudekkvinoblan salajron por la kvincenta parto de via hodiaŭa laboro, manĝu sekan panon, vestu vin per ĉifonoj, kiujn vi serĉas en kunbalaitaĵo kaj nutru per via manĝo la musojn. La kompleta kaoso de la ekonomia

vivo, konscie kreita per via pasiva kaj via aktiva agado,
estas la unua frulumo krepuskiĝo, kiu faros el vi homon!

Nur sole la polvonuboj de komplete detruita industrio
disrompas viajn ĉenojn.

Ne fliku tion, kio devas disŝiriĝi!

Ne tenu kune, kio devas renversiĝi!

Se derompiĝas ŝtono el la truddevigaj burgoj de la
industria vivo kaj el la fortikaĵoj de la industrio, tuj
postĵetu cent ŝtonojn.

Se vi levas nur unuopan de la derompiĝintaj ŝtonoj kaj eĉ
enmetas ĝin denove, via perfido estas pli fia ol tiu de
spiono, kiu ĉirkaŭe embuskas vin.

Forŝiru de via kontraŭulo la plej akrajn armilojn. Liaj plej
akraj armiloj ne estas kanonoj kaj soldatoj. Oro estas
malpli valora ol loza sablo, se via laboro ne subtenas ĝin.

Per la industrio vi volas forŝovi i viajn ĉenojn, ĉu? Per la
floranta ekonomia vivo vi volas lukte venki vian

kontraŭulon, ĉu? Ĉu mi ne diris, ke vi estas burĝo, ĉar vi pensas kiel burĝo?

La afero de la burĝo neniam povas esti via! La industrio, kiu donis al la burĝo la potencon sklavigi vin, neniam povos doni al vi liberon aŭ vivon.

La industrio, kiu ekzistas, ne povas esti la sama, kiun vi bezonas. La industrio, kiu ekzistas, estigas nenion alian krom armiloj por sklavigi vin.

La industrio, kiu donu riĉon al via vivo, povas kreski nur sur la polvigitaj fragmentoj de la industrio, kiu ekzistas.

La gvidanto diros tion alie al vi. Tial li ja estas gvidanto kaj tial vi ja estas fi-gvidato.

Infannaskuloj restas en sklaveco. Sklavoj estigas infanojn. Ĉiu infano, kiun vi naskigas, estas ringo en via sklavoĉeno. Aĉetu pluŝsofon kaj nasku infanon, ambaŭ aferoj estas la sama, ambaŭ kondukas al la sama rezulto.

Se vi vian tutan havaĵon povas stivi en sakon, kiu alte atingas viajn koksojn kaj vi povas porti tiun sakon sur viaj

ŝultroj, tiukaze la kanonoj rustiĝos kaj la truddevigaj burgoj renversiĝos ĉe la sono de pajnofluto.

Mi agas! Mi agas, se mi ne sentas min sufiĉe forta, kiel aktivulo! Mi agas, se mi sentas min sufiĉe forta, kiel pasivulo! La dua estas la pli forta, ĉar ĝi ne fortigas mian kontraŭulon, kiu tiras el mia aktiveco fortojn.

Mi ne atendas la unuecon; ĉar mi estas la unueco.

Mi ne atendas la amason, ĉar mi estas la amaso.

Mi ne atendas la revolucion; ĉar mi estas la revolucio.

Antaŭ ol estas la revolucio, devas esti revoluciulo!

Antaŭ ol estas la amaso, devas esti la unuopulo!

Antaŭ ol estas la unueco devas esti la unuopulo, la memulo!

La vorto devas esti antaŭ ol povas estis la bataleja kriadado kaj la signalvorto.

Demokratio estas plimulto. Plimulto estas regado. La

plimulto estas la vesto, sub kiu la nehomo tenas kaŝite la ponardon. La plimulto estas la cerboĉelo de tiuj, kiuj ne kapablas pensi. La plimulto esta la sceptro de la trompistoj kaj friponoj.

Voĉdono estas intencita trompo, ĉar la voĉdona malvenkinto pravas.

La voĉdonado kaj la plimulto estas la sangavidaj ekzekutistoj de la homoj.

Kontraŭrevoluciulo estas tiu, kiu aĉetas ion; ĉar la pfenigo, kiun vi pagas fariĝos talero, per kiu oni forsekigas la medolon el viaj ostoj.

Estu vi mem kaj vi estos ĉiam unueca!

Estu volo!

Estu nevolo!

Estu ago!

Ĉu vi surgenuas kaj petas Dion aŭ ĉu vi metas vian aferon

en manon de gvidanto, tio estas la sama.

Ĉu vi aĉetas al vi preĝlibron aŭ partian membran identigilon, tio estas la sama.

Forĵetu la kompaton de vi, ĉar la kompato estas la revolucio de la burĝo.

Ne priploru la viktimojn, kiuj falas en batalo, ĉar la ploro, kiu briltremas sur via okulo, plenigas tiun, kiun vi neniigu, per venkespero.

Kial koncernu vin la viktimoj, kiuj estis disŝiritaj de la dentoj de tiu monstro, pro kiu vi estas naskita por neniigi ĝin? Ju pli granda estas la kvanto de la viktimoj, kiujn voras tiu monstro, des pli certa estos ties morto. Se eĉ multaj dioj pereas pro tro da viktimoj, kial do ne, kaj eĉ multe pli rapide, tiuj monstroj. Ĉu la monstro voras tiujn viktimojn aŭ devas ŝarĝi sin per ili aŭ lasas putri ilin sur la stratoj, tiel, ke ili plenigos la aeron per pestodoro, estas egala; iliaj vermoj manĝos la korpon de la monstro tute.

Tiom longe, kiom estas malsatuloj apud satuloj, la kompato de la satuloj estas fia moko de la malsatantoj kaj

la kompato de la malsatuloj kun la viktimoj pravigo kaj rekono de la rajto de l' satuloj esti sataj je la kostoj de la malsatuloj.

Aŭskultu, se vi havas orelojn por aŭskulti!

Pensu, se vi havas cerbojn por pensi!

Sed ne kredu!

Sed kredu nenion!

Sed ne konfidu!

Fidu nur al via propra forto!

Via forto estas neskuebla, se vi mem ne skuas ĝin.

Nevenkeblaj vi estas, se vi metas viajn manojn ripozige sur la sinon! Se estu tiel, tiukaze ne malsatmortu sen volo, sed malsatmortu kun konscio. Malsatmortu kun via volo, ne per la volo de tiuj, kiuj baldaŭ aliĝos vin ĉe la malsatmortado, tuj kiam vi komencos malsati.

La irlandanoj malsatas en la prizonoj ĝis la morto por la

libero de sia lando. Ĉu via afero ne estas pli granda ol tiu de la irlandanoj?

La popoloj de Barato ne havas armilojn kaj ili ne havas gazetojn. Sed ili detruos la mondoregnon Britlando per silenta rezisto. Kontraŭ tio ne helpos ĉiuj kanonoj kaj monsakuloj de l' tero. Ĉu via afero ne estas tiom sankta, kiom la sankta afero de la popoloj de Barato?

Vi mortis sur la batalejoj por tiuj, kiuj grasiĝis per via morto. Ek do, mortu por via propra afero!

Kaj mi diras al vi, ke estas pli meti la manojn ripozige sur sian sinon ol ke vi uzu mitralojn kiel helpilon. Kio estas eldevigita per armiloj, ĉiutage povas esti prenita per armiloj. Sed tion, kion vi konkeras per via volo aŭ nevolo, ne povas preni Dio de vi. Ĉar Dio estas nenio alia krom volo. Sed vi havas pli ol vian volon, vi havas manojn, kiuj kapablas formi tutan teron.

Mi estas nevenkebla, se mi ne volas tion, kion alia volas!

Vi estas nevenkebla, se vi ne faras tion, kion alia celas!

Vi estos nevenkeblaj, se ne la amaso, sed la individuo, la unuopulo, fariĝos pli granda kaj pli potenca ol la plej potenca reganto. La potenco de la plej potenca reganto disrompiĝas je la nevolo de la plej malforta sklavo.

Forigo de la privata posedo je la produktadaj rimedoj, ĉu? Ne, vantaj babilaĉuloj!

Forigo de la privata posedo eĉ je la lasta pantalono!

Scio estas potenco? Ne!

Ago estas potenco!

Sciado liberigas, ĉu? Ne!

Ago liberigas!

tradukis Hans-Georg & Dorothea Kaiser kaj Frank Vohla en vesperoj de la klubo Karapaco laŭ „Gegensatz“. La artikolo aperis unuafoje en la gazeto „Ziegelbrenner“ (Brikofaristo), Kvina jaro, dudekunua de decembro de la jaro 1921, kajero 35/40

Kelkaj rimarkoj

Preskaŭ ĉiu, kiu legas tiun artikolon, tuj pensas: "Hehe, ĉu li ne troigas la forton de la individuo; sed pensu mem, ĉu homo sen tia konvinko povus krei ion tian, kian la sesvoluman mahagonciklon aŭ La Mortulan Ŝipon ktp....? Oni ne devas akcepti kaj eĉ ne akceptu ĉion, kion Traven asertis, sed oni lernu de li, kiom grava la propra personeco por la propra vivo estas.

Kanzonisto Biermann en sia koncerto en Kolonjo – kiu estis skandalo por la registaro en GDR – pruvis, ke homo kiel unuopulo povas sukcese embarasigi tutan ŝtaton, , se li fidas pri si kaj siaj celoj. Biermann, la tiama genia provokisto (nun li fariĝis bedaŭrinde homo sen politika konvinko) en tiu koncerto interalie diris laŭsence tion: Oni diris al mi, ke mi troigas mian kritikon pri GDR, sed ĉu mi ne devas troigi, se multaj aliaj maltroigas? Ĝuste tion faris Marut per sia grandioza teksto, li atentigas pri tio, tumulte kaj en revolucia situacio, kiom dependas de ni mem, de nia propra personeco, kiom da potenco havas ĉiu el ni. Se ni ne havas mem potencon pri ni mem, tiukaze ni ne miru, ke aliaj kun

pli da energio ol ni, havas potencon super ni. Tio estas la plej grava, kion ni povas lerni de Ret Marut. Ni lernu mem pensi, kaj ni agu laŭ nia konvinko, ne laŭ tiu, kiu estas ordonita al ni de frida potenco super ni, al kiu ni esta elmetitaj pro nia hazarda naskiteco.

La memkonscio estas la unua tre necesa evoluŝtupo kiel evoluita homo, la sekva kaj eĉ pli grava estus la agado laŭ tiu senco. Por esti homo en la senco de Diogeno, kosmopolito, kiu rigardas la tutan mondon kiel sian hejmlandon kaj tial ankaŭ draste provas ŝanĝi la mondon laŭ tiu senco. Kiel esperantistoj ni disponas pri bonega lingva antaŭkondiĉo.

Sed agi kaj ne nur revii kaj esperi, devas ankaŭ ni, eĉ, se ni ĉiuj lingve pli facile povas kompreni nin ol aliaj. Libero ne riceveblas kiel donaco sur kongreso, liberon oni devas preni al si ĉiam kaj ĉie. La strebatajn kisojn de la diino Libero ni povas atendi nur tiukaze, se ni ne fordonas nian kapon je la vestejo de l' monda teatro kaj ne translasas nian ĉiutagan liberigon al aliaj. La fiera dia damo Libero ne ĉirkaŭbrakas malkuraĝulojn. (cez)

Frapdiroj de la gazeto

Miaj legantoj venos!

La legantoj, kiujn mi devas havi kaj kiujn mi havos, ĉar ili estas homoj, tiuj venos! Tio estas ne mia espero, sed mia certo!

Por mi gravis nur du aferoj

... dum por ĉiuj gravas nur tio, ke ili plu restu en favoro, por ricevi la konsenton por la prespapero, por mi gravis konservi nur du aferojn kontraŭ la pereco:

1. La ideo, ke la homo pli gravas ol la ŝtato, ne pereu.
2. Kiu ne volas mensogi, tiu ne devas mensogi. Oni povas diri ĉion, eĉ la veron, se oni metas la veron super la personan bonfarton.

Noto de la brikofarista redakcio:

„Pri vizitoj rezignu. Neniam iu renkonteblas. Telefonon ni ne havas.“

El „Sep vizaĝoj de la tempo“

Ĝi signifas „de“ la tempo. Kiu volas, povas legi „de tempo nia“. Sed neniukaze ĝi signifas „de tempo mia“. Ĉar tempo mia tiu ne estas, kiu ĉi tie rikanas kun brutala nekaŝemo en hororiga realeco. Mia tempo staras en sovaĝa kontraŭdiro al la nuna tempo. Kun tiu ĉi tempo, kiu tie ĉi diboĉas kaj mortige aĉas, mi havas nenion komunan. Mi ne estas tempokunulo.

La plej forta

El la triopo ŝtato, registaro kaj mi, mi estas la plej forta. Tion notu bone! (La eldoninto en la kajero de la tria decembro en 1919 Kajero/18/19)

Tradukis la karapacanoj Dorothea & Hans-Georg Kaiser & Frank Vohla el la gazeto „Brikofaristo“

Ĝentileco de la reĝoj

La alia estas ĉiam mia ĝismorta malamiko, kaj mi estas lia. Ni estas ambaŭ nur tro ĝentilaj diri tion reciproke malkaŝe.

Tial la ĝentileco estas la ununura rimedo ebligi la kunvivon de la homoj entute.

Mi konkludis tiun ŝajne brutalan aserton plej simple.

Ie ekzistas du ŝtatoj priloĝataj de tre fervoraj homoj, jen ŝtatoj, kiuj koncedas eĉ ne pizon sur la muro reciproke, kvankam por ambaŭ ekzistas tute sufiĉe da pizoj. Kaj tial, se unu el la ŝtatoj konstruas du kirasŝipojn, tiukaze tio estas por la alia ŝtato sufiĉe da kaŭzo por konstrui kvar kirasŝipojn kaj unu torpedoŝipon, pro kio la alia sentas sin devigita konstruigi ses kirasŝipojn kaj tri torpedoŝipojn, kio estas la kaŭzo por la alia konstrui ok kirasŝipojn ktp. Kaj tiel tio iras de tiam seninterrompe. Jen okazis al unu el ili, ke unu el ties plej novaj, plej bonaj kaj plej grandaj kirasŝipoj ĉe manovro per puŝo kolisiis kun roklifo, tiel, ke ĝi disrompiĝis enmeze kaj perdiĝis

sen revido, dum tio mortis pli ol kvarcent kaj kvindek maristoj. Kiam la reĝo de la alia ŝtato aŭdis tion, oni povis supozi, ke li ĝojas pri tio. Sed li faris la precizan malon. Li sendis al la reĝo de la ŝtato, kiu estis trafita de la malfeliĉo, telegramon: ‚Reĝa frato mia! Mi kaj mia tuta popolo funebras kun vi pri la perdo de via plej bela ŝipo; kaj niaj ploroj intermiksiĝas kun tiuj de via fiera popolo, kiu priploras la heroan morton de tiom da bravaj kaj kuraĝaj marsoldatoj!‘

Tuj alvenis la responda telegramo: ‚Reĝa frato mia! Viaj tiom koregaj vortoj dum mia profunde sentata doloro senfine bonfartigis min. Mi dankas al vi en la nomo de mia funebranta popolo pro via korega kaj sincera kunsento!‘

La ŝtato, kiu ne estis trafita de la malfeliĉo, tuj konstruigis dek du kirassĥipojn kaj dekok torpedosĥipojn.

Tradukis la karapacanoj Dorothea & Hans-Georg Kaiser & Frank Vohla laŭ „Höflichkeit der Könige“ el la gazeto, „La brikofaristo“, 2-a jaro, kajero 5-6-7-8 / 9-a de novembro 1918

Rimarko

La satiro estis verkita kaj publikita antaŭ la unua de aŭgusto en la jaro 1918 „Ĝi ne perdis ion je vero“, konstatas jam Ret Marut mem en sia kontraŭmilita gazeto „Brikofaristo“, kie li reaperigis la satiron kiel gloson.

Interparolado

Kiam Cineas vidis, ke Pirho decidis iri al Italio, li diris iutage al li: „Vi do intencas uzi viajn armilojn kontraŭ la romianojn. Bone. Sed, se ni tiam bonŝance estos venkintaj ilin, kiu avantaĝo tiam kreskos el tiu venko por ni?“

„Se la romianoj foje estos venkitaj“, respondis Pirho, „apartenos tuta Italio al ni.“

„Kaj se ni tiam estos la mastroj de Italio, kion ni faros tiam?“

„Sicilio tiam falos al ni kiel matura frukto en la sinon, preskaŭ senpene.“

„Bonege. Kaj se ni tiam estos subigintaj Sicilion, ĉu tio estos la fino de niaj entreprenoj?“

„Tiel certa tio ne estas. Kartago, Afriko, Makedonio, la tuta Greklando estus post tio la celoj de niaj pluaj konkerroj.“

„Kaj se ni tiam estos venkintaj ĉion kaj tute nenio plu restos por konkero, kion ni faros tiukaze?“

„Ni vivos en paco, plenigos niajn tagojn per grandiozaj festenoj, per agrablaj interparoladoj, per admirindaj festaranĝoj kaj ni pensos pri nenio alia ol pri tio plezurigi nin kaj esti gajaj.“

„Bonege, moŝto mia, bonege, vere tute bonege“, respondis Cineas entuziasme, „tio fariĝos ja ĝuinda vivo. Sed – sed kio malhelpas nin jam hodiaŭ vivi trankvile, aranĝi festenojn kaj farti bone ĉe plezuroj? Kial ni do devas iri, por povi fari tion, tiom da ĉirkaŭvojoj kaj tiom malproksime devos serĉi feliĉon, kiun ni jam tenas en niaj manoj; kaj kial ni devas tiom terure multekoste elaĉeti ion, kion ni jam hodiaŭ povus havi, kaj eĉ sen iu peno kaj sen iu aflikto kaj sen iu ĉagreno?“ Tiun prudentan parolon Pirho ne sciis respondi.

(el malnova franca instrulibro tradukis germanen Ret Marut)

*tradukis la karapacanoj Dorothea & Hans-Georg Kaiser &
Frank Vohla laŭ „Eine Unterredung“ el la gazeto, „La
brikofaristo“*

La memulo

Eldonis La Brikofaristo por la komunumo de la memuloj

Folio 1

Unua de majo 1919

Bataltempo I.

Malproksime de la laŭta hela tago,
tamen neŝanĝeble proksima al ĝi,
mi estas,

dum mi spiras,
dum la suno brilas al mi.

Kaj ĉar homo mi estas,
polvo estis, polvo estas kaj polvo estos,
sed SPITE al Vi, Dio, kaj tamen
sinjoro inter sinjoroj
kaj reĝo inter reĝoj.

La amaso estas morto.

Nur mi estas, la soleculo, la vivanto,
mi, la U N U N U R A,
mi, kiu apartenas al si mem,
mi, kiu estu al si mem,
netuŝebla, netrovebla,
propreca, unikeca,

unueca kun la universo,
la estanta por si mem.
Mi, la MEMULO.

*tradukis Hans-Georg Kaiser laŭ Der Selbe“ el Karl S. Guthke,
„B.Traven Biografio de enigmo“*

Rimarkoj

Ret Marut estas la pseŭdonimo, kiun Traven uzis, antaŭ ol li fariĝis B.Traven. La teksto ekestis, kiam li eldonis kiel ununura, kun la helpo de Irene Memet, ekde septembro de la jaro 1917 en Germanio kontraŭmilitan gazeton: Der Ziegelbrenner (La brikofaristo). Kiel tiu gazeto ankoraŭ antaŭ la fino de la Unua Mondmilito povis trapasi la cenzuron, estas ankoraŭ nun enigmo. Tute klare ekkonebla estas la influo de la Stirner-libro: „La unikulo kaj ties propraĵo“. En tiu tempo la pli posta B.Traven ankoraŭ estis tre forte influata de la filozofio de Stirner. Tio neniam tute perdiĝos, kvankam aliaj filozofoj kaj pensuloj kiel Malatesta, Marx kaj Engels aldoniĝis. La tradukado de la teksto estas iom komplika, ĉar „allein“ en la germana lingvo signifas kaj „sola“ kaj

„ unueca kun la universo“, en la ĉiutaga uzo oni pensas nur pri „sola“, tre verŝajne la vorto estas konscia vortkreado de la germanlingvaj mistikuloj. Pri la mistikuloj verkis Gustav Landauer, batakunulo de Marut, tutan libron. (cez)

La timo vivi

(el la gazeto „Brikofaristo“ 1917)

La potencega interna impulso de la homoj tute vivi – tute vivi per disvolvado de ĉiuj iliaj fortoj kaj latentaj kapabloj – kaj la maleblo kontentigi tiun impulson, entenas unu el la psikaj kaŭzoj de la nuna homara tragedio. Tiu kontraŭdiro kaj la streĉiĝo ekestanta el tio, estas tio, kio tre faciligas la malhumanajn entreprenojn de militaj demagogoj, de la landrabaj furiozuloj kaj plilongigantoj de militoj. La profitintencoj de la armilaj liverantoj kaj fikomercistoj de ĉiu speco estas rilate al tio nur akcelantaj fortoj, kiuj efikas plifortigante, sed tamen devus resti tute senefikaj, se la homaro dekomence rifuzus kunagi ĉe tio.

Sed kial la homoj ne povas plenforte kaj sukcese defendi sin kontraŭ tiaj al ili ĉiurilate damaĝigaj influoj? Ĉar oni subigas ekde la infaneco je la individuoj per ĉia potenco kaj severo ĉiujn aspirojn, ĉiujn kapablojn kaj ĉiujn emojn laŭ ili vivi. Ekde la unua lerneja tago de infanoj la celo de la gepatroj kontraŭ knabo direktiĝas nur al tio fiksigi la bazon de vivteniga nutrada sekureco (ekzisto), kaj

kontraŭ la knabinoj – sendepende de maloftaj esceptoj – prepari ilin pri tio esti bona objekto de edzinigo. Sed ĝi estus ja senfine pli grava fari el infano kompletan harmonie edukitan homon, ja entute fari nur homon el ĝi, kaj ne nur furaĝoserĉanton. Se la infano estas aŭtentika homo, ĝi trovas la bazon kaj antaŭkondiĉojn de la plaĉa nutraĵ sekureco tute per si mem kaj bezonas por tio nek konsilojn nek eĉ devigajn direktivojn. Per si mem tiuj celadoj de la edukistoj apenaŭ estus tre danĝeraj. Sed rilate tion, ke ekzistas ĉe la sekurigo de la vivbazo ankoraŭ estas diversaj nuancoj de pli alta kaj pli malalta specoj oni preferas – por fari perfekta la malfeliĉon – tiun vivmanieron, kiu kiel eble plej frutempe metas la homojn en la staton, en kiu ili sentas sin liberigitaj de ĉiuj zorgoj pri sia estonteca vivo. Oni sidas aŭ obstine studegas, laŭ tio aŭ tio, la laŭan kvanton da jaroj kaj poste leviĝas al posteno kaj honoroj. Tiu strebado pri frua senzorgeco trovas sian plej klaran esprimon je la perspektivo pri kiel eble plej granda oficistopensio aŭ je la firma sekurigo de frua viv- aŭ vivpensio. Kaj ju pli frue estos pagata alta oficista pensio aŭ vivpensio, des pli valoras la profesio aŭ la ofico; ju pli bona estas la pensia perspektivo des pli

grasa la ofico kaj des pli influiga la socia rango. Ne tiuj efektivas por la kulturo la plej altan kaj por la progreso de la homaro la plej valoran kaj plej gravan, kiuj jam en la aĝo de dudek unu jaroj scias senerare elkalkuli siajn estontajn oficistajn aŭ vivpensionojn aŭ la socian rangon, sed tiuj, kiuj ne scias, kiel ilia vivo en la sekva jaro deruliĝos: de la praktikantoj de liberaj profesioj. La pensiaj aspirantoj estas nenio krom la numeroj de la homaro, kiuj aŭ bremsas la progreson aŭ estas indiferentaj pri ĝi. La stimulantoj, la sturmantoj, la vojqpretigantoj estas tiuj, kiujn oni ĉiam parte mirigite kaj parte kompateme demandas: „Sed, dio mia, kion vi faros tiukaze, se viaj celoj ne efektiviĝos, aŭ se vi estos malsana? Pensu foje ankaŭ pri via oldulaĝo!“

Pensioj estu forigitaj, favore al la homaro. Anstataŭ tio estu: ŝtata subteno de ĉiu civitano, kiu fariĝis malkapabla labori aŭ kiu atingis certan aĝon. Tiu ŝtata subteno devus esti sufiĉe alta por ebligi al la ricevanto senzorgan vivon laŭ ties ĝistiamaj vivkutimoj; kaj sensecepte ĉiu civitano aŭ ĉiu, kiu laboris fiksitan minuman kvanton da jaroj interne de popola komunumo, devus ricevi la pension sen

oficiala skribo. (De la laborista pensio, kiu jam ekzistas, en tiu rilato ne povas esti la parolo, pro ties nesufiĉeco, (la aĝa limo estas tro alta kaj la cedata sumo ne menciinda.) La ŝtato pro tio ricevas multe malpli da oficistoj, sed anstataŭ tio ja des multe pli tre fervorajn homojn. La unua rezigneblus, la lasta estas nepru neceso, speciale por la ŝtato kaj por la homaro ĝenerale. La homoj ne plu urĝus al la profesioj kaj oficoj, kiuj promesas bonan kaj frutempan pension, sed al tiuj, kiuj ĝojigas ilin. Vere sukcesa estas ja nur tiu laboro, kiun oni faras kun ĝoĝo, pri kio atentigas emo, talento kaj precipa taŭgeco. La popola tuto – aŭ, aŭ se oni preferas diri tiel: la ŝtato – havus de tio la plej grandan utilon. Kiom da laborvaloroj jam pro tio estas perditaj, ĉar oni faras certan laboron nur kontraŭvole.

Sed nia tuta edukado, ja nia tuta vivo estas adaptita al tio pensi nur pri la sekurigo de la porvivo anstataŭ pri la laboro mem kaj unuavice pri la laboro. Tiu eterna timo pri la ŝanĝokazoj de la vivo, tiu ĉiama timo foje ne havi tagmanĝon, tiu ununura zorgo pri tio, kio povus (povus!) fariĝi en maljuna aĝo el iu, faras el la homoj obeulojn,

sklavojn. Per tiu vivotimo oni subigas ĉiun entrepreneman spiriton kaj enkatenigas ĉiun freŝan, vivantan, senzorgeman risk- kaj vivkuraĝon. Se oni estas dungito aŭ oficisto, jen la ununura bezono estas, ke oni havu tian oficon aŭ dungadon en la plej bona kazo poreterne, se ĝi estas nur ne tro malbone pagata kaj se ĝi sekurigas la vivon en la maljuneco. Kaj tial la homoj fariĝas servilaj, subulaj kaj timemaj pro la plej mallaŭta venteto kaj lasas sen uzo rusti la plej bonajn kaj plej belajn fortojn donitajn de bonintenca naturo al oni. Nur ne ŝanĝo! Sed je la ŝanĝo, pli ĝuste je la konscio timi neniun ŝanĝon, troviĝas la progreso kaj impeto. La aĝo: ho, mi sufiĉe bone komprenas, ke ĝi povas esti por certa homo multe pli grava kaj pli valora senbremsite ekmovi la riĉecon kaj multflankecon de la vivo, la abundon de ebloj, ĉiujn siajn fortojn kaj talentojn tiamaniere, ke tiam, kiam oni fariĝos efektive tro olda kaj malkapabla por plu labori, oni libervole finos la vivon, sed por tio kunprenas la dian konscion transmonden, ke oni nek ŝuldas ion al la vivo nek al la donitaj kapabloj, kaj do estis homo. Oni laboru, tiel bone kiel oni povas; oni plenumu tion, al kiu onin kondukas emo kaj talento, senafliktite pri monenspezaj

perspektivoj; oni provu per ĉiuj fortoj kaj konoj ĝuste tion plej bone plenumi, pri kio oni ĝuste okupiĝas. La vivo estas tiel mallongega, kaj en la tuta eterneco oni vivas ĝin nur unufoje, kaj tamen oni plenigu ĝin nur per tio ĉiam ĉirkaŭrigardi pri pli granda mongajno? La ŝanĝo de la vivkondiĉoj kaj de la vivkutimoj kondukas supren-malsupren, alportas feliĉon kaj malfeliĉon. Malfeliĉo, ĉu? Ja ne povas esti malfeliĉo, se oni faras laboron kun ĝojo kaj je ĝi trovas profundan kontentiĝon; ĝi ja ankoraŭ tiam ne povos esti malfeliĉo, se ĝi enspezigos nur tiom, ke oni ne malsatmortos. La veraj valoroj troveblas sur aliaj terenoj. Timi la multflankecon kaj riĉecon de la vivo faras laca, bremas la homojn sur pli malaltan ŝtupon de la evoluo kaj faras ilin nekapablaj kompreni la novan tempon alrapidantan kaj la novajn mondajn okazaĵojn, en kiuj ni staros post certa tempo pli profunde ol ĝuste nun, kaj iri kun ili. Tiun, kiu ne kuniras, kaptos la radoj.

Sed tiu timo vivi estas tre disvastigita. Se la individuo havas tiun timon, tiukaze tio estas malbonega, sed parte komprenebla. Ĉar malfortaj homoj kaj tiaj, kiaj ne havas memfidon pri la giganta forto, kiu internas de ĉiu homo,

ĉiam timidaj kaj timaj, plej multe la vivon. Sed multe pli malbona estas, se registaroj kaj regantoj timas la vivon, se ili timas la altigitan vivosenton, la altigitajn vivofortojn kaj la leviĝintan vivovolon de popolo, se ili timas doni rajtojn al popolo, kune decidigi popolon pri ĉiuj internaj kaj eksteraj okazaĵoj de la ŝtata vivo. Kiom pli ĝoje ofertas popolo sangon kaj bonfarton, se ĝi vere havas certan kune decidon je sia sorto kaj ne nur disponas pri bona fido. Tiam la junulece freŝan vigan sangoplijunigantan kunlaboron de la popolo estas la granda obstaklo, kiu, ligitu kun nekompreno, estigas tiom da damaĝo; ĉar ĉiuj popoloj en tiu ĉi mondotragedio fariĝis maturaj, eĉ, se tiu matureco ĝis tiu momento efektive mankis al ili. Nur la timo pri la vivoforta kunlaboro de la popolo estas la obstaklo! Ĉar la timo, poste eble ne plu tiel bone povu grasigi sin je la kostoj de la publiko, povu havi ja nur homoj, kiuj estas morale tute dekadentaj. Tiu supozo tamen estu ekskludita, ĉar mia fido pri la eterna boneco en la homoj ne permesas, ke tiaj homoj povu ekzisti.

Kun melankolio ni memoras pri la hele ekflamigita animekscitiĝo de la unuaj ses semajnoj post la eksplodo

de la milito. Ĝi forbloviĝis, ĝi devis forbloviĝi, ĉar la kutimigo sufokas ankaŭ la plej altan entuziasmon. Krome la homoj tiam vere estis pli bonaj, dume ni nun sufokiĝas je la komercista spirito kaj je la monenspezado. Sed kial ni ne havas kvar-aŭ sesfoje en la jaro tian kolosan entuziasmon, tian gigantan plialtigon de nia vivo? Tio dependas nur de ni mem. Miloj de diversaj ebloj ekzistas, kiuj havigas al ni tian altan leviĝon de niaj vivosentoj kaj ĉiuj ĉi ebloj estas pli noblaj kaj pli indaj al la homoj ol la milito. Kial ni ne uzas ilin? Kial ni ne serĉas ilin? Pro la timo vivi; pro la timo perdi nian ĉiam laŭ la horloĝo regulitan saman vojon al nia ĉiutaga okupo. Kaj se ni trovus neniun eblon entuziasmigi kaj ebriigi nin kune en amaso, tiukaze ni provu ĝin do ĉiu unuope solecaj kaj la miloj da diversaj ebloj pliiĝos al milionoj da ebloj. Kial kreantaj grandaj artistoj kaj diligentaj esploristoj de la scienco estas neniam militfuriozuloj? Tio ja pripensindu de ni.

Sed kion la ŝtato faru laŭ sia eco kiel subtenforto kaj kuntenilo de la individuoj por ne resti senaga kaj ne perdi la bridilojn? Tuj post la pacodeklaro la ŝtato altirante

kunvoku per ĉiuj siaj fortoj kaj ebloj ĉiujn energie agantajn, volfortajn, vivoĝojajn kaj vivjesigajn homojn el ĉiuj kultivitaj partoj de la mondo al si, de kie ajn ĝi povas ricevi ilin. Se la ŝtato rabus landojn, ĝi farus ĝin simile, sed la homoj estus malvolemaj kaj fariĝus ties plej furiozaj malamikoj kaj detruantoj. Kaj, se la ŝtato estos loginta tiujn libervole venintajn homojn al si, ĝi akceptu ilin tiel rapide kiel eblas en sia popola tuto. Koloniistoj ĉiam fariĝos la plej lojalaj civitanoj. La ŝtato tiru ilin en la interesojn kaj la politikon de l' popolo; ĝi zorgu, ke la lando fariĝu por ili vera patrio. Oni lasu pensi ĉiun, paroli kaj skribi, kion ŝi aŭ li volas kaj ĉiun alpreĝi tiun, kiun ŝi aŭ li volas alpreĝi sen limigi ties publikajn rajtojn. Oni ne postulu unue plurjaran restadan ateston de tia persono, sed kontrolo – sed ne eble eĉ per burokratoj – ties kapablecon kaj ties honestan volon fariĝi vera popolano. Per similaj agoj kreis saĝaj viroj mondokulturlandojn (Romia Imperio), Britlando, Usono kaj Francio (precipe tiu tion delonge intencas.) Germanio rapide kaj sen longa pripensado turilate superatutu ilin. Ĝi eĉ devos. Krome tia freŝa sangaldono ankoraŭ neniam damaĝis al popolo, sed ĉiam nur utilis. Kaj ĝi zorgu pri tio, ke al ĉiu plaĉu en

Germanio, por ke la novaj civitanoj ne eble eĉ foiru kaj kunprenu malnovajn. Ĉar tiukaze, se la diro: „Kie vi bonfartas, tie estas via patrolando!“ estus mensogo, kiel oni ĉiutage instruas al ni, jen hodiaŭ vivus ne pli ol dudek milionoj da germanoj kaj germane sangaj sole en Usono. La germana popolo pripensu sufiĉe frutempe, ke ĝi bezonos post tiu mondokatastrofo fervorajn kaj vivofortajn virojn aŭ ĉiuj ties venkoj estus senvaloraj kaj la tuta sango de ties kuraĝaj filoj estus fluinta vane.

tradukis la karaopaconoj Hans-Georg & Dorothea Kaiser kaj Frank Vohla en klubvesperoj laŭ „Furcht vor dem Leben“ . La artikolo aperis unuafoje en la gazeto „Ziegelbrenner“ (Brikofaristo), Unua jaro, unua decembro de la jaro 1917, kajero 2

Mortulaj kantadoj de Hyotamore de Kyrena

Unua Kantado

Vi priploras la mortintojn, ĉu? Malsaĝuloj vi estas!
Priploru la vivantojn kaj diru al tiuj: Benataj vi estas, ĉar vi estas mortaj!

Kial vi ploras pri mortintoj? Kial? Al vi okazis ja nenio, kaj mortinto estas sensenta. Kial vi do ploras? Ĉar ĝi kostas nenion. Ĉar ĝi aspektas bone. Ĉar ĝi estas kutima. Ĉar oni tiun, kiu ne kunploras, fifamigas kiel nesentemulon kaj ŝtonkorulon, kvankam li verŝajne estas la plej honesta inter vi, friponoj. Kial vi do ploras? Ĉar vi ankore sentas tiel, ĉar vi volas foje larmi el la plej granda profundo de via interno pri aferoj, kiuj efektive priplorindas. Vi do faras tion ĉe tiu favora okazo, ĉar vi ne devas honti kaj ne devas koncedi tion al iu, kial vi ploras efektive. Tial vi do larmas pri la mortintoj. Hipokrituloj vi estas en ĉiu kazo! Tiel aŭ tiel! Do larmu, se plaĉas al vi!

Sed mi diras al vi: Vivas mortuloj, kiuj estas pli vivantaj ol

vivantoj; kaj loĝas vivantoj inter vi, kiuj estas mortaj jam ekde ilia unua lerneja tago, kvankam ili diras al vi: 'Ni vivas, ĉar ni havas la potencon!'

La plej riĉa inter vi ĉiuj estas la mortinto; ĉu tiu ne havas pli ol li bezonas: La trankvilon, ĉu?

Pripensu, kiaj mizeruloj kaj kompatinduloj vi estas: La mortintojn vi florokronas kaj pribranĉetigas, vi vualas ilin en multekostajn vestojn, vi ornamas ilin per oro kaj juveloj, vi donas al ili multekostajn ĉerkojn el bonodoraj lignoj aŭ el arĝento, vi konstruas por ili stabilajn kriptojn, kvankam ili ne frostotremas, ne malsatas kaj de la pluvo ne malsekiĝas. Sed tiuj, kiuj vere malsatas kaj frostotremas kaj kvazaŭ rigidiĝas pro la ŝtormo, kiu vipas la maron, vi lasas senafliktite mortaĉi en mizero. Se la mortinto povus paroli al vi, estu certa pri tio, li dirus: 'Donu ĝin al ili, ĉar ŝovelpleno da kalko estas pli kara al mi ol funebra muziko.'

Vi faras multe da bruo kaj pompo ĉe funebraj procesioj. Tute serioze: Se vi celus per tio nur la mortinton, vi lasus tion. Ja, ĉu vi jam iam mediteme rigardis la vizaĝon de

homo, kiu mortis en dormo? Ne, vi ne faris tion. Se vi estus farinta tion, vi vualus la mortinton en krudan kaj malkaran tolaĵon kaj entombigus la mortinton silenteme kaj en nokta kvieto, sen kriado kaj sen trumpeta bruado en proksima agrosulko kaj havus tamen la puran kaj profundan konscion, plej alte honori la mortinton. Faru tion, homoj! La mortinto dankos tion al vi, ĉar ĝuste tiel la mortinto opiniis ĝin.

Ĉion havas la mortinto antaŭ la vivantoj, eĉ la plej valoran: la vivon.

Estu honestaj al vi mem: Funebro estas nenio alia krom la aflikto pri tio, ke la mortinto simple formortis antaŭ via nazo kaj postlasis al vi la devon lamenti kaj fari grandan kriadon. Tio estas nenio alia krom la ĉagreno pri tio, ke la mortinto rajtas esti gaja, se plaĉas al tiu, sen devi hipokriti.

Je kiom pli vi, homoj, fariĝus pli honestaj kaj pli decaj, se ne estus plu heredaĵoj!

Pri mia tute propra afero: Estas egale al mi, ĉu mi lastfoje

elspiras en kluba fotelo aŭ sur sterkejo. Tio estas flanka afero. Sed grava estas por mi, ke je tiu sankta farado neniŭ ĝenos min, nek la sanktoleo nek la ŝamano, nek la sorĉisto, nek la ĉefpastro, nek softa mano de tiuj, kiu atendas tion. Ĉar nenio superas la turmenton devi vidi je la okuloj, je la lipoj, je la prezentata kaliko: Tuj li estos trasuferinta ĝin! Mia senlime alta estimo al la besto, kiu kaŝiĝas, kaj kies mallaŭtan memkaŝadon ĉiuj aliaj bestoj honoras per tio, ke ili sen konfuziĝo manĝas plu, kopulacias kaj plezuriĝas per siaj ludoj.

La penso, ke mi ie povus revidi la tutan kanajlaron, kiu surtere superflue krucis mian vojon, instigus min morti neniam.

La lastaj vortoj de mortanto. Ne faru tro grandan bruon pri ĝi kaj ne eble eĉ sanktigu ĝin. Ĉar la lastaj vortoj ne plu estas ties propraj vortoj; estas parte jam la elspireto el alia stato, kiu ne havas komunan kun vi kaj via vivo. La lastajn vortoj de mortanto ankoraŭ neniam iu komprenis, kaj ankoraŭ neniam iu aŭdis. Sed tamen ili jam kaŭzis pli da misfortuno ol la vortoj de vivantoj. Kaj gardu vin pri homoj, kiujn vi protektas kaj alte estimas, aŭdi ties lastan

vorton! Ĝi povas renversi vian tutan vivosaĝon per silabo kaj vi staros ĉe tio sen helpo. La lastaj vortoj de mortinto estas ankoraŭ malpli gravaj ol tiuj de viro, kiu estas tute ebria.

Tiom longe, kiom la mortinto ankoraŭ ne diris: 'Do, nun vi ĉiuj kune povos leki min je la aŭ sur la – – !' li ankoraŭ ne estas tute morta kaj ĉiutage povos aperi al vi kiel fantomo. Sed, se la mortinto efektive diris ilin, tiukaze vi estos certaj kontraŭ ties reveno. Ĉar kun tia konvinko kaj kun tia emfazo povas diri tion nur iu, kiu eĉ ne plu la plej etan volas havi komune kun vi.

Iri en la morton por ideo aŭ por banala parolturno aŭ por iu nocio, kiu estas tute submetita al ŝanĝoj – kiel ĉiu nocio – , estas tute senvalora. La grasigita bovo faras la saman. Ofte estas eĉ ne via volo. La grasigita bovo ne nur faras la saman, li ankaŭ kapablas pri la sama. Kie tiukaze estas via grandio, kie via gloro? Pli grava kaj pli valora, sed tial ankaŭ multe pli malfacila estas: resti vivanta por ideo! Kompreneble: tion centestro ne povas komandi, eĉ, se li estus el Kapernaum. Kio do estas la plej granda? Tio, kio lasas komandi sin, aŭ tio, kio ne lasas komandi sin?

Decidu vi mem! Mi decidis min.

Al la mortinto estas tute egale, kial kaj pro kio kaj por kio oni mortis. Sed tio estas la ununura kaŭzo, kial la vivantoj reciproke persvadas sin, ke tio ne estas egala al la mortinto.

Kiaj mizeraj lamentaj figuroj vi estas, ke vi metas sur la mortinton la gigantan ŝarĝon: esti mortinta por vi! Ĉu vi ne hontas tiom malfaciligi al la mortinto lian vojon al la helaj sunaj altoj? Ĉar ĉiu el vi devas fari sufiĉe kaj pli ol sufiĉe por si mem kaj por sia propra persono por morti.

Posedus la mortinto, kiu mortis por vi – vi asertas tion, ne la mortinto – la kapablon, ankoraŭfoje morti por vi kaj viaj ridindaj ĥimeroj: estu tute certigitaj, la mortinto ne farus tion. Sed, homoj, kion vi farus en tiu kazo?

Je la maniero kiel popolo honoras siajn mortintojn kaj traktas, oni ekkonas la kulturan staton de tiu popolo, ĉu? Tute ne! Sed je tiu maniero kiel ĝi traktas siajn vivantojn.

La mortinto estas sankta al vi. Sankta, ĉu? Se la vivanto, ĉiu vivanto, estus same tiom sankta al vi, tiukaze vi estus

pli proksimaj al la dio.

Tuj se vi ekkomprenos, ke la morto ne estas fino, sed nur stato, nur intera ŝtupo de okazaĵoj, kiujn vi povas precize observi, kiujn vi povas rigardi je ĉiu esprimo de ekzisto per viaj propraj okuloj, tiukaze ne plu estos sklavo surtere. Kompreneble ankaŭ ne mastroj. La dioj antaŭe estos forvojaĝintaj.

Laŭso, kiu forlasas la korpon de mortinto, por serĉi alian paŝtejon, estas pli valora kaj pli dia ol la mortinto. Agu laŭ tiu koncepto, kaj vi neniam plu faros militon.

Se la mortinto tri tagojn post sia morto parolus nur unufoje ununuran vorton: jen mondo estus frakasita al vi, pli bela mondo leviĝus por vi! Pli bela, ĉar ĝi estus starigita sur vero kaj honesto kaj vi fervorege devus streĉi por ricevi rekompencan por viaj bonaj agoj.

Ĉar la mortinto post sia lasta korbato la kvar literojn „F“, „I“, „N“, „O“ ne plu povas elspiri, ĝuste tial estas eble regi la mondon per stulteco. Kaj nur tial ĝi entute regeblas.

Estu plena de amo kontraŭ la vivantoj, la mortintoj al vi

ja nenion donos por tio. Ili ne plu povos komerci per via amo kaj ne plu spici supon.

Parolu bone pri vivantoj. Pri mortintoj vi ne devas paroli bone; ili ne plu defendas sin. Kaj ĝi povas nek damaĝi al ili nek utili.

Ju malpi vi zorgos pri la mortinto des pli dankema tiu estos al vi. Provu! Ties plej alta feliĉo estas ja finfine ne esti plu molestata de vi.

Lasta kantado

Patrino! Vi ploras pri via mortinta filo, ĉu? Tion vi diras. Sed vi ploras pri vi mem, ĉar li lasis vin sola. Do temas pri egoismo. Kaj egoismo estas laŭhoma kaj klarigebla kaj komprenebla, sed nobla ĝi ne estas. Kaj tial mi povas nek honori nek laŭdi vian doloron. Do, ne ĉagreniĝu pri mi. Vi konfuzas la nociojn, ne mi. Sed: Mi ankoraŭ ne estis patrino; kaj tial mi silentas.

Tradukis la karapacanoj Dorothea & Hans-Georg Kaiser & Frank Vohla laŭ „Totengesänge des Hyotamore von Kyrena“ el la gazeto „Der Ziegelbrenner“ (Brikofaristo 2-a jaro kajero 3, 16-a de marto en la jaro 1918)

FABELO

Kundar

LA BRIKOFARISTO

4-a jaro 30-a de apilo 1920 Kajero 26/34

Kundar

La unua libro

Renkontoj

La Brikofaristo-eldonejo

Libro,

verkita por la germanoj.

Libro verkita en tempo de la ploroj; en tempo de la plej profunda humiligo, kiam la esperoj de la juneco kaj la afliktoj de la maljuneco estas aĉetebaj por mono; en tempo, kiam la mensogo estas varo, kiu enspezigas la plej altan monogajnon kaj la plej grandan potencon; en tempo, kiam oni laŭrokronas la murdistojn de veraj homoj; en tempo, kiam oni ŝakras oficojn kaj honorojn kiel bonan predon al tiuj, kiuj ofertas kiel ŝanĝvaloron, malhumanecon, kruelecon, venĝavidon kaj avidon pri posedo; en tempo, kiam la parolado de honesta viro estas sufokata en homsango kaj per besteca perforto; en tempo, kiam la plej fiaj perfortoj el tiuj tagoj, kiujn supozis esperoĝojaj kaj noblaj homoj jam delonge forgesitaj kaj superitaj, denove estas instalitaj por juĝi kaj regi.

Libro ne verkita per la demando: Kiam venos la savonto en tiun ĉi landon? Sed libro verkita por la germanoj kun la certeco, ke la savonto estas survoje! Malfermigu vaste la pordegojn por enlasi lin! Pretigu viajn urbojn por lin

akcepti!

La viro Kundar ne staris en la mondo.

Kaj tion li ne sciis.

Li ne memoris, ĉu iam eble estis tempo, en kiu liaj pensoj krucis sin kun tiuj, kiuj flugas facilmove tien kaj tien inter la sataj kaj la malsataj.

Li ankaŭ ne pensadis pri sia tago.

Se li vere revis, tiukaze tio povis esti same tiel bone sia vera vivo, kiel povis estis tiu estado, kiun Suno ŝajne pli forte prilumas, kaj kiu fakte estas revo.

Burĝonoj estis ĉirkaŭe kaj floroj ĉie.

Blankaj marmorpalacoj en granda foro.

Oraj kupoloj kaj altaj sveltaj turetoj kun verdaj pintoj.

Tra la ununura nemezurebla ĝardeno el flameganta pompo paŝis Kundar, la viro, kun longa rapida fuĝema rapidado.

Subite li haltis.

Kaj en profunde orobruna florkaliko li ekvidis inon.

Ŝi sidis sur alta gracila trono.

Ŝi portis veston el verda brilado. Kaj miriadoj da brilegantaj kaj trembrilaj diamantoj, en kiuj ludis Suno kun miloj da kvazaŭ ŝprucantaj lumoj, estis disŝutigitaj sur la ondantan veston.

Kaj sidis la ino sur alta gracila trono.

Ŝi glitigis siajn delikatajn ĉarmajn blankajn kaj vejnostriitajn manojn tra sia vasta hararo. La hararo flirtis, se la florkaliko mallaŭte sonoriis pro vaganta zefiro, kiu portis la spiron de la maro.

Kaj Kunder kliniĝis kaj rigardis la inon.

Kaj ŝi hororiĝis sub la konsumanta rigardo, ŝi vualis sin intense kaj firme en sian ondantan hararon kaj poste kuntiriĝis al fruktopromesa delikate formita svarmado de kronetoj kaj sceprotoj de malaperintaj reĝoj.

Kaj Kunder parolis: „Kial vi postkuras min, aŭreolvestita

kaj trembrila damo?“

Kaj li aŭdis vokantan fajnan voĉeton: „Ne konduku min el mia florejo, el mia floroĝardeno en fridgetan mizeran landon; kaj atentu, ke mi volas kroni vian vivon kun ĉiam malfermitaj okuloj por la aferoj de l' mondo kaj por la vero de l' vivantoj kaj mi volas doni al vi lastan tagon, kiu estos por vi promeso!“

Kaj Kunder vokis: „Kiu tie estas? Parolu plu kaj permesu aŭdi vian dolĉan voĉon kaj mi volas pensi de nun pri nenio plu krom pri vi, aŭreolvestita damo!“

Jen Kunder turniĝis kaj estis malĝoja.

Froste kaj malseke iris la vento.

Kaj kiam Kunder levis la okulojn, jen rigardu, li staris en kota strateto. Kaj estis multe da popolo ĉirkaŭ li.

Kaj la popolo ridis kaj mokis lin.

La infanoj tiris lin je lia vesto, ili blekis kaj kriis.

La inoj havis suĉinfanojn sur siaj brakoj kaj rikanis al li kaj karesis siajn infanojn kaj diris al ili: „Mia kara infano, ke vi ne fariĝu kiel tiu tie, ĉar li estas fia ĉifonulo kaj li ŝtelas la tagojn de l' mondo kaj ne laboras kaj neniam havas ruĝan pfenigon kaj neniun panon por manĝi.“ Kaj la inoj kisis siajn infanetojn kaj lulis ilin kaj gardis ilin kontraŭ la rigardoj de la perduto.

Viroj staris apogite kontraŭ la muroj. Leĝere. Ili levis la brovojn kaj larĝigis kaj dikigis la buŝojn tiel, ke ili ekhavis grimacojn. Kaj ili ŝmacis per la lipoj, rigardis sin reciproke, gestis al Kundar kaj diris: „Hm! Hm!“

Ekdoloris io en Kundar. Estis al li, kvazaŭ en lia koro io dissaltus kaj kvazaŭ gutus sango el lia koro en lian ardantan animon.

Kaj lia animo brulis.

Trista tago plenigis la strateton.

Kaj li frostetis.

Kaj tiam li forkuris kiel ĉasata homo.

Kaj la infanoj postkriis lin: „Fi-ĉifonulo! Fi-ĉifonulo! Kiu
aĉetas de ni la fi-ĉifonulon?!“

La sonoriloj profunde sonoris. Ruliĝanta obtuza tambura
rulado plenigis la stratetojn.

Oni portis reĝon al la tombo.

La homoj staris sur la stratoj kaj rigardis indifere.
Kelkaj el la maljunulinoj ploris. Infanoj ridis kaj petole
luktis, kaj la patrinoj vokis al ili: „Silentu, ŝafidetoj, la
reĝo estas morta.“

„Morta“, diris knabo. „Kio estas morta? Diru al mi,
patrino, kio estas morta?“ Kaj tiam li kriĉe vokis al la
infanoj: „Venu, venu al mi, ni ludu morta!“

Jen diris la patrinoj kun hastaj voĉoj: „Fine eksilentu,
malgrandaj kriuloj, jen venas la reĝo!“

Multaj surgenuiĝis kaj klinis siajn kapojn teren.

Antaŭe rajdis dek du heroldoj kun longaj trumpetoj, kiujn
ili apogis sur siaj genuoj. Ĉiufoje post cent paŝoj ili levis
per subita movo la trumpeton al siaj lipoj kaj blovis
mallongajn akrajn signalsonojn. Poste ili denove demetis
la trumpetojn kaj starigis ilin per firma movo sur siajn

genuojn.

Post la heroldoj piede venis la tamburistoj. Ili tamburis neinterrompitan samtaktan ruladon.

Post la rulado de la tamburoj sekvis kvar rajdistoj, ili havis je ambaŭ flankoj de la ĉevalo rondajn kuprajn timbalojn kaj tiuj donis obtuzajn sonojn, kiuj malgaje tondris intere.

Poste alvenis la knabaj lakeoj en nigraj malvaste kunŝnuritaj silkaj vestoj. Ili portis antaŭ si malhele ruĝajn velurajn kusenojn.

Kaj unu el ili portis sur sia kuseno la kronon. Tiu estis nur unusola ringo el oro kaj ĝi havis je la antaŭa rando grandan bluan pompan gemon. Kaj la homoj en la strateto, preter kiuj oni portis la kronon, diris mallaŭte antaŭ sin: „La pezan kronon li fordonis, kiam la popolo malsatis kaj li parolis, ke savi homon estas pli farite ol havi oron kaj honoron.“

Jen alvenis alia knaba lakeo, kiu portis sur sia kuseno la sceptron. Kaj ĝi estis el fraksena ligno kaj skulptis ĝin

karbisto. Kaj al tiu la reĝo do parolis: „Vi estas homo, karbisto, kaj mi estas homo, bona kiel vi kaj malbona kiel vi. Kiel mi portu la signon de juĝisto en la manoj, kvankam neniu homo surtere povas esti juĝisto kontraŭ alia homo? Kiel mi arogu al mi la potencon eldiri verdikton por ekzekuto per hakilo aŭ ekzekuto per ŝnuro aŭ por enkaĝigo de homoj? Se vi havas kverelon pri viaj agroj, tiukaze mi volas mezuri kaj taksi kaj paroli mian diron. Sed tiuj, kiuj havas oficon en tiu ĉi lando, estas pli fortaj ol mi kaj tiuj ne agas tiel, ĉar ili estas plenaj de avido.“

Kaj venis alia lakeo, kiu portis sur sia velura kuseno mirindan feran kesteton. En ĝi estis la reĝaj juveloj. Tiuj aspektis veigaj kaj forlasitaj. Sed eĉ pli veigaj kaj eĉ pli malĝojigaj aspektis la etaj oraj ŝuoj, kiujn la reĝo portis kiel infano.

Kaj kvina lakeo portis sur sia kuseno grandan libron kun arĝentaj protektogarnaĵoj kaj fermitan per malvastaj rigloj. La lakeo kun la libro sekvis la mortan reĝon kaj oni intencis forbruligi la libron kun li; ĉar li skribis en ĝin dum ĉiu tago de sia vivo ĉion, kion li faris

kaj kion li vidis, ĉar neniu homo eksciis, kion la reĝo skribis en solecaj horoj. Kaj tiun libron oni nun portis kun li al la tombo. Tiel ordonis la konsilistaro, sed ankaŭ la reĝo, sed ambaŭ tamen pro diversaj kialoj.

Sesa portis la krudan toltukon, el kiu la reĝo ĉiujare disĵetis mem la semon por peco da tero, kiu donis al li la grajnopanon.

Sepa portis la glavon de la reĝo. Kaj la glavo je duono estis tiritita el la ingo, por ke ĉiu el la popolo vidu, ke ĝi estas rustita.

Oka kondukis per simpla ledobridilo la rajdoĉevalon de la reĝo. Ĝi hufobatis senpacience.

Naŭa per ŝnuro kondukis la hirtan plej preferatan hundon de la reĝo. Kaj en la tuta procesio estis neniu, kiu malĝojis tiom, kiom tiu malbela hundo.

Poste sekvis la reĝo.

Ok viroj portis la glatan simplan ĉerkon kaj po ok viroj iris en ĉiu vico unu apud la alia.

La ĉerko ne havis tegmenton; kaj tial la kadavro de la reĝo kuŝis malfermita por ĉiu rigardo.

Malantaŭ li iris la marŝaloj, la konsilistoj kaj mastroj. Ĉiuj en grizaj vestaĵoj kun altaj verdaj ĉapeloj kaj blankaj antaŭtukoj. Ili rigardis respektige kaj ĉiu el ili pensis ion alian, neniu pri la morta reĝo, sed certe la plej multaj pri la estonta.

Sur ambaŭ flankoj de la procesio kaj en grupo je la fino marŝis la gvardianoj vestitaj en siaj malhele bluaj kaj nigre kunŝnuritaj vestoj kaj kun surŝultraj fusiloj. Ili iris firme egalpaŝe kaj nek rigardis dekstren nek maldekstren. Se trudiĝema knabo urĝis kaj kaptis ilin je vestofinaĵo aŭ kaptis ilian mallongan bajoneton, ili diris kun grumbla retenita voĉo: „Tuj foriru, diabla bubo, mi fortranĉos vian orgojlan nazon, knabo.“ Jen la knaboj ekkriĉis kaj fuĝis.

Kaj tute malantaŭe iris Kunder. Tute sola, kiel lasta. Kun la plej malgajaj okuloj kaj kun profunde pendantaj ŝultroj. Li aŭdis frustradon el ĉiuj pordoj kaj pordegaj vojoj kaj anguloj: „Rigardu, ho, rigardu, tie iras la viro Kunder, rigardu nur, rigardu, ankaŭ li iras kun la morta

reĝo al la tombo. Ĉu vi bone vidas tion?“ Kaj li aŭdis la respondon: „Ni vidas ĝin, jes ja!“

La strato krute ascendis. La krude ŝtona pavimo de la urbaj stratetoj finiĝis tie. Oni aŭdis la grincantan sablon sub la samtaktaj paŝoj. Kaj intere tra ĝi sonis de la urbeto pli kaj pli postrestanta la longe postsonantaj sonoriloj. Ili perdiĝis pli kaj pli mallaŭte en la tamburoj kaj timbaloj kaj fanfaroj.

Alte sur la monto troviĝis eta preĝejo. En ties kripto oni konservadis la urnojn, kiuj entenas la cindron de la reĝoj.

Sur la verda placo antaŭ la preĝejo estis surtavoligita ŝtiparo el delikate odorantaj lignoj.

Oni levis la reĝon softe kiel dormanton sur la grandan monton el lignoj. La griza hararo de la reĝo flirtis en la vento.

Jen la vila malbela hundo terure ekbojis kaj hurlis. Ĝi deŝiris sin de la ŝnuro, saltis inter la ŝtipojn de la ŝtiparo kaj oni ne plu vidis ĝin.

La lakeo, kiu ĝin gvidis, volis sekvi ĝin. Sed unu el la marŝaloj vidis tion kaj vokis ordonante: „Lakeo!“

Jen la lakeo revenis kaj oni lasis la hundon, ĉar neniu alia krome troviĝis, kiu estus farinta la saman kiel tiu hundo, kaj tamen ĉiu el la popolo diris, ke li amis la reĝon.

Jen oni aŭdis la kantadojn por la mortinto kaj la longe plendantajn vokojn laŭ lernitaj rimoj. Ili sonoritis tra la lando kaj perdiĝis en la foraj sonoj de la sonoriloj.

Kundar staris tute malantaŭe.

Kiam la ligna monteto ekflamis je la unua fojo, kiam la reĝo unuan fojon moviĝis, kiam la hararo bruldifektiĝis kaj la aero estis plenigita per la delikataj odoroj de la flamantaj lignoj, jen Kundar vidis sidi maljunan viron ĉe flanko de la vojo.

Kaj Kundar iris al li kaj diris: „Amiko, kia entombigo estas tiu?“

Kaj la maljunulo diris: „Vi pravas, amiko, kia entombigo estas tiu!“

Kaj Kundar vidis kun granda ĝojo: La maljunulo havis mirigajn, profunde brilajn okulojn. Tiuj bonfartigis lin senfine kaj li ekamis la viron kaj diris al li: „Tio estas la entombigo de reĝo! Ve, tio estas morto de reĝo! Ĉu ne estas tiel, kvazaŭ kolektiĝis nur multaj komercistoj, kiuj finis negocon ĝustatempe kaj honeste kaj kun neta enspezo? Kaj neniuj ploras. Kaj mi estas fremdulo ĉi tie kaj ĝi aflikta min. Ĉu la reĝo ne meritas almenaŭ unu amikon, kiu ploras pro li?“

Jen diris la maljunulo: „Ĉiam reĝo meritas amikon, sed

ĉu reĝo kiam ajn havis amikon? Ĉu iam ajn ploris amiko pri reĝo? Se ne la grumo priplendas la morton, ĉar la reĝo pagis al li per valorplena monero kaj ĉar li nun devos vagi aliloken.“

Jen diris Kundar: „Eĉ ne unu amikon, eĉ ne unu amikon en la vivo! Kaj tamen reĝo. Ankaŭ mi ne havas amikon, mi estas tute sola.“

Jen diris la maljunulo: „Tial vi do estas reĝo, kvankam vi ne portas reĝajn vestojn kaj ne loĝas en reĝaj loĝejoj.“

Jen diris Kundar: „Sed mi portas ja reĝajn vestojn kaj mi loĝas ja en reĝaj loĝejoj. Neniun amikon! Mi neniam havis amikon! Ĝoju pri tio, ho, homo!“

Jen diris la maljunulo: „Reĝo estas homo! Homo estas reĝo! Certe, homo, ĝoju do pri tio, ĉar vi ekkonas tion.“

„Sed ĉu li ne havas filon, kiu sekvos lin?“, demandis Kundar.

„Kaj se li havus iun, ĉu li ne ridus, ĉar lia patro mortis kaj li estas la heredanto? La hundo ploras pri la homo, ne la

filo, kaj ne la amiko, kaj ne la edzino.

Kaj Kunder diris: „Kiu estas do reĝo en la lando?“

Jen diris la maljunulo: „Knabineto, virgulineto, la filino de la reĝo. Ĉu vi ne konas ŝin, amiko?“

Jen diris Kunder trankvile: „Certe mi konas ŝin, ŝi estas la aŭreolvestita ino. Ĉu ne?“

Jen diris la maljunulo: „Ŝi estas kaj tamen vi estas fremdulo.“

Jen Kunder eksilentis kaj diris: „Ne, ŝi ne povas kuniri al la tombejo, ŝi havas dolorantajn piedojn.“

Jen diris la maljunulo: „Jes ja, ŝiaj piedoj sangas. Ĉiu homo, kiu serĉas, havas sangantajn piedojn pro multo da irado.“

Jen diris Kunder: „Se ŝiaj piedoj sangas, mi devus plori pro senfina doloro, kaj tamen mi volas jubili pro beateco. Ho, maljunulo, mi ne scias, kiel mi fartas.“

Jen diris la maljunulo: „Ŝiaj piedoj estas vunditaj kaj doloras kaj sangas, sed eĉ, se ili ne sangus, ŝi tamen ne povus kuniri al la tombejo, ĉar ĝuste en tiu horo la juna reĝino naskas infaneton.“

„Tio ne povas esti“, diris Kundar mirigite. „Kiel tio povus esti? La juna reĝino ja ankoraŭ ne amaris, ĉu ne?“

Jen diris la maljunulo: „Kaj tamen tiel estas. Ŝi naskas infanon. Ĉar tiel la konsilistoj kaj mastroj ordonis ĝin: Ili diras, ke tio devas esti tiel, ĉar la bonfarto de la popolo postulas tiun ordonon.“

Jen diris Kundar: „La reĝino naskas infaneton. Kiel tio povas esti?! Kiel tio povas esti?!“

Jen diris la maljunulo: „Jes ja, fremdulo, eble dolorigas vin enkore aŭdi tion, ho, mi scias. Sed pli doloriga ol via koro doloras je tiu horo tiu de la reĝino, ĉar tion vi ne scias: 'Ŝi tranĉas la infaneton mem el sia koro.'“

„Ĉu el la koro? Ĉu el la propra koro?“ diris Kundar kun miro.

„El la propra koro. Ve, kian doloron ŝi suferas.“

„Ho, kian doloron la homo suferas, kiu ekkonas, ke li estas homo inter tiaj, kiaj ne estas homoj“, diris la maljunulo kun trankvila voĉo.

„Sed kio nun?“ demandis Kundar.

Jen diris la maljunulo: „Ne zorgu, amiko, ĉu ne ankaŭ vi estas ŝia koro? Vi estas ja mem. Vi, Kundar, vi kaj la aŭreolvestita ino. Estu vi mem! Vi estas ŝia koro!“

Subite estis senfina ĝojo en Kundar!

Kaj li rigardis supren kaj li rigardis en la brilajn okulojn de la maljunulo, kiuj bonfartigis lin. Kaj li tre miris: Ne estis okuloj, estis nemezureble profundaj kavoj, kiuj tiel vaste kaj profunde etendiĝis internen, kvazaŭ ili devus sufiĉi kun certeco trans ĉiujn marojn. Jen profunda peza tenebro, kiu troviĝis en la okulaj kavoj. Kaj la tenebro impetis kaj estis plena kaj satigita de eterneco, tiel, ke ĝi brilis grandioze al li simila al mirindaj nigraj steloj.

Kundar levis siajn okulojn kaj jen: la ligna monteto

ekflamegis antaŭ la ĉielo kaj la reĝo rektiĝis, leviĝis alte en la flamoj, turnis flanken kaj falis.

Kaj kiam tio okazis, Kunder rigardis ĉirkaŭ si kaj jen: Ne estis homo tie, la granda stranga kunstarantaro estis haste disirinta.

Li volis demandi la maljunulon. Sed ankaŭ la maljunulon li ne trovis plu.

Kaj kiom ajn longe liaj okuloj rigardis, li ne vidis foriri aŭ veni iun.

Granda pramalnova ŝtono kuŝis je lia flanko.

La maljunulo sidis sur ĝi.

Kaj Kunder sidigis sin sur la ŝtonon, rigardis malsupren en la vastan pejzaĝon kaj vidis malproksime lumi ĉarman urbon en la subiranta Suno.

Suno flamegis kun kvazaŭ ŝprucantaj flamoj.

Grizaj krepuskaj vualoj vagadis trans la nebule

tremantajn kampojn, kaj profunde bluaj brilantaj longaj vicoj de altaj popoloj tranĉis sin en la ebenon.

Ankoraŭ nun sonoris la sonoriloj mallaŭte supren el la urbo.

Kaj Kandar diris: „Nun mi foriru por dormi. Mia domo ne estas malproksima kaj mia ripozejo estas ekipita por la nokto.“

Kaj li kuŝiĝis apud la ŝtono por dormo.

Kaj li parolis en la sonĝo kaj do diris: „Ho, kiom longa estas la tago, kaj la homo haste rapidas kaj li tamen neniam preterkuros ĝin!“

Forĝejo staris ĉe la kampara ŝoseo malproksime de la vilaĝo.

Transe ĉe la arbaro, en alta herbejo kuŝis la viro Kunder kun brakoj metitaj sub la kapon kaj genuoj suprentiritaj, li rigardis per beataj okuloj en la ridantan bluan ĉielon kaj de tempo al tempo palpebrumis transen al la vaste malfermita forĝejo, kie la forĝisto kaj siaj helpantoj anhelis ĉe la fajro kaj kun kolero traktis la kontraŭstareman feron. La fero fariĝis malica kaj ruĝa pro kolero, ĉar ĝi volis konserviĝi tia, kia ĝi estis kaj ne volis fariĝi tia, kia la forĝisto ĝin celis havi. Kaj ĉiujn ĉi multajn blankarde lumantajn steletojn kolektitajn dum multaj miloj da jaroj de la fero, tiu nun elĵetis kaj krakade ŝprucigis sur la nudajn brustojn de la forĝistoj kaj en ties okulojn tiel, ke la forĝistoj kriis: „Damnita fifero, mi ja instruos vin!“ Kaj tial ili martelis pli kaj pli kolere sur la feron.

Kaj kiam Kunder jam certan tempon palpebrume rigardis transen al la ŝvitantaj, vaporantaj fulgokovritaj kaj streĉege laborantaj koleraj viroj, denove li levis siajn

okulojn supren en la ĉielon, kiu jubilis sate klare, Kundar fariĝis des pli elkore ĝoja trans ĉiujn sensojn pri la pura, blue volbigita alta vasto, kiu ampleksis la tutan universon.

„Mondo mia! Mondo mia! Kaj mi estas ties filo kaj ties homo kaj ties reĝo“, ĝi jubilis en lia animo.

Kaj kiam li estis tiel ĝoja kaj ĉio ĉirkaŭ li ŝajnis sankta, kvazaŭ Dio promenus surtere, jen rigardu – alrajdis ino.

Falko sidis sur ŝultro de la ino, ne katenita.

Antaŭ la forĝejo ŝi haltis.

Sed neniu elvenis por priservi ŝin.

Jen Kundar alsaltis kaj diris: „Nobla damo, akceptu plej afable mian helpon. Ĉu vi deziras tion?“

Kaj la ino parolis: „Dankon al vi, sinjoro nobla, kun ĝojo mi akceptas vian helpeme etenditan fortan manon.“

Kaj ŝi konfide apogis sin surbrake de li. Kaj ŝi ne vidis, ke

liaj ŝuoj estis disŝiritaj kaj lia vesto sovaĝa miksaĵo el trivitaj ŝiraĵoj.

Jen alvenis la forĝisto, purviŝadis la varmegajn manojn per siaj manikoj, demetis la ledan ĉapon kaj diris: „Je via servo!“

„Vi alvenas malfrue, majstro forĝisto! Malfrue!“ ŝi diris, „sed laboro senkulpigas ĉiam kaj ĉion, tion mi opinias, por ke mi ne ofendu vin. Rigardu mian ĉevalon, ĝi perdis hufoferon, kaj ĝiaj hufoj estas doloremaj kiel mano de knabineto. Surnajlu novan feron, majstro forĝisto.“

Jen diris la forĝisto: „Je via servo! Sed kie estas via servisto?“

Jen diris la ino: „Miaj servistoj ŝajne perdis min. Sed vi celas la pagon. Jen prenu tiun valorŝtonon.“

Kaj ŝi prenis de ora ĉeneto, portata ĉirkaŭ sia kolo, brilan belegan smeraldon.

La forĝisto rigardis la juvelon kaj diris: „Bela juvelo, efektive bela valorŝtono! Tian belan juvelon mi ne vidis

dum mia tuta vivo. Efektive, bela ŝtono.“

Jen diris la ino: „Vi havu la ŝtonon, se vi hufoferas mian ĉevalon.“

Jen diris la forĝisto: „Ne, tio kostas kvar pfenigojn da bona regna monero; kvar pfenigojn kaj ne pfenigon pli aŭ malpli. Tiel estas laŭ gilda regularo, kaj tiel estas ĉiam.“

Jen diris la ino: „Sed la ŝtono validas mil orajn guldenojn.“

Jen diris la forĝisto: „Certe. Vi ja diras, tial estas la vero. Sed mi ne povas manĝi ĝin. Mi ne povas trinki ĝin kaj mi eĉ ne povas aĉeti por mia edzino tuforubandon, ĉar la komercisto ne akceptus ĝin.“

Jen diris la ino: „Nu do, majstro forĝisto, do ĝoju pri ĝi festtage aŭ kiam ajn krome vi emos.“

Jen diris la forĝisto: „Por tio mi ne havas tempon, mi ĉiam devas labori. Kaj se la ŝtono estus el vitro, ĉu? Kio tiukaze?“

Jen diris la ino: „Kaj eĉ, se ĝi estus el vitro, ĉu ĝi ne estas bela? Ĉu vi ne vidas, kiel mil sunoj briletas en ĝi?!“

Jen diris la forĝisto: „Tiujn mi vidus pli bone en mia forĝeja fajro kaj tiukaze mi scius, kio ĝi estas. Ĉu vi ne havas kvar pfenigojn? Tiukaze iru kun Dio, mi devas fari mian laboron.“

Kaj post kiam li diris tion, li turnis sin kaj iris al sia amboso, kie oni tuj poste povis vidi, kiel li kun siaj kunuloj forĝas per svingoplenaj duoblobatoj pezan ringon.

Jen diris la ino: „Kion ni nun faru?“

„He“, diris Kunder. „Mi volas fari al via bela besto feron tian delikatan kaj bonan, ke ĝi mole iru kaj kiel sur juna mola herbejo.“

Kaj li ŝiris grandan pecon el sia jako kaj firme kaj lerte ligis la ĉifonon ĉirkaŭ la hufon de la ĉevalo.

Kun rideto la ino observis lin.

Kiam li estis preta, li diris: „Ĉu la hufo de tiu grandioza besto el Arabio ne valoras cent- kaj milfoje pli ol mia malnova jako?! Kaj ĉu mia jako povus sperti pli grandan honoron ol protekti la piedon de tiu nobla ĉevalo?!“

„Ĉu tio estas via sola jako?“ demandis la ino.

„Se ĝi ne estus la sola, ho, kiom da zorgoj mi havus! Feliĉe ĝi estas mia ununura. Kion mi havas ĉi tie ĉe mi, kaj kion mi portas ĉi tie je mia korpo, estas mia tuta posedo, kaj tie, kie mi staras kun miaj ambaŭ piedoj, tie estas mia lando kaj mia reĝlando. Laŭdata estu Dio! Ĉu iam reĝo posedis pli?!“

Ŝi ridetis kviete kaj diris nenion.

Kaj li levis ŝin sur la ĉevalon, kaptis la ĉevalon je la bridilo kaj kondukis ĝin zorge sur la straton.

Jen la forĝisto venis el la pordo kaj vokis: „Ĉu vi vojaĝos malproksimen kun jubilo, ĉifonkunulo! Ŝtelisto de la tagoj de Dio! Sundiboĉulo! Prisorĉisto de damoj! Kuzo de l' diablo! Hehe kaj haha, kun jubilo kaj kantado kaj gloro! Tordisto de malsatŝnuro!“

Jen demandis la ino: „Kiun celas la forĝisto?!“

„Min!“ diris Kunder senzorge. „Ja kiun alian krom mi?“

Pri tio la ino elkore ekĝojis, ke li ne diris, ke li ne scias tion.

Kiam ili nun survojis, diris la ino: „Vi estas la kantisto Kunder, ĉu ne?“

Jen li diris: „Jes ja, mi estas la kantisto Kunder, tiu mi certe estas. Kaj vi estas la reĝidino, ĉu ne?“

Jen diris la ino: „Jes ja, mi estas.“ Kaj ŝi aldonis: „Sed Kunder, amiko mia, rigardu min foje! Ĉu vi do ne konas min?“

„Ja, kompreneble mi konas vin! Vi estas la aŭreolvestita damo kun la sanganta koro kaj la vunditaj piedoj. Vi estas ŝi.“

Kaj li kliniĝis malsupren al unu el ŝiaj piedoj.

Jen ŝi diris: „Ĉu vi havas kanteton por mi, Kunder?“

Kaj li respondis: „Por vi ĉiujn miajn kantojn. Mi tuj rigardos en mia kesto.“

*Avenis birdoj kriantaj
de fora mara strand'.
Rajdistoj venis irantaj
tra la vasta land'.
Knabino venis de l' monto
malsupren do sen esper'.
Amat' post murd-renkonto
jam kuŝas nun en la ter'.
Tri ruĝaj rozoj floras,
tri hiacintoj sur ĝi.
Nur ardo plu enkoras.
Karul', vi mankas al mi.*

*Migras mi do, migras sen vi.
Kion mi revu? Diru al mi.
Pri via ore bruna silka harar'.
forpasis jam jaroj kaj jar'.
Ho kara, neniam mi trovos vin,
Mi mortas je l' kor' pro la mank' de anim'.*

Jen la ino fariĝis tre silentema.

Kaj kiam ili jam denove iris certan tempon, diris Kundar:

„Rigardu, reĝino, tie transe estas via urbo!“

Kaj la urbo troviĝis en la foro en sunsubiro kaj lumis kiel flama maro.

Kaj jen diris la ino: „Mi devas danki al vi dufoje, Kundar. Prenu tiun belegan safiron el Hindujo kaj la oran kolĉeneton! Ne kiel pagon, Kundar. Ja kiu sur la vasta tero kapablas pagi vin, amiko mia. Ne kiel pagon, sed prenu ambaŭ el mia mano kiel honorigon de la kantisto kaj de la plejkarulo de belaj damoj. Ĉu vi volas?“

Kaj Kundar prenis la mirinde belan valorŝtonon el Hindujo, lasis brili ĝin en la ruĝa suno, prenis la oran kolĉeneton, tenis ĝin alte sur mano antaŭ si, lasis ĝin karesige gliti tra la fingroj, metis ĝin al vango; poste li denove tenis ĝin alte antaŭ si, glitigis siajn okulojn kareseme sur ĝi kaj poste redonis ĝin al la ino kun beata vizaĝo.

Li diris: „Nun mi havas mian honorigon por ĉiam, reĝino aŭreolvestita! Pli da honorigo mi neniam povus ricevi.“

Jen diris la ino: „Mi supozas scii, kion vi diras, Kundar,

amiko mia!“

Li prenis la oran kolĉeneton kaj la mirinde belan juvelon el Hindujo kaj ĵetis ambaŭ vastarke malsupren en la riveron.

Ŝi diris: „Kundar, neniuj homoj denove tenu enmane aŭ vidu per la okuloj tion, kio vin beatigis, Kundar!“

Jen diris Kundar: „Dankon al vi, nobla damo, nun ĝi estas eterne mia!“

Kaj kiam ili denove iris dum certa tempo, diris la ino: „Aŭskultu, Kundar, mi havas malgrandan ĉarman ĉaskasteleton en la arbaro; ĝi situas belege apud lago. Mi donos ĝin al vi, kaj donos al vi krome kvin orajn guldenojn dum ĉiu lundo. Prenu ĝin de mi, Kundar.“

Kundar ne respondis.

Kaj kiam ili denove iris dum certa tempo, li diris: „Ĉu vi estus kolera, nobla damo, se mi dirus, ke ne? Prefere, mi petas vin, ne kolera, mi prefere el mia tuta koro volus diri, ke ne.“

„Diru laŭ via plaĉo, kiel ajn, Kundar. Sed vi farus al mi grandan ĝojon, se vi sciigus deziron al mi.“

Jen diris Kundar: „Nu, do, se ĝojigas vin, lasu min trinki el kristala pokalo oran vinon kaj permesu manĝi panon al mi el pelvo de pura oro kaj permesu al mi preni fruktojn el pelvo de majstro skulptita el ununura opalo kaj permesu al mi ripozi dum horo sur la plej bela tapiŝo el la orientlando.“

Jen diris la damo: „Estu tiel, kaj mia ĝojo estas granda.“

Kaj kiam ŝi diris tion, brilis ŝiaj okuloj kiel du gvidaj steloj al migranto en profunde malhela nokto.

Kaj ŝi diris: „Rigardu, jen venas miaj servistoj!“

Kaj kiam la servistoj proksimiĝis, ŝi diris al ili: „Tiu nobla granda sinjoro kondukis min, kiam vi ne ĉeestis, tiu nobla granda sinjoro nun kondukos min ankaŭ en mian burĝon, kie vi ĉiuj estu je dispono. For! Antaŭen! Kaj preparu mian alvenon!“

Kaj la servistoj haste forkuris.

Kiam la ino nun venis en la burgon, ŝi diris: „Oni konduku tiun noblan kaj moŝtan sinjoron en mian loĝejon, nokte oni sonigu en la burga ĝardeno la violonojn, flutojn kaj ŝalmojn. Oni alportu la plej belan kaj plej klaran kristalpokalon kun verdeta brileto kaj oran kruĉon kun kvincentjara vino. Kaj oni alportu oran pelvon kun pano kaj dolĉaj migdaloj. Kaj oni alportu raran pelvon de majstro skulptita el ununura opalo, kaj oni alportu ĝin plenigita per la plej rafinitaj fruktoj el la landoj de la egipta maro. Kaj oni alportu tiun grandan pelvon ĉizitan el la arĝentaj defendoŝildoj de la reĝo Heimdyl. Kaj oni alportu ilin plenigitaj per bone odorantaj parfumakvoj, por ke oni verŝu ĝin sur la manojn. Kaj fine oni alportu la tapiŝon de reĝo de Asirio. Se ĉio tio estos okazinta, ekde tiu sankta momento, mi ne plu volos esti ĝenata de iu! Jen mia ordono!“

Kaj el ĉiuj ĉambroj, el ĉiuj irejoj, haloj kaj kortegoj eksonis la voko perdiĝanta en la vastan foron: „Ordono!“

Kaj la reĝidino diris kun afabla voĉo: „Iru, amiko mia, banejo estas preparita por vi el tre bongusta vino, por ke

via korpo ĝoju kaj viaj membroj jubilu. Iru, oni ree kondukos vin al mi post horo!“

Kaj ŝi etendis la dekstran manon al li!

Kaj Kunder kliniĝis kaj kisis la delikate vejnstriitan blankan manon.

Kaj kiam li revenis, vidu, jen staris tie la nigraj servoknaboj kun la pelvoj, kruĉoj kaj pokaloj.

Kaj la ino alvokis la nigrajn servoknabojn, verŝis mem la odorantan vinon en la kristalpokalon kaj donis la briletantan pokalon al li kun ĝoja gesto. Kaj ŝi transdonis al li mem la pelvon kun pano kaj migdaloj kaj dolĉaj fruktoj.

Kaj la ino iris en la alian ĉambron, kaj kiam Kunder rigardis supren, la nigraj servoknaboj jam estis glutitaj de la tenebra nenio.

Kaj Kunder alvenis en alia ĉambro. Kaj tie kuŝis la tapiŝo de la reĝo de Asirio.

Kaj tiam diris la ino: „La tapiŝo, kiun nobla reĝo plektis kaj kiun li intencis donaci al sia plej kara ino, estas nun plej honorata en tiu ĉi horo. Ripozu sur ĝi, sinjoro Kundar, kaj lulu min per viaj plej dolĉaj kantoj en sonĝon!“

Kaj kiam Kundar levis la okulojn, vidu: jen kuŝis la ino sur sia luksa kuseno preparita por la nokto.

Jen kantis la viro Kundar la plej dolĉajn kaj plej belajn kantojn de sia vivo.

Kaj malsupre en la nokta ĝardeno ludis la violonoj kaj flutoj kaj ŝalmoj.

Kaj la ĉambro fariĝis vasta kaj vastigis sin eĉ en la steloplenan ĉielan katedralon.

Kaj pli kaj pli mallaŭte kantis Kundar.

Kaj pli fore kaj pli perdiĝeme sonis la violonoj kaj flutoj kaj ŝalmoj; kaj pli fidema kaj intima fariĝis la ĉambro. Kaj kiam Kundar levis la okulojn, vidu: jen dormis la reĝino.

Kaj ŝi turnis sian vizaĝon al li en la dormo kaj ridetis al la viro Kunder en la sonĝo.

Jen Kunder dum longa tempo rigardis ŝin kaj faldis siajn manojn respektolene. Poste li detiris siajn ŝuojn, ĉar la planko, sur kiu li staris, estis sankta al li.

Kaj li forŝteliĝis senvorte eksteren en la nokton kaj for trans montojn kaj valojn, trans verdajn herbejojn kaj tra malhelaj arbaroj.

Kaj li portis kronon sur sia kapo.

Kaj je la mateno poste kurante alvenis sciigistoj al la marŝalo kaj al la ceremoniestro. Kaj la marŝalo lasis voki la ĉefkuraciston, li estis tre afabla al li kaj glatmaniera kaj fleksebla kiel oleo kaj promenis kun li tra la ĝardeno. Li parolis kun li pri la vetero kaj pri la ĉasado kaj pri la stato de la semaĵoj kaj pri la ĉambristinoj, kaj diris kvazaŭ preterire: „Nu, kara ĉefkuracisto mia, kion mi ankoraŭ volis demandi, kaj kion mi volis diri, ĉu vi cetere scias, ke unu el la sinjoroj antaŭuloj de Ŝia Moŝto falis en frenezon?“

Kaj la ĉefkuracisto diris: „Ne, tion mi ne sciis.“

„Ĉu ne?“ respondis la marŝalo sufiĉe mirigite kaj vaste malfermegis la okulojn: „Vi ne sciis tion, ĉu? Hmh! Hmh! Tio estas stranga. Nu do, mi almenaŭ diris tion al vi, mi opinias, por la kazo, ke....Ĉu vi vere bone komprenas min, sinjoro ĉefkuracisto?“

Kaj la ĉefkuracisto respondis: „Mi komprenas vin tute bonege, sinjoro mia.“

Kaj la reĝino rajdis kun siaj sinjoroj kaj multaj servistoj tra la floranta lando.

Kaj kiam ili venis al loko, kiu nomiĝas Vojeblo, la ino retenis sian ĉevalon kaj vokis: „Ĉu iu el la moŝtoj bonvolu esti tiel afabla kaj doni al mi manon?!“

Tiumomente unu el la sinjoroj saltis de sia ĉevalo, kuris rapide al la reĝino kaj levis ŝin de la besto.

Kaj unu el la servistoj alkuris kaj ekkaptis la bridilojn de la besto.

Jen diris la ino: „Moŝtoj miaj, kaj vi, tre noblaj rajdistoj, kaj vi, bravaj servistoj, atendu ĉi tie, ĝis mi revenos. Ŝajnas al mi, ke mi devos foriri; vojo vokas min.“

Kaj ili iris al vasta herbejo.

Kaj unu el la sinjoroj aŭdace paŝis antaŭen kaj diris fiere ĝentile: „Ĉu unu el la noblaj sinjoroj akompanu vin, reĝino? Vi certe iros malproksimen.“

Jen diris la ino: „Certe mi iros malproksimen. Tio certe

certas. Sed neniŭ el la sinjoroj sekvu min aŭ rigardu mian vojon eĉ ne el la malproksimo.“

Jen diris la nobla sinjoro: „Sed unu el la servistoj prefere iru kun vi por porti vin, kiam vi atingos akvon, aŭ kiam viaj piedoj estos lacaj.“

Jen diris la ino: „Ne, ankaŭ neniŭ el la servistoj rigardu mian vojon, ĉar mi iros la vojon de l' homo kaj volas esti por mi kaj sola, min lacigas bruo de tempo al tempo. Fidu al mi, nobla sinjoro, kaj lasu min.“

Jen la sinjoro retropaŝis kun malgaja koro.

Kaj la ino iris sian vojon.

Kaj la sinjoroj ĉiuj kolektiĝis kaj komencis ridi kaj ŝercis kaj rakontis pri ĉasoj kaj belulinoj.

Kaj tial la servistoj firmligis la bestojn kaj alfajfis la hundojn kaj kampadis ĉe la vojo kaj komencis ludi per ĵetkuboj kaj paroli laŭtajn vortojn.

Kaj neniŭ atentis la reĝinon.

Kaj la reĝino iris trans la vastan florherbejon kaj fariĝis pli kaj pli malgranda. Kaj la floroj fariĝis pli grandaj kaj superis ŝin kaj disfaldis sin survoje centkoloro.

Kaj la sinjoroj diris: „Nun ni ne plu povas vidi ŝin, la karan malgrandan mirinde belan reĝinon!“

Kaj la ino iradis ĝis ĝi venis al lago.

Kaj kiam ŝi staris ĉe la akvo kaj tuŝis per la pinto de sia ŝuo gracion ondon, jen ŝia koro fariĝis granda kaj plena.

Kaj ŝi levis siajn okulojn kaj jen: ĉe la bordo kontraŭe sidis homo.

Kaj ŝi iris al li kaj diris: „Sinjoro Kundar, kiun vi serĉas?“

„La profundon, nobla ino, mi serĉas la profundon.“

Jen diris la ino: „Kaj ĉu vi, sinjoro Kundar, opinias trovi ĝin en la lago?“

Jen diris Kundar: „Tion mi ne opinias.“

Jen diris la ino: „Nu, en ordo, kie vi do pensas trovi la profundon?“

Jen diris Kundar: „Ho, mi ne scias. Sed mi serĉas ĝin.“

Jen diris la ino: „Kaj se vi trovos ĝin, la profundon, kio tiam estu?“

Jen diris Kunder: „Tiam mi estos morta. Kaj mia koro estos trovinta la trankvilon kaj la sopiro de mia animo estos kontentigita.“

Kaj la ino staris ĉe li kaj karesis permane lian hararon.

Sed Kunder rigardis en la akvon.

Jen diris la ino: „Pripensu, amiko mia, viaj kantoj estas en la popolo. Oni kantas viajn kantojn ĉe nuptoj kaj ĉe la morto de homoj; la infanoj kantas ilin ĉe siaj rondodancoj kaj ĉe siaj ludoj; la viroj kantas ilin, se ili estas ĝojaj, ĉe vino; la inoj kantas ilin, se ili lulas siajn bebojn en la dormon; la knaboj kantas ilin en la arbaro kaj sur la vastaj herbejoj kaj kampoj, se ili volas gajni la koron de sia knabino; la knabinoj kantas ilin, se ili plektas florkronojn kaj vagadas vespere tra la apudriveraj herbejoj; la fabelorakontistoj kantas viajn fabelojn kaj kantas viajn baladojn sur la foirplacoj kaj ricevas multe da tintantaj moneroj de la popolo, kiu aŭskultas ilin; sed vi, amiko mia, ne havas tegmenton sur via kapo kaj ne havas lokon, kie vi povus protekti vian korpon kontraŭ la aĉecoj de la vetero, vi ne havas lokon, kie vi povus meti

vian kapon kviete kaj sen timo.“

Jen diris Kundar: „Tie, kie kuŝas mi, estas mia loko, kaj kie mi staras, tie estas mia domo kaj kie mi migras, tie estas mia hejmlando.“

Jen diris la ino: „Kaj vi iradas en vestoj kiel la plej malriĉa el mia popolo kaj havas nek panon nek pfenigon aĉeti al vi kruĉeton kun vino.“

Jen Kundar turniĝis flanken, derompis anemonon, kiu kreskis sub arbo, surgenuiĝis, tenis la floron alte kaj diris: „Rigardu, nobla ino, tiu ĉarma anemono ne posedas pfenigon kaj tamen ĝi estas pli lukse vestita ol ĉiuj reĝoj de Tero. Ĝi ne volas esti io alia krom vivi kaj flori kaj ĝojigi tiun, kiu volas ĝojigi sin je ĝi. Ĉu ĝia majesta vesto ne estas ĝia animo? Kaj tiel do mia vesto estas animo mia. Se Dio surmetas al mi jakon survoje, nu, en ordo, mi prenos ĝin. Ĉu tiu anemono faras alian?“

Jen diris la ino: „Nu, do, kial vi kantas viajn plej belajn kantojn kaj demandas neniam, kiu aŭdas kaj kiu portas ilin plu?“

Jen diris Kunder: „Ĉu vi vidas la merlon tie, nobla ino?“

Jen diris la ino: „Certe, mi vidas ĝin.“

Jen diris Kunder: „Kaj ĉu vi aŭdas kanti ĝin?“

Jen diris la ino: „Mi aŭdas ŝin kanti.“

Jen diris Kunder: „Nu, do, nobla ino, demandu la merlon, kial ĝi kantas kaj ne afliktiĝas pri tio, ĉu vi volas aŭdi ĝin, ĉu ne, ĉu vi donas manĝon al ĝi ĉu ne. La merlo al vi donu la respondon anstataŭ mi.“

Jen diris la ino: „Sinjoro Kunder, vi devus esti reĝo inter la homoj kaj porti kronon.“

Jen diris Kunder: „Kiel mi povus esti tiu, kiu mi estas kaj kiel porti tion, kion mi portas. Nomu al mi la potencan reĝon de l' tero, kiu kapablus doni al mi kronon. Ĉu vi opinias, ke vi povus trovi tian reĝon?“

Jen diris la ino: „Tian reĝon mi verŝajne ne trovus.“

Jen diris Kunder:

*„Kor', mia kor', kiel sangas vi!
Psiko, psik' mia, kiel serĉas vi?
Ho, Di', se venas vi animen pro morn' al mi,
lasu min perdiĝi nun en vi!
Vasta foro, ve-kvieta loko,
ŝajnas, ke eternas la voko!
Eternsoifa homanimo!
Eternsoifa homanimo!“*

Perlo falis sur la kapon de Kunder. Kaj ŝi ruliĝis malsupren en manon de li.

Kaj Kunder diris mallaŭte: „Jen briltrema diamanto ekestinta el la sangoguto de plena homa koro.“

Kaj li eksaltis, kaptis la radiojn de Suno, metis ilin en la perlon kaj vokis: „La komercistoj ja diras, ke en la trezorejo de la reĝo Sugolhari troviĝas la plej bela kaj plej rara perlo de l' mondo.“

Jen diris la ino: „Tiel diras la fremdaj komercistoj.“

Kaj Kunder vokis: „La komercistoj estas mensogantoj kaj ŝakristoj.“

Kaj la ino rigardis lin kaj ridetis kun ĝoja mieno kaj diris post certa tempo: „Sinjoro Kunder, ĉu vi volos akompani min dum parto de la vojo, mi intencas fariĝi dankkulpala al vi.“

Kaj kiam ili venis al la rando de la arbaro, diris la ino: „Tie staras miaj servistoj, ĝuste tie, kie la ĉielo kliniĝas al Tero kaj tamen mi konas neniun el ili, kiu kapablas porti min supren, ĉu en la aeran alton ĉu en la dolĉan forgeson ĉu al la vero ĉu al la profunda pureco de l' animo.“

Kaj ŝi etendis manon al Kunder. Kaj kiam ŝi foriris, Kunder postrestis trankvile apogata al arbo kaj sekvis ŝian vojon, ĝis ŝi malaperis en la koloroj de la floroj kaj li vidis ŝin nur en sia koro plu.

Kaj la reĝino venis al siaj viroj kaj diris: „Mi dankas al vi, moŝtaj sinjoroj, noblaj rajdistoj kaj bravaj servistoj, ke vi atendis min ĉi tie. Ni nun iru hejmen, ĉar baldaŭ vesperiĝas kaj fridiĝas.“

Kaj unu el la sinjoroj, estis la nobla sinjoro Sabkhete, diris: „Ŝajnis al mi, kiam mi rigardis malproksimen por ekscii, ĉu vi baldaŭ venos, nobla sinjorino, ke mizera vagabondo kaj murdema fiulo staris alte ĉe via vojo. Ni volis kuri al vi por helpi, sed vi donis la komandon, ke ni ne observu vin sur la vojo. Ĉu vi ne vidis la mizeran ulon? Aŭ, ĉu li suferigis vin?“

Jen diris la reĝino: „Ĉu mizera vagabondo? Tion diris vi! Ne, mi ne vidis tian viron kaj ankaŭ certe ne renkontis tian. Sed en la arbaro, ĉe la lago de la ĉarma anemono, tie mi renkontis reĝon. Li sidis ĉe la rando de la lago kaj serĉis ion.“

Jen diris la nobla kavaliro, tiu estis la sinjoro Wotebirge: „Ĉu li portis kronon? Ĉar tiukaze, se li ne portis kronon, li certe ne estis reĝo.“

Jen diris la ino: „Li certe ne portis kronon sur sia kapo. Sed lia krono kuŝis antaŭ li en la akvo.“

Jen diris la nobla sinjoro, estis la sinjoro Teske de Barhin: „Kaj tial mi opinias, nobla sinjorino, ke li serĉis tiun kronon.“

Jen diris la ino: „Ne, tion li ne faris.“

Jen diris la nobla rajdisto, estis la sinjoro Molegark: „Li ne serĉis sian kronon, sed tamen trovis ĝin, ĉar ĝi kuŝis ja antaŭ li en la akvo. Kaj li prenis ĝin fine tamen kaj metis ĝin sur sian kapon, ĉu?“

Jen diris la ino: „Ne, tion li ne faris. Li ne prenis ĝin kaj ne metis ĝin sur sian kapon. Sed el ĉiuj mirindaj kronoj, kiujn mi kiam ajn vidis kaj el ĉiuj tiuj mirindaj kronoj, pri kiuj iam ajn iu parolis el vi, sinjoroj, al mi, ĝi estis la plej stranga kaj plej grandioza kaj plej majesta krono, kiu ekzistas surtere.“

Jen diris unu el la sinjoroj: „Kaj vi diras, nobla sinjorino, ke li ne prenis ĝin, ĉu?“

Jen diris la ino: „Ne, li ne prenis ĝin. Kaj li agis certe ĝuste, ĉar ĝi ne estis sufiĉe valora por li. Kaj tial ĝi do ankoraŭ kuŝas en la lago de la ĉarma anemono, kaj tiu, kiu trovos ĝin, al tiu ĝi apartenu. Sed, neniuj iru tien por serĉi ĝin. Aŭ nur tiukaze, se li intencas multe suferigi min.“

Kaj la ino silentiĝis kaj la sinjoroj kaj mastroj postrestis.

Kaj unu el la sinjoroj diris: „Ĉu vi vidis tion, kiam ŝi alvenis, la kara ino, ke ŝi ploris.“

Kaj iris tra ĉiuj landoj la famo, ke en la lago de la ĉarma anemono kuŝas reĝa krono kaj ke ĝi estas la plej majesta kaj plej stranga krono el ĉiuj, kiujn oni kiam ajn vidis surtere.

Sed neniuj iris tien por serĉi la kronon.

Kaj kiam tamen aŭdaca junulo venis el fremda lando kaj ekiris por serĉi la kronon, jen li ne trovis la vojon al la lago.

Pripensante sidis la ino sur roko enmeze de la arbaro. Ŝi apogis la kapon per la manoj, kaj la longa hararo pendis ambaŭflanke de ŝi.

Senfine kaj senlime staris la sveltaj kolonoj de la katedralo antaŭ ŝiaj okuloj.

Kaj la ino diris: „Homoj venas kaj homoj foriras; ili turniĝas kaj kurbiĝas kaj ĉiuj strebas al la sunlumo; kaj ĉiu opinias, ke li estas limo kaj post li kaj malantaŭ li estas la fino. Sed jen vidu: ankaŭ tie ankoraŭ kreskas arboj kaj trunkoj kaj junaj kaj maljunaj, kaj ili petolas kaj turniĝas kaj estas tamen nur ĉiuj enmeze; videblaj nur al la plej proksimaj, divenante la pli malproksiman, nevideblaj kaj forgesitaj al la foraj. Ili ĉiuj ŝajne estas limo, ili ĉiuj ne estas limo; neniu estas komenco kaj neniu fino.“

Kaj ŝi ektimis kaj diris: „Sed kiu do donis al mi tiun diron? Kiu do plantis tiun penson en mian animon, por ke mi diru tiun diron kaj komprenigu ĝin al mia menso?“

Kaj varmega spiro iris tra ŝia koro.

Jen flugis skarabeto surmanen al ŝi kaj la ino diris: „Kien, skarabeto mia, vi flugas? Ĉu vi do rapidas al via nupto? Ĉu vi flugas do al via fianĉetino? Jen salutu do kare vian fianĉetinion kaj estu ĝojaj ĉe viaj aferoj!“

Kaj la skarabo levis siajn flugilojn kaj forflugis.

Jen diris la ino: „Aĥ, mia animo flugas trans marojn kaj landojn, kaj la membroj de mia korpo estas tiom pezaj!“

Kaj piede de la roko fontis rojo, fluis klare kaj haste antaŭen.

Kaj la ino vidis sian bildon en la rojo, ridetis al ĝi kaj ŝi havis la intencon kisi la ŝaŭmantajn ondojn de la rojo.

Jen falis ŝia kroneto malsupren, ruliĝis, stumblis kaj saltetis trans la rokon kaj trans la arbustaĵon, kroĉiĝis, deŝiriĝis kaj zigzagadis plezure turnante sin pli kaj pli malsupren.

Jen ridis la ino kaj vokis malsupren: „Kroneto, kroneto mia, ĉu vi rapidas for de mi? Ĉu vi tro premis mian kapon tiel peze? Do mi dankas al vi, vi, aĝa kaj kara kroneto

mia! Kaj tamen ili kaptos min, kaj tamen mi staros meze de ĝi kaj ili metos ŝargon sur min. Mi estas polveto en la vento kaj ne reĝino por la homoj. Kaj tial do mi devos voki al vi: „Kroneto, venu supren! Venu supren al mi!“

Jen alvenis viro, kiu iris tra la arbaro.

Kaj pere de la sonoj de lia paŝado aŭdis la ino, kiu li estas. Kaj ŝi aŭdis lian voĉon kaj li vokis: „Atentu, mi alportas la kroneton!“

Kaj tiu voĉo senfine bonfartigis la inon.

Sed ŝi ne sciis, kio okazis al ŝi. Sed ŝajnis al ŝi, ke tiu voĉo prenas ĉiun maltrankvilon de ŝia koro kaj kvazaŭ ŝi portus por tio mondon plenan de Suno en sia animo.

Ŝi rigardis malsupren, kaj jen vidu: la viro rampis kaj grimpis kaj saltis trans rokfendojn kaj trans rompiĝantan rulŝtonaron; ŝi vidis lin pendi en la subĉiela aero nur tenata de sveltaj arbitoj.

Kaj ŝi ne timis pro li kaj ŝi havis nur unu penson en la koro: povas okazi nenio al li, kaj mi amas lin. Kaj ŝiaj

okuloj lumis por li kaj donis al li forton kaj sekurecon.

Sed antaŭ li ruliĝis kaj petolis la kroneto. Ĝi sidis silente kiel muso sur elstaraĵo de roko, pendis dum sufiĉe longa tempo en la sveltaj branĉoj de eta piceo kaj se la viro proksimiĝis al la kroneto, ĝi ridis plezure kaj forsaltis gaje.

Sed la viro estis optimisma, li havis multe da tempo kaj li ne lasis guti venenon en sian animon.

Li ekridis laŭte kaj vokis: „Atendu, kroneto mia, atendu nur, iam mi ja kaptos vin. Ĉu vi ne pensas? Aŭ, ĉu vi eble supozas, ke tio estas streĉa laboro kapti vin? Ĉu vi eble eĉ opinias, ke vi estas pli forta ol mi? Kaj se temas pri la aŭreolvestita ino! Por ŝi ĝi estas tamen pura volupto kaj ĝojo! Kaj miaj sangantaj manoj, ĉu ili ne estas la plej dolĉa pago? Atendu, kroneto mia, atendu nur plu!“

Kaj kiam la kroneto aŭdis tion, kiam ĝi rimarkis la ridadon kaj la ĝoja optimisma parolo atingis ĝin, kaj kiam ĝi fine ankoraŭ vidis, ke liaj drolaj saltoj kaj liaj strangaj kapricoj volas damaĝi neniun, ĝi firmkroĉiĝis al delfinio

kaj lasis plezure baraktante kapti sin.

Kaj la viro diris: „Nu, kroneto mia, ĉu eble estas tiel? Vi do opinias, ke estas pli bone ĉe ŝi kaj pli bele kaj pli delikate. Ĉu ne?“

Kaj li vokis fanfare supren kaj kun hela jubilo en la voĉo: „La kroneto, nobla sinjorino, volas denove hejmen. Ĝi venas al vi kaj kunportas min! Ĉu vi estas kontenta pri tio?“

Kaj ŝi vokis jubile malsupren: „Mi ja estas kontenta pri tio!“

Kaj li kisis la oran kroneton en la kaŝejo kaj diris: „Portu tiu saluton al ŝi kaj metu ĝin sur ŝian hararon!“

Kaj li kaŝis la kroneton sur sia flamiĝanta koro.

Kaj li venis al la ino, kaj ŝi lavis la sangon de liaj manoj kaj de la piedoj, sekigis lian sangantan vizaĝon, mankaresis softe lian kungluitan hararon kaj diris: „Metu vian kapon sur mian sinon, Kunder, amiko mia, kaj ni pensu, ke ĉio estas tiel, kiel ni deziras ĝin kaj kiel ni ĝin

esperas kaj kien nia sopiro rapidas! Ĉu vi volas tion, amiko mia? Kaj ni festu ekscitajn festojn de entuziasmo, tiel, kiel neniu surtere kiam ajn vidis kaj neniu surtere kiam ajn pensis.

Kaj ŝia robo verde silke teksita kun longaj fadenoj el oro kaj briltremanta en miloj kaj miloj da steletoj kaj diamantoj pendis profunde malsupren ĝis trans la piedoj. Kaj neniu vidis ŝiajn orajn ŝuojn kun la fajnaj broditaj silkoj. Kaj kun perloj kaj briltremaj valorŝtonoj. Sed ŝia svelta korpo kun pompo kaj brila majesto estis pura kaj vera kaj spite animanta kiel la steloj de la ĉielo en ŝtaleca vintronokto.

Kaj la vesto de la viro Kundar, pri kiu oni rakontis, ke li estas kantisto, estis pli pecigita kaj pli disŝirita kaj pli ĉifonita ol iam ajn antaŭe.

Kaj la ino diris: „Sciu, amiko mia, se bufoj kun sataj buŝoj proksimiĝas al mi kun sia veneno; se ratoj vostohavaj kiel maliculinoj ĉirkaŭsvarmas mian liton kaj volas ŝiri min el mia reĝa burgo, eksteren en la frostan nokton de nudaj muroj; se vermoj volviĝantaj kiel pastraj fingroj alrampas

kaj disvastigas nedireblan naŭzon kaj fetorantan peston kaj volas kovri min kaj mian spiron per ĉiuj mensogoj kaj malbelaĵoj de tiu ĉi ŝtipkapula mondo, jen mi pensas ĉiam nur pri vi, Kundar, amiko mia; kaj vidu, jen fariĝas ĉiutempe pli hele ĉirkaŭ mi kaj ĝojige kaj ridantaj sunoj staras super mi, mi aŭskultas la kantadon de la birdoj en la arbaro, perceptas la susuradon kaj frustradon de la herboj. La kantado de la fontoj aŭdeblas ĝis miaj oreloj kaj mi sentas la odoron kaj la kolorojn de la floroj kaj la venenaj bufoj fariĝas paradizbirdoj, la ratoj fidemaj kapreoloj kaj la minacantaj nudaj muroj blanka marmoro pripendata per tapiŝoj el Orientlando.“

Kaj Kundar silentis.

Sed post iom da tempo li diris: „Ĉu vi ne tranĉis kun sangantaj larmoj infaneton el via koro?“

Kaj la ino diris: „Mi faris, amiko mia, jes ja! Ĉu mi povis fari ion alian, kaptita inter ronĝantaj kaj fosadantaj musoj, kies okulojn dolorigas la lumo? Ĉu mi ne devis fari tion, malproksime de homoj? Ĉu vi volas vidi ĝin, mian sangantan koron, Kundar, amiko mia? Al vi mi volas

montri ĝin, sole al vi mian sangantan koron, kiun neniŭ vidis kaj pri kiu aŭdis neniŭ. Al vi mi volas montri ĝin, amiko mia, por ke vi sciu, kiel vundita la kroneto estas kaj ties servistino.“

Sed Kunder skuis la kapon kaj diris: „Mi vidis ĝin, vian sangantan koron; maljuna saĝulo kun profundaj okuloj nemortebraj kiel la eterna nokto etendis bonvoleman manon al mi, kaj sur lia mano kuŝis via sanganta konvulsia koro. Kaj ĝi banis sin en larmoj, en varmegaj larmoj, kiuj superfluis el la kavigita mano de l' saĝulo. Ho, mi opinias, ke ĝi estis la spirito de viaj patroj, la unua semograjno, el kiu vi ŝosis. Sed miaj pensoj migras tra foraj mondoj, iras tra pasintaj eternecoj kaj iras tra estontecaj eternecoj kaj mi staras enmeze de tio. Ho, animo, animo mia, kiom multe vi serĉas? Ĉu vi serĉas la duan animon por esti perfekta universe kaj eternece? Ne krii! Elaĉeto okazu al vi! Malfermu koron kaj animon!“

Jen diris la ino: „Ĉu vi aŭdas, amiko mia, kian mirindan kanton kantas la fonto? Pri eterneco! De eterneco! Ne krii, animo, mia animo soifanta!“

Jen diris Kunder: „Mi volas porti vin, por ke viaj vunditaj piedoj jubilu kvazaŭ ili irus sur roso kaj sur delikata mosko.“

Kaj li levis kaj forportis ŝin.

Kaj ili venis al ĉarma kastelo. Tiu estis konstruita el blanka marmoro kaj la tegmentoj estis el oro kaj la kreneloj el pura arĝento kaj la buntaj rondaj fenestrovitretoj estis rubenoj, topasoj kaj turmalinoj, spineloj, krizolitoj, turkisoj kaj ametistoj. La sojloj estis el ebono inkrustitaj per nebrila arĝento, la pordoj el ligno de Libano kaj iliaj randaj kovriloj el veterbatita kupro. Kaj la lampoj, kiuj staris antaŭ la kastelo, portis kiel lumilojn grandajn diamantojn kaj akvomarinojn enfiksitajn kun blanka plateno. Kaj malantaŭ la kastelo estis lago. Tiu havis tute helan kaj klaran akvon. Oni povis rigardi ĝis la plej profunda fundo, kie la marfeinoj ludas.

Kaj la ino diris: „Ĉu vi vidas tiun kastelon,. Kundar?“

Kaj li respondis: „Mi vidas ĝin!“

Jen diris la ino: „Vi vidas ĝin, do vi ĉiam trovos ĝin, mia amiko Kundar. Neniu scias pri tiu kastelo. Neniu trovos ĝin. Ĝi kuŝas malproksime malaperinta en la profundo de la nekonata fora arbaro. Kundar, amiko mia, mi volas atendi vin, ĉi tie je la pordo de tiu burgo; mi volas atendi vin, se Novluno komenciĝos. Ĉu vi venos, Kundar, amiko

mia?“

Kaj li respondis: „Mi venos!“

Jen diris la ino: „Venu! Do atentu, mia koro soifas pri nokto, en kiu mi sentos mian animon konservatan en la majesta kvieto kaj eterna beleco de la neatingebla, pri nokto, en kiu mia animo fariĝos sankta en la perdado kaj malfermata estos lumado, en kiu speguliĝos la kosmo, en kiu nia spirito kaj nia volo estos grajneto de la semo de Dio. Vi scias, kion mi diras, ĉu? Kial metis la dia estaĵo timon da timo en nian animon? Timo pro la laŭta kriado, timo pro la malsanktigo, timo pro nudiĝo, timo pro la rozvualo de nia vizaĝa aspekto. Solvu tiun demandon al mi, amiko mia! Mi estas via kaj estos via en eterneco. Tial!“

Kaj li levis ŝin de la puto kaj forportis ŝin multajn horojn, ĝis ili venis al la lastaj arboj de la arbaro, kiuj estis ankaŭ la unuaj.

Kaj en la foro antaŭ ili troviĝis la urbo, bone nutrata kaj laŭorde ekipata kaj kun sataj burĝoj.

Kaj alte super la urbo tronis la reĝa burgo.

Kaj kiam Kundar jam metis la inon surteren en la verdan herbejon kaj molan moskon, kiujn li alportis por apogi ŝin ripozige, Kundar foriris.

Kaj la ino vidis kiel li malaperas en la foro en la nebulo kaj fine estis tiel levita alten, ke li foriĝis el ŝia rigardo.

Jen prenis la ino malgrandan arĝentan kornon, kiun ŝi portis per ora ĉeneto ĉirkaŭ la kokso kaj blovis en ĝin.

Tio estigis helan, vokantan sonon.

Kaj tre baldaŭ alvenis rapide la servistoj.

Kaj la marŝalo diris: „Ĉu vi estis sola en tiu terura arbaro, ino nobla?“

Jen ŝi diris: „Mi ne estis sola!“

Pri tio ĉiuj miris tre.

Kaj la reĝino vokis: „Konduku mian ĉevalon al mi, por ke ni ekiru!“

Kiel tre gracile rondigita linio staris Luno en la ĉielo. Jen fajna minca delikate pentrita brila arko. En la malhela nokto ĝi aspektis kiel ŝvebanta revata kronringo, kiu tie atendas, por ke iu paŝu sub ĝin, por ke ĝi sinku sur lian kapon, por ke ĉiuj homoj voku: „Rigardu, reĝo estas naskita al ni! Ni iru por levi lin sur la ŝildon kaj por porti lin en nian urbon kaj proklami lin ĉie kaj ĉiuvoje: „Ĉiu sufero de la mondo estas prenita de ni, surgenuiĝu kaj kisu la teron, kiu naskis vin kaj kiu nutras vin, ĉar la homo aperis kaj volas esti inter ni!“

Kaj Kunder paŝis sub la altaj sveltaj kolonoj, sub la arboj, kiuj elstaris en la ĉielan volbon, en la profundon de la arbaro.

Kaj liaj paŝoj sonis tra la tenebro de la nokto kiel heroldaj fanfaroj en granda malproksimeco. La nimfoj prilumis lian vojon, por ke li ne falu kaj ne eraru pri la vojo. Kaj se li iris trans senarban herbejon, jen nebulinoj vagadis ludante rondodancon apud li kaj sur montetoj kaj ĉe deklivoj dancis elfinoj.

Por li estis mallaŭta kantado en la aero kaj karesemaj

sonoriloj sonoris.

Kaj Kunder enpenŝiĝis pri la stranga kastelo.

Kaj jen antaŭ liaj okuloj staris la kastelo ĉirkaŭbrilata kvazaŭ de mil sunoj, kaj la lanternoj ĵetis longan fulmantan lumon sur lian vojon, alkondukis lin kaj poste retiris siajn brilajn lancojn kun la pordegaj flugiloj kastelen al si, tiel, ke la arbaro denove troviĝis en tenebro kaj la elfinoj saltante trotis hejmen.

Kaj la ino staris apogite al la pordo el ligno de Libano.

Kaj Kunder vidis nenion krom ŝiajn lumantajn okulojn, kiuj ĉirkaŭprenis lin kaj vualis en beatecon.

Kaj Kunder sinkis antaŭ ŝi sur la genuojn kaj klinis sian kapon sur unu el ŝiaj manoj.

Sed ŝi kisis lin delikate sur la hararon, levis lin supren kaj kondukis lin internen.

Kaj la pordo fermiĝis malantaŭ ili kaj vokis kun obtuza tono: „Fermite!“

Kaj Kandar akompanis ŝin ĉemane al ŝia ĉambro.

Jen prenis la ino martelon kaj frapis sonorilon, kiu grande kaj peze pendis en la halo.

Kaj la sonorilo estigis profundan sonoritan sonon kaj vokis:

„Finis dorm’! Pasis ĝi.

Al mi! Al mi! Al mi!

Finis dorm’. Pasis nun!

Bum! Bum! Bum!“

Kaj kiam la voko de l’ sonorilo estis eltintinta, ĝi komencis flustreti kaj flustri, susuri kaj murmuri, kuregi kaj spiregi, kuri el ĉiuj pordoj kaj pordegoj, trans ĉiujn ŝtupojn kaj ŝtuparojn, tra ĉiuj irejoj kaj haloj kaj salonoj kaj arkoj, en ĉiuj ŝrankoj kaj kestegoj, en ĉiuj relikvaj sanktejoj kaj kestoj, sur kusenoj kaj seĝoj, en kuirejoj kaj keloj, en subtegmentoj kaj tenejoj, sur plankoj kaj plafonoj, en anguloj kaj anguletoj, en kamenoj kaj kamentuboj kaj dekstre kaj maldekstre kaj antaŭe kaj malantaŭe, kaj supre kaj malsupre paŝetis kaj trotetis,

ŝoviĝis kaj teksiĝis, subridetis kaj odoretis. Jen vigla vivo en la kastelo komenciĝis. Kantis kaj sonis, kaj jubilis kaj trilis.

Jen rigardu: la kruĉoj starantaj sur la kornicoj fariĝis ĉambristoj svarmantaj kaj tumultantaj kun blazonornamitaj vestoj kaj kun larĝaj arĝentaj butonoj; kaj la taburetoj starantaj en la anguloj kaj niĉoj fariĝis gracilaj ĉambristinoj kun facilaj antaŭtukoj en buntaj roboj, kaj ili babilis kaj paroletis kaj komencis moviĝi en kestojn kaj ŝrankoj; kaj la delikataj kalikoj starantaj sur la kamenoj kaj plenigitaj per floroj, fariĝis plej amindaj lindaj ĉambristinetoj, kiuj vigle saltis de siaj lokoj kaj bone instruite riverencetis antaŭ la ino kaj ĉiuj diris: „Kion Via Moŝto degnas plejbonkore ordoni?“ Kaj la sveltaj alte etendiĝantaj kandelingoj el stano kaj porcelano fariĝis paĝioj, kiuj per giganta salto ekstaris meze de la halo kaj faris profundan riverencon antaŭ la ino, ili ruĝiĝis kaj timeme diris: „Via Moŝto, laŭ via ordono!“ Kaj tiuj, kiuj antaŭe estis el arĝento, havis arĝentajn kunŝnuraĵojn. Tiuj, kiuj estis el porcelano, havis ruĝajn, blankajn, verdajn kaj bluajn kamizolojn, kaj

tiuj, kiuj kreskis el stano, havis ledajn uniformojn kaj longajn ledajn botojn. Kaj ili portis falkistoringojn kaj diris aŭdace: Ino nobla, kiam vi rajdos al la falkoĉaso de l' aredoj!

Kaj la ino diris: „Ni banu nin, por ke eĉ ne spireto de la kriado de l' mondo ripozu sur niaj korpoj. Nenio de tio, kio estis ĉirkaŭ ni en frostaj tagoj, ŝteliĝu en niajn revojn, trudiĝu en niajn pensojn kaj plenigu nin per veaj doloroj!“

Kaj la banejoj estis admirindaj florĝardenoj, kaj enmeze de ili troviĝis profunde enmetita lageto ĉirkaŭata de neĝe blanka marmoro. Kaj ĉirkaŭe staris leonoj el pura oro kaj el iliaj ruĝaj buŝoj ŝprucis larĝstrie bone odoranta akvo.

Kaj ĉie estis ora helo kaj neniu kapablis diri, de kiam ĝi ĉeestis.

Jen alkuris nigraj knaboj kaj ili ŝmiris la blankajn korpojn de la banantoj per mirindaj kremoj, kiuj donis bonfartigan frideton kaj forprenis ĉiun lacecon.

Kaj violonoj kaj flutoj sonadis kaj de iu malproksimo

sonadis dolĉaj infanĥoroj.

Kaj tiam ili iris al la manĝo.

Tiel pasis tri tagoj. Kaj estis ĉasado, muziko kaj danco.
Kaj ĉiu tago alportis novajn sennombreblajn ĝojojn.

Sed jena estis la plej belaj el ĉiuj: la aŭreolvestita ino kuŝis sur alten tavoligitaj matoj kaj molaj tapiŝoj kaj diris: „Kundar, amiko mia, parolu kaj mi aŭskultos. Parolu al mi pri saĝo kaj vero kaj pri amo! Parolu al mi pri la ĉielo, pri la steloj, pri malnovaj tempoj kaj pri amo! Kantu viajn dolĉajn kantojn kaj kantu pri amo kaj mi aŭskultos! Rakontu al mi viajn plej ravajn fabelojn pri homoj, pri bestoj, pri floroj, pri ĉiuj aĵoj kaj pri amo! Kaj mi aŭskultos! Kantu al mi pri Suno, pri la brila lumo kaj pri la multspeca vivo kaj pri amo! Kaj mi aŭskultos! Kaj se mi ridos kaj se mi ploros kaj se mi revos, tio tute ne afliktu vin; ĉar mi, komprenu, ridas por vi, ploras por vi, revas por vi kaj mortas por vi!“

Kaj Kundar faris tiel!

Kaj ŝi fariĝis neniam laca.

Kaj tiel estis ankaŭ post tri tagoj vespere. Kaj certe en la nokto.

La ino kuŝis trankvile kaj aŭskultis lin. Kaj ŝi ridis kaj ploris kaj revis kaj ŝia animo ondadis supren kaj malsupren en arda ĝojo. Kaj ŝi rigardis lin kaj diris: „Brakumu min, Kunder, amiko mia! Plenumu mian koron kaj mian animon per vi, por ke mi finu esti mi mem. Majeste kaj en dolĉa profunda frandeco. Kaj mi volas rekomendi min al vi, tute kun pura vera ĝojo, mi volas esti via, tute sindonema kaj pacienca. Kaj mi ne volas amarsenti en mia koro kaj mi volas danki al vi ĝis la lasta horo de la forfluanta eterneco. Kaj mi volas kisi vian buŝon, kiu je la unua fojo nomis min ino, mi volas kisi viajn okulojn, en kiuj mi retrovis min mem, mi volas karesi viajn vangojn; kaj viajn manojn kaj vian kapon mi volas premi al mia brusto, por ke vi sentu kaj aŭskultu mian koron kaj por ke vi sciu, kiun celas la frapado de mia koro!“

Kaj ĉar li ne diris ion, ŝi turnis sin al li.

Kaj li staris antaŭ ŝi. Kaj liaj okuloj estis deturnitaj de ĉio,

kio ligis lin al la tero, pensante ankaŭ pri la elaĉeto de la homo, kiu estas naskata el la koro kaj for de la svarmado de l' mondo.

Kaj ĉar ili do vidis lin, ŝi vokis kun jubila voĉo: „Mi ja nun estas la plej feliĉa el ĉiuj inoj, Kundar, amiko mia, nun, ĉar mi konas vin kaj nun, kiam mi vin scias! Estas plenumite! Ĉio! Venu al mi, brakumu min kaj kisu min; ĉar de nun mi estas libera. Do prenu min kaj portu min al la altoj kaj abismoj. Mia serĉado estas kontentigita, miaj piedoj ne plu sangas jam dum tri tagoj. Venu al mi, mia plej kora amiko!“

Kaj ŝi disvastigis siajn brakojn por akcepti lin.

Kaj li proksimiĝis paŝante kaj ŝi metis siajn brakojn ĉirkaŭ lian kolon kaj tiris lian kapon ĝis proksime al si. Kaj ŝi premis liajn lipojn sur sian buŝon.

Kaj kiam ŝi sentis arde lian respondan tuŝon, ŝi diris mallaŭte: „Vi, mia plej kora amiko!“

Kaj ŝi klinis sian kapon iom malantaŭen por serĉi liajn okulojn.

Jen li malfermis siajn okulojn, kaj jen, vidu: La ino estis morta!

Kaj li sinkis antaŭ ŝi sur la genuojn kaj preĝis.

Kaj li do parolis:

„Vi dormas, aŭreolornamita ino!

Sanon al via sanktigita dormo!

Atentu: Mi dormkantis al vi,

kaj nun vi glitas

sur la ŝanceliĝantaj pontoj de la eterna revo.

Transen en la kampojn de la lumsvingigitoj!

Kaj vi revenos en spira ondo.

Aŭ en la spiro de kolorjubilanta floro.

Aŭ en la flagrado de lumo

aŭ en la plendantaj sonoj de la vento.

Aŭ en perdita flustrovoĉeto

elsaltinta el la ondofrapado de l' maro.

Aŭ en la rapidanta plaŭdado de l' roĵo.

Aŭ en la flugilbato de birdeto.

Aŭ en la brila radio de stelo.

Aŭ en la unua rideto de novnaskita bebo.

Aŭ en la unua kanto de amanto.

Aŭ en la riĉaj pensoj de saĝa viro.

*Kaj atentu: kiel bone, ke vi dormas, multnobla ino,
kiun mi amis!*

*La plej alta beateco okazas ja nur tiukaze,
se la longa dormo forprenas de ŝi
la malfreŝajn kaj ŝimantajn restaĵojn
de bongustega festmanĝo.*

*Atentu do: kun ŝimo, kun velkaj rozoj
kaj kun dumaniere interpretitaj rigardoj
transvivi la matenon, aŭreolvestita ino:*

Tio estas la malbena de l' mondo, kiu korpremas nin.

*Tio estas la malbena, kiu ŝarĝas
la lastan sonon de feliĉa horo.*

*Tio estas la malbena, kiu estas metita
sur la salte ekfloranta burĝono!*

*Benata vi estas, plej beata el ĉiuj inoj,
ĉar vi ne vidis tiun matenon kaj tiun ŝimon
kaj ne vekigis kun malfermege demandantaj
okuloj.*

*Sub renversitaj temploj
kaj apud detruitaj bildoj kaj*

frakasitaj kolonoj de dioj!
Benata vi estas, aŭreolvestita ino,
ĉar granda kompatulo de l' kosmo
vin metis en la eternan beatecon
kun softa transŝvebado al tiu foro!
Sciu do: la plej granda kaj plej benigna
el la ĝojoj
jubilas plej alte dum ununura sekundo
antaŭ la sonorilbato,
kiu promesas al vi beatecon!
Tial pluan fojon benata estas vi, graciega ino,
ĉar via regno kaj viaj limoj
estas nun bazitaj kaj fere metitaj
dum eterneco!
Benata vi estas, aŭreolvestita ino,
pro via perfekteco
esperon promesanta!”

Kaj kiam Kunder estis dirinta tion, li kisis ŝiajn okulojn.

Kaj la okuloj estingiĝis kaj fermiĝis.

Kaj granda delikate blua papilio flugis kun fridetiga

svingado sur ŝin kaj tuŝis ŝian vizaĝon kaj postlasis tie
superban fajnan bluan brileton.

Kaj Kunder metis ŝiajn manojn unu sur la alian kaj diris:
„Por ke via karesema fratino, la dekstra mano, eterne ne
angoru pro la maldekstra!“

Kaj baldaŭ li levis la noblan inon, banis ŝin per
bongustega vino kaj enbalzamigis ŝin per hinduja narda
oleo kaj aliaj bonodoraj unĝentoj, por ke ŝia korpo ne
disfalu en polvon kaj osterojn.

Kaj li volvis ŝin en silkajn vualojn kaj en tukojn de l'
Gango kaj metis ŝian kadavron en bronzan keston
profunde en ŝarĝon de ruĝaj rozoj.

Kaj li portis ĝin malsupren en la arbaron kaj enfosis ĝin
sub kverko kaj konstrue metis altajn ŝtonojn ĉirkaŭ la
bronza kesto, por ke la bestoj ne havu aliron.

Kaj li kovris ĝin per tero.

Sed li ne metis ŝtonon sur la teron kaj diris: „Por ke via
eta mammo ne estu dispremita kaj via koro ne ĝemu!“

Kaj kiam li estis farinta ĉion ĉi, baldaŭ floris ruĝaj rozoj sur ŝia tombo kaj blankaj lilioj kaj hiacintoj disipantaj kolorojn.

Sed la aro ĉirkaŭstaris kun flamantaj torĉoj kaj silentis.

Sed dolĉe vee plendantaj knabaj ĥoroj kantis de la balkono.

Kaj Kunder eniris.

Kaj li banis sin kaj diris: „Por ke neniu resteto de ŝia rigardo eliru kun mi en la mondon, kie la satuloj paŝtiĝas kun laŭtaj kaj malicaj sencoj.“

Kaj li tuŝis siajn pompajn kavalierajn vestojn, kiuj ekestis, kiam li eliris la unuan fojon el la banejo. Kaj ĉar li tuŝis ilin kaj diris: „Por ke vidu ilin neniu, sur kiujn rigardis ŝiaj okuloj kaj kuŝis manoj ŝiaj“, kaj jen denove aperis liaj iamaj vestoj disŝiritaj, dispecetigitaj kaj ĉifonitaj. Kaj pri tio li ĝojis elkore.

Kaj li iris al la sonorilo, kiu pendis en la halo.

Kaj ĝia sonoro resonis.

Kaj la sonorilo vokis:

„Maldormtemp', ĝojotemp', vivotemp', glora temp'.

Jen: Nun! Nun! Nun!

Dormotemp'! Dormotemp'! Dormotemp'!

Bum! Bum! Bum!“

Kaj kiam la voko jam elsonis, jen staris sur kornicoj kaj kamenoj kruĉoj kaj kandelingoj, kaj en la anguloj kaj niĉoj staris velure ornamitaj taburetoj tre antikvaj .

Kaj li eliris.

Kaj la pordo post li klake fermiĝis kaj vokis: „Fermite!“

Kaj li tiris la ŝlosilon el la seruro, iris al la klara lago kaj levis el ĝi fragmitan tigon, pendigis la etan oran ŝlosilon al la radiko de la tigo kaj sinkigis ĝin.

Kaj la tigo ŝanceliĝis en la vento kaj kapjesis al li: „Bone konservite! Bone konservite!“

Kaj Kandar levis siajn okulojn kaj vidu:

Jen leviĝis Suno.

Kaj la seruro jam foriĝis kaj profunda lago kun miloj da etaj rondaj verdaj folietoj kuŝis meze de la profunda arbaro.

Kaj Kundar paŝis tra la arbaro. Kaj tie li venis al la lastaj arboj, kiuj estas ankaŭ la unuaj. Sed vidu! Jen multe da popolo proksimiĝis renkonte al li.

Ili serĉis sub ŝtonoj kaj arboj, en florokalikoj kaj ĉe herbotigoj, sur musko kaj sub plugitaj terosulkoj.

Kaj li demandis: „Kiun vi serĉas?“

Kaj ili respondis: „Ni serĉas nian malgrandan ĉarman reĝinon!“

Kaj li demandis: „Kial?“

Kaj ili cirkle enfermis lin, rigardis al li, montrosignis al li kaj skuis la kapojn.

Kaj ili parolis ankoraŭfoje kordisŝire plendante: „Ni serĉas nian junan, malgrandan, ĉarman reĝinon jam dum dek tagoj!“

Kaj ili tre ploris.

Sed post pluaj dek tagoj, la onidiro estis disvastigita:

„Sovaĝa urso disŝiris ŝin en la arbaro!“

Kaj denove post dek tagoj leviĝis alia onidiro: „Ŝi ripozas en profunda dormo en monto!“

Kaj jen denove post dek tagoj diris la popolo: „Ŝi kuŝas en profunda lago!“

Kaj jen oni deklaris en la tuta lando: „La juna reĝino estas morta, ŝi mortis dum la naskaj doloroj!“

Kaj tra la tuta lando sonoris la sonoriloj kaj oni malhisis la flagojn kaj nigraj flagorubandoj flirtadis.

Sed la popolo ne akceptis tion kaj fariĝis plena de sankta sopiro kaj diris: „Elaĉeto! Elaĉeto! Elaĉeto! Ni atendas vin!“

Kaj la marŝalo havis la kortegan kuraciston subbrake, trenis lin tra ĉiuj stratetoj kaj diris sen interrompo: „Nu, ĉu mi ne diris tion ĉiam! Jen la rezulto! Sed neniuj atentis miajn vortojn.“

Kaj kiam ankoraŭfoje pasis luno, la popolo fidis al nenio

plu. Kaj ĝi estis plena de duboj kaj demandoj kaj turmentoj. Kaj ĝi disvastiĝis sur la tuta Tero por serĉi sian junan reĝinon.

Elmigris viroj, inoj kaj infanoj.

La oldulojn, la malsanegulojn, la malsanulojn kaj la gravedulinojn kaj ĉiujn, por kiuj la vojo estis tro streĉa, kiuj kuŝis en profunda dormo, mortigis la kompatemaj homoj kaj enfosis ilin.

Kaj kien ajn ili venis, ili ĉiuj demandis: „Ĉu vi vidis nian junan reĝidinon?“

Kaj tiel ili faris tion ĉiuloke kaj ĉe ĉiu migranto.

Sed oni mokis kaj kaj ridis pri ili.

Kaj tial ili vagis senorde for.

Kaj la floranta lando fariĝis dezerta kaj malplena kaj ĝia elspiro ŝtonigis ĉiun, kiu venis en ties proksimecon.

Kaj Kandar staris malproksime kaj rigardis la urbon

denove en la lumo de la subiranta suno.

Sed la urbo, iam tiom bone nutrata kaj tiel bone armita kaj loĝata de satuloj kaj de trankviluloj ŝrumpis kaj estis fine kiel kampo kun ŝtonoj.

Kaj supre super la urbo elstaris la reĝa burgo. Kaj iliaj fenestroj kaj kreneloj briletis kaj ardis ruĝe.

Kaj Kunder pensis pri la reĝa burgo kaj ĉiuj ĉambroj, en kiuj ili vivis.

Kaj li levis sian voĉon kaj parolis: „Sankta estas la sojlo super kiu viaj piedoj paŝis! Sankta estas la kurteno, kiun via mano tuŝis! Sankta estas la kuseno, sur kiu via kapo kuŝis!“

Kaj la burgo diseriĝis kaj disrompiĝis.

Kaj li diris: „Ŝtonoj ili denove estos, de kiuj ili estis prenitaj. Sed ŝtonoj parolos, kie la koroj de la homoj sangas! Savo okazos al la homoj per larmoj kaj multe da doloroj kaj multe da korsuferoj! Savo okazos per demandoj kaj serĉado kaj migrado! Ek do, ni iru

vojeraren, kie sola estas la vero, la saĝo, la savo kaj la vivo.

Kaj kiam li do estis parolinta tion, li foriris en foran landon ankoraŭ je la sama vespero.

Fino de la unua libro

tradukis la karapacanoj Dorothea & Hans-Georg Kaiser & Frank Vohla laŭ „Khundar“ el la gazeto „Zigelbrenner“ (La brikofaristo), 4-a jaro, 30-a de apilo 1920, Kajero 26/34

KONSTATOJ & PARADOKSOJ

Konstatoj

Volo kaj sukceso

Jurisdikcio

Instruosaĝo

Pruvoj

Paradoksoj

Negoca prudenteco

Babilaĉo

Mono kaj havaĵo

Civilizacio

La socio

Eltrovo

Murdo de homo

La fama diro

Humaneco

Konstatoj

Volo kaj sukceso

Mi konis viron, kiu sukcesis pri ĉio, ĉar li havis tre fortan volon kaj multe da persisto. Sed ĉe la unua ino, kiun li volis konkeri, la sukceso de lia forta konscia volo ne montriĝis. Ĉar je la sama tago, je kiu li estis konvinkita, ke ŝi devus fariĝi lia, ŝi kuŝis inter la brakoj de alia. Kaj tiu alia estis hazarde iu, kiu tute ne havis volon, kiu neniam provis entrepreni ion kaj kiu sukcesis pri nenio.

Jurisdikcio

Murdisto nepre estas ekzekutinda. Sed la homaro per tio perdas du ekzemplojn des sia speco kaj tria ekzemplero estas farita murdisto plia. Sed justa kaj saĝa ĝi estus, tiel kiel inda al la homo, se oni murdus la murdiston antaŭ ties ago. Tiukaze la intencita celo vere estus plenumita.

Instruosaĝo

La terpomo nepre estas pli nutriga ol la ovo de kokino. Kaj ĉar la terpomkamparano tion asertas, ĝi estas vera.

Ĉar li devas scii tion plej bone, ĉar li estas fakulo kaj komprenas la aferon. Kaj – ĉar li volas enspezi monon. La lernanto jam je la unua tago de la instruado estas pli prudenta ol sia instruisto. Kiel estus alie imageble, ke li per ununura demando povas meti en embarason sian instruiston?

Pruvoj

„Mi pruvos tion.“ Tio estas, mi fine meme ne supozas tion, kion mi volas kredigi al aliaj.

Oni povas pruvi ĉion kaj nenion; dependas nur de tio, per kies vidpunkto oni riagrdas tion. Tial ĉiu statistiko esprimas malveron.

Sukcesa pruvmetodo katenas la efektivan veron per nediŝireblaj katenoj; ĉar ĝi estas neneio pli ol mem atestita pruvilo por grandioza elokvento.

Unua presado: „Ĉiutaga Gazeto de Berlino“ (Berliner Tageblatt) 24-a marto de la jaro 1913

Paradoksoj

Negoca prudenteco

Tiuj, kiuj havas la plej grandan avantaĝon de milito, krias plej laŭte: „Ni amas la pacon.“ Ili ja scias, kial. –

La plej alta saĝo surtere estas – se pafaĵfabriko karitate donacas al la militvunditoj kaj postrestantoj monon. Tiun ĝi rricevos per interezoj kaj interezoj de interezoj. Kaj – kion ĝi plej preferas – ankoraŭ iom aldone. –

„Donu al Cezaro kio estas de Cezaro, kaj al Dio la propraĵon de Dio.“ Tio estas: Solidaj fabrikitaj idoloj venditaj al la paganoj por sufiĉe da mono. Kaj donacu al la eklezio de via salajro silkan altrotukon. Kaj fidu tion, oni prenos ĝin kaj dankos dece por tio.

Babilaĉo

Amo al la proksimuloj – la militpreteco envolvita en perlamotgriza gazo. –

Dankemo – la postulo de la lupo, kiu indulgas ŝafidon,
ĉar li tromanĝis. –

Sendankemo – la rajtigita kaj plej ĝojiga defendo en
bezono de atakito, kiu sukcese armigas sin. –

Fondaĵo por karitataj celoj – la premanta konscio.

Mono kaj havaĵo

Ŝparemo estas la unua naskdoloro de sensenca disipo. –

Avaro estas radiko de ĉiu malbono, ĉar ĝi estas la esprimo
de la plej senrespekta egoismo. –

Mi amas la liberon, diras la pigrulo, kontraŭe al tio diras
la diligentulo: „Mi bezonas monon. Kaj ĉar ili tute ne
havas ion komunan, ĉiu rigardas la alian kiel azenon. –

Mi certigas min: Sed, se tio celas nur la liliojn sur la
kampo, kiuj nek semas nek rikoltas, kio en tiu kazo?

Kiu pagas siajn ŝuldojn, tiu pliigas siajn havaĵojn, tio
estos por ĉiuj tempoj la plej ŝatata sentenco de la

kreditoro. „Ĉar „lia havaĵo“ rilatas al la havaĵoj de la kreditoro, sed ne, kiel kelkaj ŝajne supozas, al la havaĵoj de la ŝuldulo.

Civilizacio

Kulturo – la tatuoj de la sovaĝulo. –

Supera kulturo – ringo tiritita tra la nazo. –

Komenco de la dekadenco – la unua interkonsiliĝa bivakfajro.

La socio

La apogemo de la homo estas ne nur eterne fluanta fonto de ties ĉiama malforteco; ĝi estas samtempe signo de mankohava evoluo de lia personeco. –

Kiu ne eluzas senrespekte la socion (sed talente dotite kaj lerte) por siaj propraj celoj (kaj tial pli altaj celoj), tiu estas ties sklavo. Se ĝi ne estas tia, ĝi fariĝos tio, plej malfrue morgaŭ. Sed tiam des pli certe kaj tuj kun haŭto

kaj hararo. La ĝojo je sia sklaveco esprimas sin ĉe li per ronrona bonfarto, kaj la sekvo estas: lia absoluta nedanĝereco, la pli lasta estis la celo.

Eltrovo

Je ĉiu eltrovo ni parolas pri grandioza kulturatingaĵo kaj ni estas tre tre fieraj. Sed ni rigardas ĝin unuavice laŭ tio, ĝis kiu grado ĝi taŭgas mortigaĉi finance kaj korpe niajn karajn kunhomojn. Kaj nun ni bonŝance havas la mezurilon, laŭ kiu ni difinas ties valoron.

Murdo de homo

Se oni taksas la murdiston kaj la murditon laŭ ties utileco, la murdisto estas la plej fervora. Oftaj venkintaj popoloj konfirmas la veron de tiu frazo. Spite tion oni preterlasas ĝin timeme tiri la ununure ĝustan konsekvencon el tiu fakto.

La fama viro

La fameco de ĉiu homo, estu kiu ajn, bazas sin sur la brutala perforto de la leĝa juro. Ĉar famo kaj fameco estas nenio alia krom rekono per la plimulto. Kaj laŭ la diro de unu el la plej grandaj filozofoj, la plimulto ĉiam malpravas.

Humaneco

Por la grandanima humaneco de nia erao ekzistas du trafaj esprimoj: „La Ruĝa Kruco“ kaj „la resanigo de la mortkondamnita grave malsana rabmurdisto“. Kiu esprimo el ambaŭ nocioj estas la plej trafa, ni bedaŭrinde ne povas decidi sekve de mankanta distanco. Tion ni devos translasi al la postmondo. Ĝi decidus tre facilanime per tio, ke ĝi skuas la kapon. Feliĉe ni tiam ne plu vivos.

Tradukis Dorothea & Hans-Georg Kaiser kaj Frank Vohla de la klubo Karapaco laŭ „Feststellungen“ und „Paradoxa“.

*Unua presado: Gazeto de Frankfurto (Frankfurter Zeitung),
18-a de majo en la jaro 1913*

POEMO

?

Vian juĵon levu, in',
montru viajn surojn,
rekta bukla stratulin',
donas vi plezurojn.

Iras tien, tien ĉi.

Haltu, kara mia.

Iru ni, mi pagos pli,
pli ja ol alia.

Estu via korp' sen uz',
nur ĝojigu min.

Ridu al mi pro amuz',
trinku de la vin'.

Mankaresu, kara, min,
frunte kun rid' kaj favor'.
Ĉu vi jam divenas ĝin,
kial mi pagas vin per or'?

Rimarko

Ret Marut estis evidente ankaŭ kiel poeto dotita per talento. La titolo estas stranga, sed mi ne scias, ĉu Marut efektive elektis ĝin aŭ ankoraŭ serĉis pli taŭgan, tial mi ne ŝanĝis la titolon. Certa kapriceco en ĉiuj verkoj de Marut kaj Traven renkonteblas, do, povas esti, ke li efektive volis uzi kiel titolon tiun demandosignon. Kaj la poemo estas ja efektive verkita por esprimi en poemformo demandon. (cez)

RAKONTOJ

Fremda soldato

Honesteco

La aktoro kaj la reĝo

La idioto

La monaĥino

La ora buŝo

La rakonto pri la neentombigita mortinto

La vizito ĉe la verkisto PguwlkshrijRnfajbzxlquy

Nebulo

Pentroarto

Trompisto

Fremda soldato

En la lazareton E.L. 14, kiu estis tom proksima al la fronto, ke seninterrompe oni povis aŭdi la obtuzan grumbladon de la kanonoj, venis nur tiuj vunditoj, kiuj tute ne eltenus transporton. Kompreneble ĉi tie la laboro de la flegistinoj estis neimageble fortoraba. Kaj nur la plej bona personaro je kuracistoj, sanitaristoj kaj flegistinoj estis uzata ĉi tie, ĉar nur la plej bona personaro utiligeblis.

Dum por la vunditaj soldatoj la kuracistoj estis la neceseaj kaj nur helpantaj kunhomoj, la flegistinoj estis la pli ŝatataj kaj pli amataj kunhomoj. Ofte dum monatoj la soldatoj ne vidis inon, kaj se tamen iu tute neatendite kaj neesperite kuris en ilian vojon, estis olda ŝrumpigita kaj ĉiam kota inaĉo, kiu similis al la ina estaĵo imagata de la soldatoj tiel, kiel kelera onisko al kolorĝoja papilio. Ju pli longe la soldatoj estis en la milito, ju pli fora ili estis de ilia patrio aŭ de ilia kutima kulturo, des pli iliaj edzinoj, fratinoj, fianĉinoj kaj amikinoj aperis al ili kiel floroblankaj lumfiguroj. Kaj se ili tiam venis vunditaj en lazareton kaj vidis sin ĉirkaŭataj de la sonĝataj, hele

vestataj ĉiam afablaj inaj figuroj, ili fariĝis kiel infanoj.

La komenca timema respekto, kun kiu ili rigardis la flegistinojn ĉe la rekonsciiĝo transiris iom post iom en tian senfinan kortuŝan konfidon, kian povus prezenti ĝin apenaŭ iu alia homa rilato.

Iuvespere oni transdonis en E.L. 14 soldaton, je kiu la ekzamenanta kuracisto konstatis du polmopafojn, ventropafon kaj komplikan rompiĝon de la femuralo, ĉiokaze pro pafado de grenado.

Estis tre grava kazo. Kaj la viro kuŝis sen konscienco.

Homoj, kiuj estas tie dum semajnoj ekstere en la milito, ne plu distingeblas unu de la alia. Sur la vizaĝo, la manoj kaj je la vestaĵo ili ĉiuj aspektas egalaj. Ĉiuj egale sovaĝiĝintaj. Kaj ankaŭ ilia lingvo estas plej ofte tute simila. Kruda, abrupta kaj dishakita, sen tiuj fajnaj diferencoj, per kiuj la erudicia homo distingiĝas de malpli klera homo. Kaj nur post tagoj, se ili estis plurfoje lavataj, banataj, razataj kaj provizataj per puraj vestoj, revenis iom post iom la tavoloj de civitana estinteco kreskinta

dum jaroj aŭ eĉ dum generacioj.

Pri la soldato, kiu nun estis transdonita en la lazareton, oni sciis eĉ ne iometon. Oni havis neniujn indikojn. La viro, sekve de la turmenta doloro, preskaŭ tute malvestis sin, kaj ĉe tio perdiĝis la rekoniga marko. Armilojn, el kiuj oni povus gajni pro la numero signon por apogi opinion, la sanitaristoj ne kunprenis, kaj en la vestoj, ĉar ili eble estis interŝanĝitaj, ne legeblis enkudrita nomo.

Tiel li kuŝis kelkajn tagojn. Kun fermitaj okuloj. Ke li ankoraŭ vivis, palpeblis nur je la frapado de la koro, kaj en longaj intervaloj li laŭte ekĝemis. La femuralo estis splintita. Kaj la ventropafvundon kaj tiun en la polmon oni lasis provizore netuŝitaj. Transportebla li estis neniukaze, pro la ventropafado.

La ĉefkuracisto otrdonis, ke oni ne donu al li iun rimedon, nek por maldolorigo, nek por vekigi lin, oni nur nutris lin laŭ preskribita artifika maniero.

La grupon, al kiu li apartenis, prizorgis la flegistino Malve. Ŝi estis la plej bela ino en E.L. 14, kaj anstataŭ

vuali ĝin, la simpla vestaĵo ankoraŭ grandigis ŝian
ĉarmon. Ŝi estis juna. Krome ŝi venis el tre nobla familio,
ŝi restadis en francaj kaj anglaj penzionoj kaj sciis
multon. Ŝia patro estis staboficiro je unu el la du plej
gravaj frontoj. Sed ŝi estis la plej fervora, plej atentema
kaj plej nelacigebla el ĉiuj flegistinoj, kiuj ĉi tie laboris.
Kaj ŝi ĝuste staris iumatene ĉe la lito de la fremda soldato
kaj mankarezis lin delikate sur la frunto, kiam li vekigis.
Li rigardis ŝin mirigite per grandaj okuloj, kies brilo ŝajne
venis el longe pasinta tempo. Tiam li fermis la okulojn kaj
denove malfermis ilin. Kaj li faris tion plena de nedirebla
senkredemo.

Post iom da tempo li remetis lante la kapon, tiel, ke la
mano ripozanta sur lia frunto devis gliti karesante trans
lian vizaĝon. Jen sentis la flegistino Malve, kion li sopiris,
kaj ŝi karezis lian vizaĝon kaj la manojn kiel al infano.

Ŝi volis foriri por doni al li trinkaĵon. Sed li ne volis
kompreni tion. Liaj okuloj plenigis sin per horora timo.
Flegistino Malve haltis. Jen li prenis heziteme ŝian
manon, firme tenis ĝin kaj diris tre mallaŭte: „Ĉu vi estas
flegistino?!“

„Jes“, ŝi diris.

„Vi nomiĝas Malve, flegistino Malve!“

„Kial vi scias tion?“

„Mi ĉiam aŭdis ĝin, dum jaroj, multajn multajn jarojn. En lando, tre tre fore de ĉi tie, kien mi iros denove, de kie iu vokas min. Ĉu vi ne aŭdis tion?“

„Ne, mi aŭdis nenion.“

„Sed vian nomon mi aŭdis. Malve! Malve!“ Lia voĉo fariĝis pli kaj pli mallaŭta. „Malve estas mirinda nomo. Tia mola kaj bela kaj kantanta kaj jubilanta kia estas vi, Malve.“

Jen ŝi ekhavis la ideon, ke li devas esti aŭdinta la nomon en sia senkonscienco de kuracistoj kaj kamaradoj. Ŝi mankaresis denove lian vizaĝon, sendecide, ĉu ŝi voku la kuraciston aŭ, ĉu ŝi prefere atendu ĝis la malsanulo denove trankviliĝis.

„Vi estas bela, Malve. Mirinde bela. Tiel mi ankoraŭ vidis

neniun inon, tiom bela vi estas.“

„Ĉu vi ne havas fianĉinon? Aŭ gepatrojn? Aŭ belan karan edzinon, al kiu mi rajtas skribi kelkajn vortojn de vi?“

„Malve, ne estu tiom severa al mi, mi devas diri al vi, kiom bela vi estas. Mi amas vin, ĉar vi havas tian kantantan kaj jubilantan nomon kaj plu, ĉar vi estas tiom bela.“

„Ne tiom eskcitiĝu, alie vi ankoraŭ ekhavos febron. Ne parolu tiom multe.“

„Jes, se vi volas tion, flegistino Malve.“

Li metis sian manon al ŝia vango kaj nestigis sian kapon sur ĝi.

Tiam li komencis denove, pli mallaŭte ol antaŭe, preskaŭ nur frustrante: „Mi neniam havos edzinon, Malve.“

„Tamen, tamen, ni tute sanigos vin.“

„Ne, mi scias tion. Mi volus havi fianĉinon. Flegistino

Malve, estu mia fianĉino. Mi amas vin, ĉu vi ne scias tion?“

„Jes, mi kredas al vi!“

„Estu mia fianĉino, Malve. Unufoje. Mi estos tuj morta kaj neniam havos edzinon. Diru ĝin rapide, diru ke jes, antaŭ ol mi devas iri tre malproksimen. Ĉu vi volas esti mia fianĉino?“

Malve fariĝis ruĝa en la vizaĝo kaj diris mallaŭte, kliniĝante malsupren al li: „Jes, kompatinda amiko mia!“

„Ĉu vi amas min, Malve?“

La okuloj de flegistino Malve plenigis sin per larmoj: „Jes. Mi amas vin, mia kompatinda kara amiko.“

Kaj li, kun la grandaj okuloj kun la brilo de pasinta mondo, plena de vea timo kaj plena de tremiga espero, diris flustre: „Malve, kara mia , kara Malve, kisu min.“

Ŝi premis siajn lipojn sur lian brulantan buŝon. Li levis la brakojn ĉirkaŭ ŝian kolon kaj diris proksime al ŝia

orelo:Mia plej kara edzino Malve.“

Tiam ŝi sentis kiel malfortiĝis liaj brakoj. Ŝi liberigis sin softe.

Sed li estis jam morta.

En tiu momento alvenis la ĉefkuracisto kun la aliaj kuracistoj al la lito por fari la kutiman matenan ekzamenadon. Li vidis la soldaton, levis la palpebrojn kaj diris al lia helpkuracisto: „Domaĝe, hieraŭ mi ankoraŭ supozis, ke mi povus savi lin. Kaj neniuj scias, kiu li estas, kio li estas, de kie li venis, kiu trupoparto, ĉu simpla soldato aŭ oficiro, laboristo aŭ sciencisto aŭ artisto. Serĉato do, kiun eble iu atendas duonon de jarcento.“

Tiam li iris al la sekva lito.

Flegistino Malve staris apogite al muro kaj larmis.

Tradukis la karapacanoj Dorothea & Hans-Georg Kaiser & Frank Vohla laŭ „Der fremde Soldat“ el „B.Traven: La frua verko“

Honesteco

burleskaĵo

Povas okazi same tiel bone en alia germana grandurbo. Eble eĉ sufiĉe verŝajne. Sed, mi prefere diru, estis Berlino. Jam tial, ĉar Berlino por ĉiuj okazaĵoj, ankaŭ por romankomencoj estas neŭtrala tereno.

De surstrata fruktkomercisto mi aĉetis du funtojn da piroj kaj kun la intenco ilin tuj manĝi je la aĉetloko aŭ ie proksime. Mi sidiĝis en la kaŝtanan boskon kaj manĝis. Kaj ĉar ĝi kvazaŭ estis stampita en mian sangon kaj karnon sekve de la multaj gazetartikoloj kaj de diversaj „Legantorimarkoj“ ne malpurigi parkojn kaj publikajn bedojn ks. per panpaperoj, frukt- kaj ovoŝeloj, mi pakis la mortemajn postrestaĵojn de la manĝitaj piroj en la grizan pakpaperon, kiun la komercisto kundonis al mi. Ĝi estis intence elektita firma, ĉar kunpesate, ĝi laŭas laŭ pezo al du pugnograndaj piroj, kiujn mi ricevis malpi. Mi konstruis zorgeme kaj pure falditan pakaĵeton kaj intencis postlasi ĝin sur la benko, sur kiu mi sidis. Sed, kiam mi estis irinta du paŝojn, postiris min juna damo,

kiu sidis kun infano sur la apuda benko, transdonis al mi afable la pakaĵeton kun la piroŝeloj kaj diris: „Mi petas pri pardono, sinjoro, vi lasis kuŝi paketon. Bonvolu!“

Ĝentile dankante mi prenis mian pakaĵeton kaj metis ĝin en mian mantelopoŝon, kiu sekve de tio ricevis strange misformitan aspekton. Ĉe la pluirado mi hontis pri tiu ŝarĝo, mi haltis en enirejo de negoca domo, rigardis atenteme la bildojn tie ekspoziciatajn de fotografo praktikanta en tiu domo kaj lasis en favora momento gliti la pakaĵeton el la poŝo. Poste mi foriris anime plezurigite kaj bedaŭris nur ne povi vidi la vizaĝŝanĝiĝon, kiun esprimos la feliĉa trovanto de la pakaĵeto. Sed la imagadon de tiu esprimŝanĝo mi ne povis fini, ĉar viro, kiu postkuris min tute evidente, min atingis kaj transdonis la perditan pakaĵeton al mi, dum li precize ekkonigis per vortoj kaj rigardo la pretendon pri trovantorekompenco, ke mi, ĉu mi volis ĉu ne, estis devigita rekompenci lian servopretecon per dudekkvin-pfeniga monero.

„Kio? Por paketo kun oraĵoj nur dudek kvin pfenigaĉojn? Ĉu vi ne hontas?“

Mi flustris en oreĵon de li: „Enestas ja nur piroŝeloj.“

Post tio li rigardis min tiel strange, ke mi mem komencis fidi pri mia ekĝermanta frenezo. Sed poste li ridis malice kaj diris: „Nu, pro mi. Troŝparemulo avida!“

Mi fariĝis ruĝa ĝis la kolumo, kaj ĉar jam kolektiĝis homoj, al kiuj la viro detale klarigis mian avaron post la ricevo de valizo plena de juveloj, mi saltis en preterkurantan elektran tramon. Ĉe la Aleksandro-placo mi eliris kaj kompreneble lasis kuŝi mian pakaĵeton en la tramo. Pri mia beatiga senposedeco mi ne longe povis ĝoji. La tramo, kiu jam ekmoviĝis, haltis per unu fojo kaj kiam mi aŭdis voki la konduktoron: „Sinjoro, vi lasis kuŝi tion“, mi kuris kiel frenezulo al la Rozovala pordego. Sed mi ne konsideris la konatan antaŭzorgemon kaj helpopretecon de protektpolicisto en Berlino. Li troviĝis proksime de la staranta tramo, kaj petis la kondukiston, ke tiu transdonu la pakaĵeton al li, kaj tiam postkuris min.

„Sed oni ja scias, ke la policistoj estaj ĉiam pli rapidaj ol aliaj homoj. Sekve tion, li proksimiĝis per ĉiu paŝo. Sed,

ĉar mi plu kuris sen rigardi malantaŭen, persekŭtis min baldaŭ pli ol ducent homoj, kiuj terure spektaklis kaj seninterrompe kriis: „Haltu lin! Haltu lin!“

Al tia grego mi ne sentis min egalpova. La policisto firmitenis min kaj rimarkis en la berlina dialekto: „Kial vi kuregas tiel, mi ja volas redoni nur la pakaĵeton je vi, kion vi lasis kuŝi en la elektra.“

„Dankon“, mi diris kaj akceptis la pakaĵon. La protektpolicisto metis manon al la kasko, kaj kiam li faris tion, per unu fojo perdiĝis la bojanta sangavida grego.

Poste mi lasis kuŝi la pakaĵeton en malgranda ondolada dometo. Knabo reportis ĝin al mi. La kostoj laŭ buŝa kalkulado: unu marko. Kiam mi rifuzis pagi kaj promesis al la knabo la pakaĵeton kiel posedon, li fariĝis tiel impertinenta, ke jam pro konsidero de nova kolektiĝo de amaso reformiĝanta, mi pagis la kalkulon.

En la kravata butikoj, kie mi supozis ĝin sub monteto de skatoloj bonege konservita, ĝi ne restis. Vendistino postkuris al mi kaj petis min ĝentile ankoraŭfoje reveni

en la butikon, kie ĝi elegante kunŝnuris la pakaĵeton kaj aldonis kverlignan portilon, por ke ĝi aspektu iom pli bela. Sed nun kaptis min nekontrolebla kolero. Mi devis liberigi min de la pakaĵeto, kaj eĉ se kostus mian vivon; ĉar mi hontus pri mi mem, se mi estus portinta hejmen perfekte kunŝnuritan pakaĵeton, en kiu estas piroŝeloj.

Mi do portis ĝin al la trovoficejo. Sed oni ne akceptis ĝin de mi. Oni redonis ĝin al mi, por ke mi konservu ĝin kaj se ĝi ne estus repostulita dum jaro, mi retenu ĝin. Tiom da honesteco oni konfidas al la berlinanoj en oficejoj.

Tio estis ja ĉio bela kaj bona. Sed nun mi volis des pli liberigi min de la pakaĵeto. Kaj kiam mi hazarde iris trans la ponto de Salivodigo, mi ekhavis genian ideon. Mi starigis min proksime de la balustrado, rigardis enue en la malpuran akvon malsupren kaj kiam mi sentis min neobservata, mi lasis fali la pakaĵeton trans la balustradon en la riveron Spree.

Ĝi klakbrue ekplaŭdis kaj foriĝis. Danke al dio! Sed kiam mi turniĝis por iri plu, kaptas min firma mano je brako. Estas protektpolicisto.

„Kion vi tie ĝuste ĵetis malsupren?“ li diris leĝere berlindialekte.

„Pakaĵeton.“

„Tiel do, nu, kio enestas?“

„Piroŝeloj.“

„Kia aĵo? Piro..?“

„...ŝeloj, jes ja.“

Tiumomente li rigardis min per trapenetra rigardo, tiel, ke mi kvazaŭ kunŝrumpis kaj paliĝis, sentante lian moŝtecon kaj mian ŝtatacivitanan ridindecon kaj neniecon. Tion li ŝajne celis per sia rigardo, ĉar li nun proksimiĝis eĉ pli al mia vizaĝo, li boris sin eĉ pli profunden en miajn okulojn kaj berlinlingve flustris ne laŭte, sed tranĉile akre: „Mi ja diros je vi, kio enestas. Kadavropartoj. Kunvenu. Tute trankvile, vireto, alikaze mi ligos vin per la kverligno. Ĉu vi komprenas?“

Mi devis kuniri. Kaj nur konsiderante, ke mi estis

ankoraŭ tute sen puno, oni liberigis min, provizore.

Sed, se dum la pasintaj lastaj dudek kvar horoj estas okazinta murdo aŭ iu estos sciigata dum la sekvaj dekdu horoj aŭ homo senspore malaperos aŭ ie estos trovita mano aŭ piedo ie ajn, tiukaze mi ektimos. Precipe tiukaze, se ne sukcesos elfiŝi la pakaĵeton el la rivero, kio estas jam komisiita.

Sed dum la sekvaj tri monatoj mi travivis kun timema zorgo pri mia kapo.

Sed momente mi sidas hejme kaj pakas aŭtentikan oran horloĝon, kiun mi aĉetis, en firman grizan paperon, faras similan pakaĵon kiel la estintan kaj metas ĝin tute malsupre en mian vestoŝrankon. Ĉar tiukaze, se la trovoficejo fine ne fidas al mi kaj reserĉas pro mi kaj mi ne plu havos la pakaĵeton, mi devos iri pro trovdefraŭdo al la prokuroro. Absolute certe.

Ja kiu fidus pri la piroŝeloj!

*tradukis la karapacanoj Dorothea & Hans-Georg Kaiser &
Frank Vohla laŭ „Ehrlichkeit“ el „B.Traven :La frua verko“*

La aktoro kaj la reĝo

Politika groteskaĵo

Okazas malofte.

Bonŝance.

Sed unufoje tamen okazis, ke aktoro elektis reĝon kiel amikon.

Eble estis ankaŭ male.

Sed tio estas fine egala.

Ambaŭ estis sinceraj kaj bonaj amikoj. Ili kverelis kaj repaciĝis, tiel, kiel tio kutime okazas inter efektivaj amikoj.

Du jarojn daŭris la amikeco.

La aktoro pri tiu amikeco ne multe bruis, kvazaŭ temus pri la amikeco kun kutima homo.

Iam posttagmeze ambaŭ promenis en la parko.

Je la vespero antaŭe la artisto ludis la rolon de reĝo. Ŝekspira reĝo tiu ne estis. Tiujn la reĝa amiko de la teatro ne ŝatis, ĉar ĉiu el la reĝoj de Ŝekspiro estas spite al sia kvazaŭdia favorateco tute ĝusta homo, kiu amas kaj malamas, murdas kaj regas — tute laŭ tio, kiel ĝuste plaĉas aŭ ne plaĉas al li.

Sed la rolo de la prezentita reĝo el la pasinta vespero estis verkita de poeto, kiu kun dekok jaroj estis anarkiisto, sed pli poste li fariĝis kortega konsilanto. Memkompreneblas, ke tiu rolo tre plaĉis al la reĝo, kaj ke ĝi estis la kaŭzo, kial li interparolis kun la aktoro pri la reĝa problemo de la teatro.

„Kion vi sentas, kara amiko, se vi prezentas reĝon?“

„Mi sentas min tute kiel reĝo, tiel, ke mi ne povus fari geston, kiu ne laŭas la karakteron de reĝo.“

„Tion mi komprenas tre bone.“

„La amaso de la statistoj, kiuj, sekvante la reĝisoradon, devas kliniĝi antaŭ vi, vivtenas en vi la senton de reĝa indo kaj sugestas al la publiko, ke vi estas aŭtentika reĝo.“

„Por la publiko mi restas ankaŭ sen statistoj reĝo — eĉ ankoraŭ tiukaz, se mi staras tute sola sur la scenejo kaj parolas monologon!“

La tute artista kompreno de la aktoro provokis la reĝon fari akre limigitan komparon inter si kaj la sceneja reĝo.

„Netranspontigebla abismo inter la vera kaj la teatra reĝoj tamen ekzistas. Eĉ, se vi ludis la rolon de la reĝo kiom ajn bone, en la momento, kiam la kurteno sinkis, vi ĉesis esti reĝo. La sugesto kaj la statistaro finas vian sanktecon, tuj kiam ili malĉeestas. Sed mi, karulo mia, mi estas plu reĝo, eĉ se mi kuŝas en la lito!“

Pri tio diris la aktoro: „Kara amiko mia, la komparo pravas por ni ambaŭ. Ni veturis antaŭe en la kaleŝo ĝis la pordego de la parko. Sur la stratoj staris kaj kuris nennombreble multaj homoj. Ili salutis — vi dankis. Ili kriis kun tuta forto: Vivu! Ekscelenco! — vi ridetis, iom orgojla. Sed, se tiuj homoj iam ĉesos formi libervole statistaron, tiam vi, amiko mia, ĉesos esti ne nur en la lito, sed eĉ je la hela tago, reĝo!“

La reĝo haltis subite.

Li rigardis la aktoron firme.

Liaj lipoj fariĝis palaj kaj ekstremis.

Subite li turniĝis.

Kun rapidaj paŝoj li iris al la kaleŝo kaj reveturis.

Sola.

La amikeco estis finita.

La amikoj neniam denove renkontiĝis.

Kaj neniam denove la reĝo iris en teatron.

Li fariĝis pensulo.

Li ekhavis la fiksan ideon esti tute kutima homo.

Sekve tion li devis ekŝiĝi.

Kvin jarojn poste li mortis.

Frenezîginte.

Oni diris.

*Tradukis la karapacanoj Dorothea & Hans-Georg Kaiser &
Frank Vohla laŭ „Der Schauspieler und der König“ el
„B.Traven: La frua verko“*

La idioto

SinJORINO Bernhardine Mallaŭtpaŝo posedis grandan karbomagazenon, multe da mono, filon, filinon kaj katinon.

La negoco pri karboj prosperis bone. La mono estis sekure deponita en banko (kaj plimultiĝis), la filo estis idioto, la filino bela (kaj muzike talenta) kaj la katino naskis dufoje ĉiujare idojn.

SinJORINO Mallaŭtpaŝo estis nobla kaj kondukis tia. La mono estis aŭtentika, la idiotismo de la knabo pruvita, kaj pri la geedzco de la filino svatiĝis nobla registara asesoro, kaj la kato neniam kaptis musojn kaj nutris sin nur de lakto.

SinJORINO Bernhardine estis fiera tre baldaŭ fariĝi nobela bopatrino, la mono atendis sopire atingi la certan adreson de la asesoro, la idioto laboris kvazaŭ kiel ĉevalo, la filino legis librojn pri la devoj de edzino kaj patrino, kaj la kato rigardis sin mezpunkto de la universo.

Tiel en tiu familio ĉio estis harmonie interligita, ĉio estis

laŭorda; nur la idiotismo de la junulo ne volis ĝuste adaptiĝi al la kompleta bildo.

Kiam Alfredo ankoraŭ frekventis la lernejon, nomis lin ĉiuj liaj kamaradoj idioto. Ĝis li iam elfiŝis du da ili kaj per pugnoj draste traktis iliajn felojn. Nun ili nur plu nomis lin idioto, se li povis aŭdi tion neniel. Ankaŭ la instruisto diris al li ĉiutage sennombreble ofte, ke li estas idioto, ĉar li ĉiam sidis sur la lasta benko kaj sciis neniam ion. Tial li ankaŭ ne povis fariĝi volontulo dum unu jaro, ĉar li kiel tia devus scii almenaŭ iom. Kaj de tiam li neniam plu povis fariĝi rezerva oficiro. Sed, ke li ne fariĝis soldato, estis tre bona. Tiel la honto ne evidentiĝis.

Ekde sia dekdua jaro li estis en sia libera tempo en la karba negoco de sia patrino kaj de la dekkvara jaro li gvidis ĝin memstare kaj sole. Kaj li komprenis kiel fari negocojn. Tuj, kiam la patrino ne enmiksiĝis plu, neniam plu okazis plendo fare de la klientaro. Kun la koĉeroj, la laboristoj, portistoj kaj ĉevaloj li kunlaboris bonege kaj la klientaro tre ŝatis lin.

Kaj ĉar lia patrino kaj lia fratinetto estis konvinkitaj pri lia

idiotismo, ĝi ne damaĝis, se li laboris de matene je la kvara kaj duono ĝis vespere je la naŭa. En la lukse meblitajn loĝoĉambrojn de la patrino li rajtis eniri nur malofte; kaj kiam vizitanto ĉeestis, tute ne. Pro la laboro liaj manoj fariĝis duraj, lia vizaĝo kutima kaj liaj movoj plumpaj. Li aspektis senstila kaj ĝenananta.

Li dormis en la subtegmenta ĉambro kaj manĝis en la kuirejo. Lia ununura konfidatino estis la servoknabino Franciska Koll, kiu transŝovis en la kuirejo la plej bonajn bongustaĵojn al li, kiu babiladis kun li kaj dimanĉe posttagmeze kunprenis lin al siaj gepatroj. Ĝia patro estis feroformisto kaj tre agrabla laŭ karaktero. La patrino estis aŭtentika honesta firmmana laboristino. Tie Alfredo fartis nedireble bona. Kun tiuj homoj li povis interparoli kiel plaĉis al li, kaj neniu diris, ke li estas idioto, kiel lia patrino kaj fratino faris tion hejme.

Tiam li estis jam dudekunu-jara. Kiam li havis deksep jarojn, vizitis ilin iam onklo Paŭlo. Onklo Paŭlo elkore ekŝatis la junulon pro ties diligento, honesteco kaj memretenemo. Kaj kiam li vidis kiel oni traktas lin hejme, kvazaŭ li estus tute fremda homo, li diris al sia

fratino tute malkaŝe la veron. Sed ŝi forneis tion per tio, ke ŝi klarigis, ke estas afero ŝia kiel ŝi traktas la junulon, ke li estas infano ŝia kaj ne lia. Krome la junulo laŭ ŝi lernis nenion en la lernejo kaj estas tiom senedukita, ke li metas la tutan familion en publikan honton. Ŝi diris, ke li tute ne scias kiel kondukti. La onklo respondis, ke tio estas ja egala. Ne ciuj ni povas esti ĝentlemanoj, kaj se iu fervore laboras, li ne povas aspekti kaj kondukti kiel princo. Tial tuj ekestis kverelo, kaj Alfredo en droŝko veturigis onklon Paŭlo al la stacidomo. Ĉar onklo Paŭlo ĉiam estis bona al Alfredo dum la dekkvar tagoj de sia vizito kaj parolis kun li kiel ankoraŭ neniam alia homo, Alfredo larmis dum la adiaŭado.

Post tio onklo Paŭlo skuis manon de Alfredo kaj diris: „Ne ekscitiĝu plu, knabo mia, restu plu tia, kia vi estas nun, tia fervora, bonkondata kaj bona kia vi estas hodiaŭ, tio pli validas ol la tuta bruo pri edukiteco. La valoro de homo ne troviĝas en ties elegantaj gestoj, sed en ties koro. Fartu bone, knabo mia!“

Kaj for estis onklo Paŭlo. Kaj tiam li subite estis mortinta. Sinjorino Mallaŭtpaŝo veturis al la funebra ceremonio.

Tiam ŝi iris al la notario, kiu ekzekuciis la testamenton.

„Ha, bonan tagon, sinjorina moŝto, nu, kie estas la ridanta heredulo?“

„Vi ja vidas lin antaŭ vi, sinjoro jurkonsilisto.“

„Vi, ĉu? Ho ne! Via filo Alfredo heredis la tutan heredaĵon. Du rente tre enspezigajn terposedaĵojn kaj kvindek kvar mil germanajn regnomarkojn kontantajn. Sed tio ja povas esti tute indiferenta al vi, sinjorina moŝto. La mono restos ja en la familio. La heredulo estas ja via enkorpigita filo.“

„Sed mi estas la enkorpigita fratino de la mortinto. La ulo estis ja freneza. La testamenton mi kontestas pro imbecileco de la testamentinto.“

Tio tute ne helpas al vi, sinjorina moŝto. Via frato estis plene konscia ĝis la lasta momento. Cetere li jam faris la testamenton antaŭ jaro. Via filo ekde kelkaj tagoj estas plenaĝa. Se li petas la heredaĵon, oni povas elpagi ĝin morgaŭ al li – nu, kiel dirite, sinjorina moŝto, en tiu kazo eblas ŝanĝi nenion.“

SinJORino Mallaŭtpaŝo vojaĝis hejmen.

Kaj ŝi pensis, ke tio nun tuj devos finiĝi! Tio ja ne eblas. La sinjoro asesoro atendas nur tial kun sia edziĝpropono, ĉar li tute ne povas havi idioton kiel bofraton, kiu eble iutage subite eĉ stumblos en la plej bonan loĝoĉambron kaj etendas manon al li, dezirante bonan tagon al la kara bofrato.

Alfredo jam ricevis kopion de la testamento. Sed li faris sian laboron, kvazaŭ li estus leginta nenion kaj nenion komprenus el tio. Li manĝis plu en la kuirejo kaj dormis plu en la subtegmenta ĉambro.

Sed sinjoro Mallaŭtpaŝo nun ofte devis iri al la urbestro, al la polico, al la kuratoreca juĝejo kaj al diversaj aliaj instancoj. Iumatene, kiam Alfredo jam faris la unuan mendoveturon, li ĝuste malsupreniĝis de la ŝtuparo, kiam la policisto Urso venis el la etaĝo de la patrino.

„Alfredo, veturigu min tuj al Braŝnic, mi devas plenumi deĵoran aferon en la idiotejo.“

„La oldulo Gluul povas veturigi vin, sinjoro Urso. Mi nun ne havas tempon. Ni havas multe da laboro hodiaŭ“.

„Ho ne, la maljuna Gluul veturigos min dum tia pluvovetero eble eĉ en ĉestratan fosejon. Do veturigu vi min. Via patrino eksplicite ordonis tion.“

„Ĉu mia patrino? Jes, tiukaze estas alia afero.“

Li tamen eniris por demandi ŝin mem. Ŝi kuŝis ankoraŭ en la lito kaj trinkis ĉokoladon.

„Jes, veturigos lin vi! Ek do! Foriĝu nun!“

Alfredo veturigis la droŝkon, post kiam li donis la necesajn ordonojn al la koĉeroj.

Estis kvar veturhoroj ĝis Braŝnic, kaj sekve de la pluvo necesis eĉ pli da tempo. Alfredo pripensis, ĉu li aĉetu por dimanĉo bluan aŭ nigran antaŭtukon por sinjorino Koll, kiu festis tiutage sian naskiĝtagon. Li ricevis ĉiusemajne tri markojn da poŝmono. Kaj ĉar li preskaŭ ne eldonis ion, la antaŭtuko ne devis esti tre malkara. La policisto Urso elkalkulis interne de la fermita droŝko, kiel li plej

bone uzu la tricent markojn, kiujn sinjorino Mallaŭtpaŝo promesis al li, se li estos plenuminta sian deĵoran taskon en Braŝnic je ŝia kontenteco.

Ili alvenis antaŭ la pordo de la hospitalo. Urso elpaŝis kaj lasis atendi Alfredon. Alfredo malsupreniĝis de la sidloko de la koĉero, sidiĝis en la droŝkon, elprenis sian poŝtranĉilon kaj komencis matenmanĝi.

Kiam li estis ŝovinta la unuan pecon da pano en la buŝon, kaj ĵus volis detranĉi iom de la sangokolbaso, malfermis du flegistoj de la hospitalo la droŝkopordon.

„Bonvolu, sinjoro Mallaŭtpaŝo, sinjoro Urso volas interparoli kun vi. Venu, ne daŭros longan tempon.“

Alfredo dejungigis la ĉevalojn kaj sekvis la flegistojn.

„Vi venu al sinjoro dr-o Stelo“, sinjoro Urso akceptante informis lin.

Jen la ĉefa doktoro Stelo envenis, rigardis akre al la okuloj de Alfredo kaj diris: „Bonvolu veni en mian konsultejon, sinjoro...“

„Mallaŭtpaŝo, bonvolu!“

„Jes, sinjoro Mallaŭtpaŝo. Kaj vi, gardopolicisto, atendu momenton. Ne, ne, vi ne kuniru internen. Atendu do tie. Ne longe daŭros.“ Post tridek minutoj dr-o Stelo paŝis el sia ĉambro, kaj kun li Alfredo.

„Do, juna amiko mia, nun veturu hejmen, salutu vian karan patrinon de mi kaj diru al ŝi, ke ŝi nepre memgardu, tio ne estas ŝerco por mi.“

Li skuis manon de Alfred: „Kaj se vi bezonos patrecan amikon, bonvolu pensi pri mi. Do, nun adiaŭ, fartu bone!“

„Nu, ĉu la junulo ne restos ĉi tie“, demandis gardopolicisto Urso tute mirigite.

„Ĝoju, ke ni ne retenos vin ĉi tie kaj salutu foje la urbestron de mi, kaj sciigu al , ke mi – ne atendu, tion mi prefere skribu mem, por ke ankaŭ mi havu plezurhoron. Nu, kaj nun – ?“

„Sed, sinjoro doktoro. La junulo estas ja idioto.“

„Ĉiukaze ne tiom granda ,kiom vi! Kaj kion mi volis diri ankoraŭ..., jes ja, he, Schmidt, montru foje al la policisto la pordon. Li ŝajne ne trovos ĝin mem.“

Kiam sinjoro Urso paŝis antaŭ la pordon, pluvis kvazaŭ el feraj kruĉoj. Alfredo sidis jam sur la koĉera benko kaj ektirigis la ĉevalojn.

„Sinjoro Alfredo, atendu, mi ja volas kunveturi.“

„Nu, vi prefere restadu ĉi tie, la sinjoro doktoro sufiĉe klare aludis tion al vi.“

„Nu, ne kondu tu tiel al mi. Mi fariĝos ja tute malseka.“

„Tion vi eĉ fariĝu. Tial mi ja ne invitis vin kunveturi. Iru trankvile piede, tio bonfartigos vin. Hot!“

„Sed mi petas vin, kara bona sinjoro Alfredo.“ Policano Urso tuŝis per plumpa mano la droŝkopordon.

„Deprenu la manon de la pordo. Aŭ mi vipos vin tiel, ke ektur niĝos via kapo. Tio estas droŝko mia, ĉu vi nun komprenas? Ek do, plaĉe migru survoje!“

Li ekveturis kaj policano Urso staris sendecide. Sed ekvidante la ridantajn vizaĝojn de la kuracistoj kaj flegistoj je la fenestroj de la frenezulejo, li trotis kun sakroj kaj insultoj hejmen.

„Kaj la tri blujn centmarkajn biletaĉojn mi nun ankaŭ perdis. Pri tio li ĉagreniĝis plej multe.

Alfredo transdonis la droŝkon al koĉero, por ke li dejungigu la ĉevalojn. Poste li iris en la kontoron kaj ordigis la kalkulojn, kvitancojn, liverajn atestojn kaj mendilojn, vestis sin per sia dimanĉa kostumo kaj iris al sia patrino.

La sinjoro registara asesoro sidis kun la filino kaj la patrino. Ili sidis ĉe la abunde kovrata tablo kaj ridis.

„Nu, he, ĉu vi fariĝis freneza – kial vi venas ĉi tien sen avizi vin? Ĉu vi ne havas ion por fari en la korto?“

„Ne, patrino, nun ne plu. Sed ĉi tie estas la kontorpaperoj, jen la plenumitaj, jen la neplenumitaj, jen la kaso kaj jen ĉi tie la ŝlosiloj. Ĝis postmorgaŭ tagmeze je la dekdua mi postulas mian monon, kiun mi ricevis de mia patro. Vi

sendos ĝin al familio Koll, tie mi estos du tagojn. Nu, kaj poste – nu do – adiaŭ!“

Kaj jam li eksteris.

En la koridoro li staris ankoraŭ dum momento. La ploroj inundis liajn okulojn. Estis ja lia patrino kaj lia fratino. Ĉi tie estis ja lia hejmo. Li volis reiri al la pordo kaj peti pri pardono. Sed li kunpremis la dentojn, malsupreniris la ŝtuparon, en la stalon, karesis la ĉevalojn, manpremis la koĉerojn kaj laboristojn. Li ankoraŭfoje malrapide ĉirkaŭrigardis en la korto. Kaj poste li forlasis la patran domon.

Tradukis la karapacanoj Dorothea & Hans-Georg Kaiser & Frank Vohla laŭ „Der Idiot“ el „B.Traven: La frua verko“

La monaĥino

(fantomrakonto)

La subdistrikta urbo Ley ĉe la rivero Nahe situas tre idilie enmeze de la plej bela pejzaĝo, kiun oni povas imagi. Sed je daŭro komencas enui eĉ la plej nigraj arbaroj kaj la plej verdaj herbejoj. Speciale, se estas vintrovespero. Kaj se eruditaj homoj, kaj tiaj, kiuj asertas aparteni al ili, ne havas pli bonan por fari, tiukaze ili kunsidas kaj trinkas bierojn. Unu glason post la alia. Intertempe oni trinkas en tiu regiono de tempo al tempo pindon da pfalza vino. La avantaĝo de tiu ŝanĝo de kutimoj estas, ke oni ne devas fari ion dum tro longa tempo, ĝis kiam oni atingas la intencitan celon. Sed antaŭ ol anonciĝas la unuaj heroldoj de la sopirata stato, oni devas provi pasigi la tempon je maniero kiel eble plej malsprita. Tio estas sendube la plej komplika je la tuta afero kaj tiel la plej bedaŭrinda, ĉar severe rigardate estas profanado de la propra celo.

Kaj tiel ni nun sidis kune: la poŝtejestro, la bestkuracisto (la homkuracisto estis geedziĝita), la apotekisto (ankaŭ li

edzigitaj, sed li tamen venis, ĉar li jam havis infanojn plenkreskintajn), juĝisto de la distrikta tribunalo, la referendario (kiu alternis ĉiutempe, kaj antaŭ ol oni povis memorteni la nomon, venis jam novulo) kaj pensiuligita kolonelo, kiu posedis en la urbo Ley vilaon. Ĉiuvespere oni traktis alian temon. Tio estas, oni ne devas legi tion tro serioze. Estis efektive ĉiufoje alia temo, sed se oni atente pripensis, estis la sama temo, kiun oni traktis jam hieraŭ ĝisdetale, nur kun aliaj vortoj kaj laŭ alia vico.

Sed je certa vespero aperis la homkuracisto en nia rondo. Oni tuj rimarkis la novan gaston, ĉar nova temo, ĝis nun neniam menciita, estis ekpriparolata.

La tribunala juĝisto akceptis la kuraciston kun la vortoj: „Nu, doktoro, ĉu vi ankaŭ havas la domŝlosilon ĉe vi?“

Dum momenton la kuracisto emis koleriĝi, sed li baldaŭ rekonsciiĝis pri pli bona kaj diris: „Mia edzino forvojaĝis kaj tial mi timas min sola hejme.“

„Do, pro tio vi venas, ĉu?“

Jen la kolonelo miksiĝis en la interparoladon: „Ve, kion vi

diras! Ĉu vi timas vin? Kial?“

„Pro fantomoj“, diris la kuracisto tute serioze.

Pro la ridado li ne lasis perpleksigi sin, sed ripetis kun la sama solena seriozeco la diritan. „Kuracisto, kiu akceptas fantomojn, tian mi ankoraŭ ne renkontis“, diris nun ridante la tribunala juĝisto.

„La ridado perdiĝus je vi, se vi scius la kaŭzon de mia fantoma timo. Fidu al mi, mi mem ne volus akcepti tion, sed bedaŭrinde ne eblas. Kaj ĉar tio persekutas min je paŝo al paŝo, mi vespere neniam eliras sola. Tial vi ankaŭ neniam trovos min en via oportuna rondo, al kiu mi ne povas kunpreni mian edzinon. Vi kompreneble pensas, ke mi estas sub la pantofloj de mia edzino.“

„Tion ni efektive pensas“, konsentis la apotekisto.

„Sed tiukaze vi pensas tute malĝuste“, certigis la kuracisto. „Nur la timo pro fantomoj estas, kiu malhelpas min vespere eliri la domon.“

„Vi devas ja tamen ofte iri el la domo pro via profesio, ĉu

ne?“ opiniis nun la poŝtejestro.

„Tio estas alia afero, tiukaze do devas esti. Sed kion mi tamen devas trasuferi ĉe tio, tion mi volus deziri eĉ ne al mia ĝismorta malamiko.“

„Nu, doktoro, vi certe scias, ni estu honestaj, fantomoj simple ne ekzistas. Vi, kiel kuracisto, kvazaŭ kiel natursciencisto povas pruvi la malon en ĉiu kazo.“

Ankaŭ la tribunala juĝisto fariĝis nun iom serioza.

„Certe“, konfirmis la kuracisto, „ne ekzistas fantomoj, tion mi scias, sed unu fantomon mi vidis. Ne, ne, vi ne devas rigardi tiel neakcepteme. Ankaŭ nervoza mi ne estas, kaj ebria mi tiam estis tute ne, tiel kiel nun. Mi estis tiam ankoraŭ je la universitato, kaj kiam la ferioj proksimiĝis, mi elektis al mi kamparan urbeton, kie mi kviete povas studi, fiŝkapti kaj bani, kaj kio krome havas la avantaĝon ebligi malkaran vivon. Sed ĉar oni ne estas preta je fremduloj en Groß-Zilchow, mi volis eviti la loĝadon en hotelo, estis malfacile por mi ricevi privatan ĉambron. La malmultaj meblitaj ĉambroj, kiuj ekzistis,

estis ĉiam je dispono de la samaj personoj, kaj se instruisto aŭ oficisto de la magistrato estis devigita labori aliloke, tiukaze lia ĉambro jam ĉiam estis okupita de posteulo.

Jen la hotelestro, ĉe kiu mi loĝis la unuajn du tagojn, atentigis min pri la monaĥejo. La monaĥejo estis konstruaĵo deveninta el la mezepoko, konstruita de monaĥa ordeno kaj priligoĝata dum certa tempo de tiu ĉi vira ordeno, poste de ina ordeno. Sed tiam ĝi servis al la profanaj celoj de la grenkomercisto Lemberger. Sinjoro Lemberger uzis la suban etaĝon kiel deponejon, dum li lasis la unuan etaĝon en sia romantika origineco, kun la sola diferenco, ke li plenigis parton de la malnovaj monaĥaj ĉeloj per mebloj kaj parte fordonis ilin al sia komercista personaro, parte li uzis ilin kiel ĉambrojn por fremduloj, se liaj filoj en la feria tempo invitis studamikojn al si.

Tio iris certan tempon tre bone. Sed iutage klarigis librotenisto, ke li ne plu povas elteni tie, ĉar la monaĥoj kaj monaĥinoj tie en la nokta tempo terure fantomadas. Kvazaŭ nur tiu instigo estus necesa, diris de tiam ĉiuj

junaj homoj, kiuj vivis en ĝi, similan. Ili ofte ne kuraĝis hejmeniri, se fariĝis tro malfrue, sed prefere serĉis tranokteblon ĉe iu konato ol iri en la monaĥejon je malfrua vespera horo. Kelkaj el la junaj homoj ankaŭ nur tial maldunĝiĝis laŭdire nur por ne devi vivi en tiu domo. Sed la veran kaŭzon neniam iu diris, ĉar ili timis, ke oni ridos pri ili.

Mi kompreneble ne akceptis la sensencaĵon. Ja por kio mi estis medicinstudento? Estis eĉ fascino de propra maniero povi loĝi en tia romantika domo. La monaĥejo estis konstruita en frue gotika stilo kaj aspektis mirinda. La vastaj haloj, la larĝaj ŝtuparoj kaj vastaj irejoj efikis vere trankviligaj. Ĉi tie oni ekhavis la emon, ja veran obsedon por laboro.

Mi do iris al sinjoro Lemberger.

„Tre volonte mi ludonas al vi la ĉambron, sinjoro studanto“, li diris al mi, „vi loĝu tie ridinde malkare. Vi matenmanĝos kun ni kaj devos doni nur konsiderindan krommonon al la junulino, kiu priservos vin. Mi pensas, ke vi povos konsenti tion. Sed ĉu vi vere longe eltenos tie,

tio estas afero alia.“

„Kial?“

„Nu, tie nokte fantomiradas la monaĥoj kaj monaĥinoj.“

„Kiu iradas tie?“

„Nu, la iamaj monaĥinoj.“

„Ĉu efektive? Tio devas esti ja tre agrabla. Jes, sinjoro Lemberger, la ĉambron mi akceptas. Certe. Al tia monaĥineto mi devos konatiĝi. Tiu ne ĉiutage renkonte venas al oni.“

„Ne aŭdacu tro, juna amiko.“

„Kion vi pensas pri mi? Mi estas ja medicinisto. Vi foje rigardu kiel mi traktos la spiritojn kaj fantomojn. Tiujn mi ĉiujn forpelos por vi.“

„Se tio sukcesos al vi, mi elspezos rafinitan ĉampanan matenmanĝon al vi.“

„Konsentite, sinjoro Lemberger, mi kvazaŭ jam gajnis

ĝin.“

„Bone, decidite. Se vi volas, vi povas ekloĝi tie ankoraŭ hodiaŭ. Mi tuj lasos pretigi la ĉambron.“

Je la sama vespero mi transloĝiĝis en la monaĥejon.

Kvankam mi havis la intencon iri hejmen foje je la dudekunua, mi ekiris tamen nur noktomeze. La fakto, ke mi posedis la kuraĝon transloĝiĝi en la monaĥejon, en la urbeto tuj konatiĝis. La tablo en la „Ora Ringo“, ĉe kiu mi sidis je tiu vespero estis sieĝata de amaso da sinjoroj, kiuj volis konatiĝi al mi. La fino de la afero estis, ke laste oni rakontis la plej hororigajn fantomrakontojn, kiaj imageblas, kaj kiuj efikis eĉ pli aŭtentikaj pro tio, ke ĉiam travivis ĝin avo aŭ avino de la rakontanto mem.

En tiu iom hororigita animstato mi nun venis hejmen.

Mi ne estus mirinta, se mi renkontus sur la ŝtuparo aŭ en la vasta halo en la teretaĝo monaĥon aŭ ion similan.

Multe pli mi miris pri tio, ke je tiu unua vespero eĉ ne la plej eta afero okazis. Je tiu vespero, kiu pli bone taŭgis ol iu alia klarigi ĉiun fantomaperon.

Tutan semajnon mi vivis nun jam tie sen tio, ke mi travivis ion. La afero ŝajne komencis perdi ĉian intereson. La famo, kiun mi komence akiris kiel sentima heroo, evidente kunŝrumpis en la rondoj de la loĝantaro. Sinjoro Lemberger je tiu tago – estis dimanĉo – invitis min al tagmanĝo kaj ĉe tio faris al mi la ĝojigan sciigon, ke li rigardas min gajninto kaj morgaŭ surtabligos kun hurao la promesitan ĉampanan matenmanĝon. Posttagmeze mi migris dum horoj trans herbejoj kaj kampoj. Tiam mi hejmiris kaj surmetis novajn botojn. Poste mi manĝis en ĝardena gastejo la vespermanĝon.

Kiam mi venis hejmen, ekbatis la preĝeja sonorilturo jus la dudektrian. Mi supreniris lante kaj iom lace la ŝtuparon. Mi pensis ĝuste pri fiŝkapta loko, kiun laŭde ofertis al mi sinjoro ĉe nia vespera tablo, jen subite transkuris mian haŭton la hororiga sento, ke iu sekvas al mi sur la ŝtuparo. Mi turniĝis, sed en la malhelo mi ne kapablis vidi ion. Mi ekstaris kaj aŭdis mallaŭtan pezan spiradon, kvazaŭ iu sur kruta vojo devas porti ŝarĝon. Kiam mi iris plu – estis ankoraŭ nur plu kelkaj ŝtupoj – mi ekaŭdis denove la treniĝeman supreniradon de la

nevidebla gasto. Supre je la lasta ŝtupo mi haltis. Mi aŭdis ankoraŭ plian fojon la astmecan anheladon. Tiam ĝi silentiĝis.

Mi iris en mian ĉambron, funkciigis la lampon kaj lumigis tiel la irejon. Tiam mi iris kun la lampo ĝis la ŝtuparo. Kompreneble mi trovis nenion. Fine mi venis al la konvinko, ke miaj ŝtreĉitaj nervoj ion antaŭludis al mi.

La ĉampanan matenmanĝon je la sekva tago mi petis prokrasti. Sinjoro Lemberger demandis mirigite, pro kio. Mi senkulpigis min per tio, ke mi havas kapdolorojn pro drinkado. Li diris, ke la manĝo ja ne forkuros de ni, ke li tamen ne kontestas la gajnon. Kaj ja ankoraŭ troviĝos okazo glatigi la aferon pri la ĉampana matenmanĝo.

Je la sekva vespero mi iris je la dudekdua en la domon. Mi ja ne volis koncedi tion al mi mem, sed tamen estis vere, ke mi estis iom nervoza, kaj ke tio estis la kaŭzo por iri pli frue en mian ĉambron ol mi farus tion aliokaze.

Mi apenaŭ havis la unuajn tri ŝtupojn de la ŝtuparo post mi, kiam mi jam ree aŭskultis la treniĝeman brueton post

mi. Kun mia tuta voloforto mi provis enflustri al mi, ke tiu stranga brueto devenas de la malnovaj vermboritaj ŝtupoj, sed mi devis konstati, ke la ŝtupoj ja ne estas el ligno, sed el ruĝa sabloŝtono, kaj ke ties profunde kavetigitaj areoj pruvas honorindan aĝon. Fulmrapide mi volis serĉi novan klarigon, sed tio ne sukcesis. Kaj kvankam ŝajnis min, ke la ŝtuparo tute ne finiĝas, mi tamen fine supreniĝis, sen klariĝi al mi ĝuste, kiel mi iris la lastajn ŝtupojn. Supre alveninte, mi pensis kompreneble, ke la hororiga fantoma apero trovis sian finon, tiel, kiel ankaŭ hieraŭ. Sed ĉifoje la treniĝemaj paŝoj sekvis min la tutan longan irejon kaj perdiĝis nur tiam, kiam mi malfermis mian pordon.

Memkompreneble mi volis nun, kiam mi troviĝis en mia ĉambro, rekonduki la aferon al natura cirkonstanco. Mi venis al la klarigo, ke la paŝoj estas nur eĥo, en la plej malbona kazo, posteĥo de miaj propraj paŝoj. Sed tiu klarigo je la sekva vespero estis renversita. Mi aŭdis la paŝojn post mi sur la ŝtuparo, tiam post mi sur la irejo, kaj opiniis ilin, sekvante mian hieraŭan klarigon, posteĥo de miaj paŝoj. Sed kiam mi estis malferminta la pordon kaj

intencis refermi ĝin, mi havis la teruran senton, ke iu samtempe kun mi volas enŝteliĝi en la ĉambron. Mi rapide malfermis la pordon post mi kaj turnis la ŝlosilon interne dekstren. Momenton mi staris aŭskultante en la malhela ĉambro, kaj ĵus volis ekbruligi lampon, jen mia spiro haltis. Mi ne estas timemulo, sed se mi estus povinta vidi min en la spegulo, mi min mem rigardus fantomo. La fantomo ekstere sur la irejo certe ne povis esti pli terura. Mi ja aŭskultis tute precize kiel tiu io ekstere sur la irejo atendis certan tempon, tiam profunde ekĝemis, fine lace kaj peze repaŝis sur la longa irejo kaj grimpis sur la ŝtuparo malsupren.

Je tiu vespero mi dormis la unuan fojon en mia vivo post fermita pordo.

Fakte mi estus devinta transloĝiĝi aliloken. Sed mi timis la mokon, kaj tiun des pli, ĉar mi estis ja kuracisto. Mi loĝis do plu tie. Mian korpon kaj mian vivon ĝi ja ne atakus, mi pensis. Mi ankaŭ ankoraŭ neniam aŭdis, ke fantomoj – eĉ tiam mi ja ankoraŭ tute ne akceptis tion – korpe povas suferigi vivantan homon. Atakeblaj estus do nur miaj nervoj. Kaj kontraŭ tio mi opiniis min

preparita. Tio estas ja facila, se oni jam atendas ion certan, eĉ se ĝi estas la plej terura. La plej terura atako al la nervoj estas ĉiam la subita, la neatendita atako. Kaj mi atendis la plej teruran, kio eblas iel ajn.

La sekvan vesperon tiu io sekivs min denove ĝis la pordo. Mi premiĝis rapide en la ĉambron, fermis la pordon kaj aŭskultis denove la ekĝemadon. Sed en la sama momento, kiam mi aŭskultis, ke tiu io malproksimiĝas, mi rapide remalfermis la pordon kaj lumis per elektra poŝlampo en la irejon. Nenio videblis. Mi vokis laŭte: 'Ĉu tie iu estas?' Mortosilento. Mi iris ĝis la ŝtuparo kaj lumis tie malsupren. Ankaŭ tie nenio videblis. Mi ree demandas. Neniu respondo. Mi reiris en mian ĉambron, aŭskultis momenton post la pordo kaj aŭdis klare inan voĉon plendantan: 'Jes, estas iu ĉi tie.' Mi malfermŝiris spite al mia komprenebla ekscitiĝo la pordon, eklumigs rapide la lampon kaj mi kompreneble ree ne vidis ion. Mi ankaŭ denove demandis. Neniu respondo. Mi fermis la pordon kaj aŭskultis nun la paŝojn, iu ajn iris lante kaj lace al la ŝtuparo. Sekve tion mi preteriris sur la koridoro tiun iun sen vidi tion. Ĉar ĝi certe staris tie, meze de la

koridoro.

Mi ne pensas, ke iu nevidebla io povas doni al mi klare kompreneblan respondon. Bone, mi do volas konjekti, ke la laŭdira respondo de la nekonata estaĵo estis nur la eĥo de miaj propraj similaj vortoj, kiuj postsonadis en mi.

Je la sekva vespero okazis kompreneble la sama afero. Sed eble mi fermis iom malpli zorgeme la pordon ol en la antaŭaj vesperoj. Ĉiukaze en tiu momento, kiam mi malfermis mian pordon, kaptis min la sento, ke ĝuste la nekonata io apud mi enŝteliĝis en la ĉambron kaj troviĝas kun mi en la sama ejo. Se mi estus fordoninta min al la hororo, kiu volis ekposedi min, mi certe estus freneziĝinta. Ĉar, antaŭ ol mi estus kurinta laŭ la longa irejo kaj poste la ŝtuparon malsupren kaj laste ankoraŭ estus malŝlosinta la seruron de la dompordo, mi delonge renversiĝus. La plej bona en tiaj hororaj momentoj estas ĉiam resti fride sanga kaj venki la suprengrimantan timosenton kun ĉia forto. Estas multe pli facile ol ŝajnas; jam nur la provo donas fortegon kaj deturnigas la pensojn. Se la hororo je dua fojo revenas, ĝi estas apenaŭ plu danĝerega.

Mi kolektis miajn lastajn fortojn kaj pensis, ke forkurado ne havus sencon kaj nur pliigus la timon. Unue do funkciigi lumon.

La lampo brulis kaj mi vidis nenion. Mi direktis la lumon al ĉiuj anguloj, sub la tablon, sub la liton, en la ŝrankon. Nenio videblis. Spite tion la sento, ke mi ne estas sola en la ĉambro, fariĝis pli kaj pli forta. Por distri min mi prenis libron kaj komencis legi. Dum certa tempo efektive sukcesis deturnigi miajn pensojn. Sed subite mi sentis tute softan spiron apud mia vizaĝo. Mi turnis min kaj vidis flagrantan brileton post mi, kiu penis transformiĝi en figuron. Mi eksaltis kaj vidis, dume mia lampo ŝajnis al mi profunde malheligita, damon en monaĥa vesto kun malfermita, longa, malsupren pendanta, mirinde bela ruĝa hararo el ore lumantaj koloroj. En la unua momento mi pensis, ke mi nun propre devus terure ektimi, kii, forkuri aŭ renversiĝi pro hororo. Estis strange, ke mi ne havis eĉ la plej etan timon. Tio certe devenis ne laste de tio, ke la monaĥino ne aperis kiel nebulfiguro, sed kiel vivovarma natura homo, kiun oni preterirus, se oni renkontus ŝin sur strato, sen tio, ke ŝi frapus la atenton eĉ

nur en la plej eta grado. Mi ja nun povis kapti ŝin per mano por konvinki min, ĉu la ino estas vivanta aŭ eble trovis tra kaŝita pordo eniron en mian ĉambron. Sed kiam mi faris paŝon al ŝi, ŝi retropaŝis por eviti mian tuŝadon. Tial mi lasis de tio ankoraŭfoje proksimiĝi al ŝi. Tiel mi plu povis pensi, ke ŝi estas vivanta homo, kaj ke mi ne havas kaŭzon timi ŝin. Sed kiel dirite, mi havis eĉ ne la plej etan penson pri timo. Mi estus povinta tute bone konversacii kun ŝi, ja eĉ inviti ŝin al teo sen senti hororon. Kio frapis mian atenton, tio estis iliaj profunde malĝojaj okuloj, en kiuj embuskis tamen tiom da arda sentpercepto, kiel mi ankoraŭ neniam trovis tion ĉe damo. Ŝi havis en sia vizaĝo kaj en sia figuro, kiuj estis tute junulaj kaj ne montris fantomecan magrecon, ion, kio min en malpli terura momento estus pelinta en staton de sensenca furiozo.

Ni rigardis nin dum longa tempo, dum kiu mi povis studi ĉiun ununuran trajton de ŝia vizaĝo kaj fiksi ilin neforgeseble en la memoro. Sed en la sama momento, kiam mi volis paroli al ŝi, ŝi solviĝis en tiun flirtantan trembrilon, en kiu mi vidis ŝin la unuan fojon.

Mia lampo brulis denove hele, mi staris meze de mia ĉambro, do, tute ne eblis, ke mi sonĝis tion, kaj mi sentis kiel mi nun ekŝvitis torente.

Spite tion mi rapide ekdormis, tuj kiam mi enlitiĝis kaj dormis trankvile ĝis la mateno.

Je la sekva vespero mi venis hejmen, aŭdis nek sur la ŝtuparo nek sur la irejo brueton, fermis la pordon kaj eklumigis la lampon. Mi pensis pri tio, kio sekvos hodiaŭ, jen mi aŭdis brueton en mia ĉambro, kvazaŭ iu senvestigas sin kaj enlitiĝas.

Mi turnis min kaj sur mia lito kuŝis – la monaĥino en noktovesto, ŝia kapo estis nestigita en la ruĝajn ondegojn de ŝia hararo, la okulojn ŝi pasie sopirante turnis al mi. Mi vidis klare la profundan premaĵon de ŝia korpo en mia lito. Ŝi levis la brakojn, disvastigas ilin kaj en la sama momento la lito estis jam malplena. Sed ĝi estis glata kiel ĉiam.

Kaj tamen mi vidis la pufiĝintajn kusenojn de la lito dum ŝi ripozis en ĝi.

Dum tiuj lastaj pasintaj tagoj mi rakontis nenion pri tio, kion mi travivis. Mi volonte koncedas, ke mi timis iri en la domon, tuj kiam fariĝis malhele, kaj pli ol unufoje mi pripensis, ĉu ne estas pli bone transloĝiĝi de tie. Sed laste ĉiam venkis la vigla intereso pri tio, kio ankoraŭ eble okazos. Mi fariĝis tre scivola pri tio, kiel tio ankoraŭ finiĝos. Tiam mi havis ankaŭ la iometan esperon, ke sukcesos trovi naturan klarigon por la okazaĵo. Sed trovi tiun estas des pli facile ju pli malmulte oni lasas influi sin de la timo. Timo al la horora okazaĵo ĉiam koncedas potencon, kiu malfacile venkigas.

Je la sekva vespero mi revenis denove tre malfrue hejmen. Eble estis mallonge antaŭ noktomezo, kiam mi malfermis la dompordon. Tio ĉiam tre longe daŭris, ĉar la ŝlosilo sekve de pramalnova konstruĉio nur tre inerte malfermeblis. Mi ĝuste estis referminta la pordon kaj ĝuste volis iri al la ŝtuparo, kiam min iu io devigis turni la rigardon pli dekstren en la grandan halon, tra kiu mi devis iri. Interne estis blindige hela lunbrilo, kaj tra la altaj pintarkaj fenestroj falis la laktoblankaj radioj longe en la halon kaj plenigis ĝin per pale verda lumo. En la

halo staris larĝaj ŝtonaj kolonoj, sur kiuj la plafono kun sia alte volbitaj gotikaj pintarkoj kuŝis kun sia tuta ŝarĝo. Kaj mia rigardo falis sur unu el tiuj kolonoj, kaj je enmasonita ringo pendis la monaĥino en la sama noktovesto, kiun ŝi hieraŭ surhavis, kiam ŝi kuŝis sur mia lito. Mi tuj rekonis la noktoveston, ĉar ĝi estis ornamita per tia tiom stranga paliĝinta flava kaj malmoderna brodaĵo, kiu aspektis okulfrape alie ol la blanka koloro de la ina korpo. La piedoj estis vestitaj per facilaj ŝuoj el venene verda koloro laŭ mezepoka modo. La hararo, kiu tiumomente aspektis ankoraŭ pli flame ruĝa ol hieraŭ, pendis malfermita ĉirkaŭ la klinita kapo. La okuloj estis fermitaj. Sed kio ŝajnis strange, estis, ke la vizaĝo de la ino, kiu hieraŭ aspektis vivofreŝa, en tiu momento estis tiu de mortulino. Kiam mi vidis pendi la inon je la kolono, mi volis forkuri. Sed jen mi ekhavis la penson, ke ja la ŝlosilo malfacile malfermeblis. Kaj antaŭ ol mi estus malfermita ĝin, la timo min estus vorinta. Mi do eltenis. Unue mi kompreneble pensis, ke la lunlumo kaŭzis refraktiĝon en la fenestroj tiel strange, ke la lumradio aperigis la bildon sur la kolono. Kaj mi supozis tiam, ke mi per unu fojo havas por ĉio sufiĉan klarigon. Mi

ekfunkciigis mian poŝlampon. Ĉar ties lumo estis multe pli hela ol la luno, la hororiga bildo fakte tiam estus devinta foriĝi, se ĝi ĵus estus deveninta de la fraktiĝo de la lunradioj. Sed la bildo ne malaperis, sed ĝi aperis nun en la forta lumo de la lampo eĉ pli konturita. Mi iom proksimiĝis kaj vidis poste, ke sur la vangoj de la ino brilas grandaj malsekaj ploroj kaj ankaŭ krome distingiĝas nenombreble multaj spuroj de fluintaj ploroj.

Tiel strange kiel tagon antaŭe malaperis ankaŭ ĉifoje la damo.

Mi iris nun al la kolono, rastante lumigis ĝin kaj trovis kompreneble nenion krom la enmasonitan ringon. Estis cetere la ununura kolono, kiu havis ringon, kies celon mi ne povis klarigi al mi.

Mi ne scias, de kie mi prenis la kuraĝon. Sed mi iris tamen en mian ĉambron, kie mi renkontis ĉifoje nek sur la ŝtuparo nek sur la irejo nek en mia ĉambro eĉ la plej sensignifan aferon, kvankam mi firme atendis tion.

Je la sekva tago mi aŭdis de civitano de la urbo, ke

ekzistas kroniko de la monaĥejo, kiun oni konservas en la urba arkivo. Oni ne donis la kronikon al mi hejmen, sed permesis al mi legi ĝin en la urbodomo. Tie mi ankaŭ trovis tekstparton, kiu esprimis per tro da detalemo kaj malfacile komprenebla lingvo, ke juna monaĥino, kiu kontraŭ sia volo estis devigita fariĝi monaĥino, en la lasta nokto de sia dujara noviceco sin pro naŭzo kontraŭ la monaĥeja vivo pendumis je la ringo en la dua kolono dekstre de la eniro. Je la sekva tago ankaŭ juna patricia filo de la urbo, al kiu ŝi rilatis laŭdire en amo, mortigis sin libervole per veneno. La novicino laŭdire estis tre bela, sed la plej bela je ŝi estis ŝia abunda ruĝe blonda hararo.

Ĝis ĉi tie, sinjoroj miaj, tio estas tute ĉiutaga fantomrakonto. Io eksterordinara apenaŭ troveblas en ĝi.

Sed la plej strangan mi ankoraŭ travivis pli poste. Kaj tio kun fantomapero propre tute ne havis rilaton. Kaj ĝi tamen estis pli terura ol ĉio antaŭa.

Mi konatiĝis al diversaj homoj, kiuj loĝis antaŭ mi en la monaĥejo kaj eldemandis ilin pri tio, kion ili tie travivis kaj vidis. Tiujn, kiujn mi demandis, ĉiuj informis min pri

tio, kion ili jam aŭskultis de siaj antaŭuloj, tiel, ke mi povis kolekti tre multajn informojn. Strange estis do la sekva: ĉiuj, kiuj loĝis tie, sciis rakonti pri tio, ke ili aŭdis ŝteliri paŝojn post si, kaj ke ili ĉiam havis la senton, ke iu akompanas ilin sur la ŝtuparo supren. Sed neniu vidis ion.

Spite al tio mi transloĝiĝis kaj ree ekloĝis en la hotelo. Malmultajn tagojn poste mi iris promeni en arbaro. Je agrabla loko mi kuŝiĝis kaj foliumis en libro, kiun mi kunportis. Sed mi ne eklegis, sed mi observis la skarabetojn, kiuj tumultis sur la musko. Jen mi havas la senton kvazaŭ iu daŭre rigardas min. Mi rigardis supren kaj vidis – mian monaĥinon. Ŝi staris proksimume dek paŝojn antaŭ mi, kun la ĉapelo en la mano, en facila bone tajlorita somera robo kaj rigardis min plu.

Kompreneble mi pensis tuj, ke tio estas mia aperaĵo el la monaĥejo, kiu ankoraŭ en mia memoro postremis. Dubo estas absolute ekskludita. Mi havis la trajtojn de la ino tiel precize en la memoro, ke mi ne povis erari.

Por tio la vizaĝo estis ankaŭ multe tro rara kaj stranga.

Estis unu el tiuj vizaĝoj, kiujn oni vidas nur unufoje por neniam plu forgesi ilin kaj kiel ili ankaŭ neniam plu aperos al oni. Kaj la ruĝe lumanta hararo, kiu montris tiom strangan kaj nekompareblan koloron, povis aparteni nur al mia monaĥino. Al neniu alia.

Sed subite, dum mi ankoraŭ mirigite rigardis la inon, ŝi klinis la okulojn kaj fariĝis profunde ruĝa ĝis la nuko. Mi vidis, ke ŝi propre volis forkuri, sed io retenis ŝin. Io.

Lante ŝi levis tiam siajn okulojn kaj diris kun petola tono en la voĉo: 'Bonan tagon!'

Mi pri tio, ke ŝi parolis, tiom ekmiris, ke mi tute ne pensis pri tio respondi la saluton. Sed tiam ŝi pli proksimiĝis al mi, donis la salutmanon al mi kaj diris ankoraŭfoje: 'Bonan tagon!' Kaj ĉar mi ankoraŭ hezitis, ŝi prenis rezolute mian manon, skuis ĝin forte kaj diris: 'Nu, ĉu vi ne volas saluti min? Kial ne? Ni ja konas nin.'

Mi sentas la varman firman premon de ŝia mano, vidis kiel la ruĝeco de ŝia embaraso retiriĝis por liberigi lokon al la origina koloro, sed mi ankaŭ vidis la profunde

melankoliajn okulojn de mia monaĥino kun la pasia ardego en ili.

Sed ŝi estis ja tute vivanta homo, same tiel vivanta kiel mi. Kaj jen mi respondis la manpremon kaj diris: 'Bonan tagon, fraŭlino mia!'

'Nu, finfine', ŝi respondis, 'tio ja diable longe daŭris, kvankam ni konas nin tiel bone.'

'Ni konas nin, ĉu? De kie, fraŭlino, se mi rajtas demandi vin?'

'Ja, de kie? Tion mi povas nun, kiam vi demandas min, vere ne plu povas diri. Mi pensis, ke scias vi tion. Estas al mi tiel, kvazaŭ ni konas nin jam du semajnojn. Tamen, nu, se vi diras, ke vi ne konas min, tiukaze certe estas ĝuste, ke mi eraras. Sed mi vere ne povas klarigi la eraron al mi. Eble mi nur songis tion. Oni songas kelkfoje sufiĉajn stultaĵojn, ĉu ne?'

Sed ĉar ŝi plaĉis al mi, mi diris: 'Ni tamen povas esti plu bonaj amikoj, ĉu ni emas?'

'Volonte mi volas'. Gaje kaj sen embaraso ŝi respondis al mi.

Ŝi estis la filino de bonstata tolfarista familio, kiu loĝis jam dum jarcentoj en la urbeto. La patro jam delonge estis morta. La patrino mortis antaŭ tri jaroj. Ŝi loĝis kun maljuna onklino kaj maljuna servistino en rave situanta domo, kiun ŝi heredis kun konsiderinda posedo. Mi tiam baldaŭ vizitis ŝin. En ŝia loĝoĉambro frapis mian atenton bildo de ŝi en vivnatura grando. Sed ĉar min mirigis la popolkostumo, kiun ŝi havis sur tiu bildo, mi eksciis, ke tute ne estas ŝia bildo, sed tiu de unu el ŝiaj antaŭuloj, kiuj jam devas esti mortaj dum multaj jarcentoj. La bildo laŭ ŝi estis tre malnova kaj refreŝigita antaŭ kelkaj jaroj, kaj tial ĝi laŭ ŝi aspektis tiel nova. Apud ĝi pendis portreto de viro, ŝajne same tiom antikva. La vizaĝo frapis mian atenton pro la tre eĝohava mentono.

Ni tiam ofte promenis kaj preskaŭ ĉiuvespere mi estis la gasto en tiu domo. Antaŭ ol mi forlasis la urbon, ŝi akceptis fariĝi mia edzino. Ŝi estis ekster si pro feliĉo. Mi rapidis pri mia ekzameno. Jaron poste mi edzinigis ŝin. Nia edzeco estis tre harmonia.

Ŝia onklino baldaŭ mortis post nia nupto. Ni vendis la domon. Mi volis ĝin reteni en nia posedo, ĉar ni ne bezonis la monon. Sed ŝi fervore urĝadis min vendi la domon, kio ŝajnis al mi neklarigebla pro la persistemo. Ĉiujn eblajn kaŭzojn ŝi uzis por pravigi la vendon. Fine mi diris, ke jes, ĉar estis ja posedo ŝia. Mi pli poste ĉiam pensis, ke tiukaze, se la domo ne estus vendita, ĉio sekvonta eble estis evitebla. Eble. Sed tiam estus trovinta sin alia kaŭzo, kiu rapidigus la kuron de la sorto. Tio supozeblas kun sufiĉe granda certeco.

Unu kaj duonon de jaro ni estis geedzoj, kiam mia edzino petis min, ke mi uzu parton de nia ripoza vojaĝo por tio viziti ŝian hejmlokon. Ŝi volis revidi la lokon de sia infaneco kaj ornami la tombojn de siaj gepatroj.

Eble estis ankaŭ iom da vanteco en la ludo. Ĉar ŝi volis montri al siaj iamaj kamaradinoj, kiom feliĉa ŝi estas.

Ni vojaĝis al la malgranda urbeto kaj transloĝiĝis en hotelon.

Sed je la sekva mateno diris mia edzino al mi, ke ŝi ne

povas elteni la hotelon, kaj tial ŝi petis, ke ni transloĝiĝu al alia loko. Ni bedaŭris nun ambaŭ, ke ŝia domo ne plu apartenas al ni. Ŝi volonte ree transloĝiĝus tien. Sed aliaj loĝis tie. Ŝercante mi proponis: 'Ni ja povos transloĝiĝi en la monaĥejon, sinjoro Lemberger certe volonte akceptos nin.'

Mi ektimis, kiam mia edzino diris: 'Je la monaĥejo, kaj nur pri la monaĥejo mi ĝuste pensis, kiam mi ekhavis la senton, ke mi ne plu povas elteni en la hotelo. Mi tre volonte, por mia vivo volonte volus vivi en la monaĥejo. Tio jam en la infaneco estas mia ununura kaj plej pasia deziro. Estas al mi, kvazaŭ mi tie estus hejme. Ĉu vi ne kiel fraŭlo dum certa tempo tie vivis?'

'Jes', mi konfirmis.

'Mi vidas tiom volonte la lokojn, kie vi estis estinta, antaŭ ol mi konatiĝis al vi. Estas tiukaze ĉiam al mi, kvazaŭ vi fariĝus tiel pli parenca, pli intima al mi, se mi vidas, kio vin ĉirkaŭis pli frue, tie, kie vi postlasis ion de via animo.

Nenio helpis, ke mi rakontis al ŝi, ke la monaĥejo estas

hantata. Ŝi opiniis, ke ŝi ne timas tion. Kaj, ke en la monaĥejo ŝi tute ne timas ion. Kaj, ke ja ankaŭ mi ĉeestas. Kaj, ke estas tiom mirinde trankvila tie. Ke neniu homo tie ĝenos nin, ke tie oni povos vivi kiel sur soleca mondoforma insulo.

Ni transloĝiĝis en la monaĥejon.

Sinjoro Lemberger aranĝis du ĉambrojn por ni, tiun, en kiu mi loĝis pli frue kaj ĉambron apude.

Sinjoro Lemberger akompanis nin ĝis la pordo. Tie mi parolis kun li ankoraŭ kelkajn banalajn vortojn. Dum tio, mia edzino jam antaŭiris kelkajn paŝojn. Kiam mi nun postiris ŝin, mi rigardis en ĉiu ŝtupara angulo pro ŝi, ĉar mi supozis, ke ŝi kaŝas sin, ĉar ŝi ja ne konis la ĉambrojn. Neniel ŝi povas ekpensi, ke la ĉambroj, en kiuj ni vivis, estas la du lastaj sur la koridoro. Mi tial ege miris, kiam mi trovis ŝin en mia pli frua ĉambro, kie ŝi akceptis min kun la vortoj: 'Tio estis via ĉambro.'

'Kial vi scias tion?'

'Estas al mi, kvazaŭ mi jam iam ĉi tie estis. Sed tio estis

certe jam antaŭ tre longa tempo. Jen, je la loko, kie nun staras la moderna ŝranko, tie certe estis en la vando niĉo, en kiu pli frue staris la preĝotabureto. Bonvolu foje rigardi!

'Vi certe eraras, mia kara, la ŝranko staras certe jam pli longe je sia loko ol vi aĝas jarojn.

'Bonvolu, faru al mi la plezuron kaj foje rigardu. Supre en la niĉovolbaĵo vi trovos ankaŭ grandan hokon, je kiu pli frue pendis la krucifikso.'

'Kiam tio estis, pli frue? Tion vi ja devas scii ankoraŭ, ĉu?

'Tion mi vere ne povas diri, sed antaŭ tre longa tempo.'

'Bone', mi diris, mi volas forŝovi la ŝrankon, kaj vi vidos, ke vi decide eraris.'

La ŝranko estis malplena kaj pro tio facile estis forŝovebla de la vando.

Mi trovis la niĉon kaj ankaŭ la hokon.

Ankoraŭ je la sama tago mi ankoraŭ demandis sinjoron Lemberger, ĉu mia edzino jam pli frue iam estis en la monaĥejo. Li opiniis, ke tio estas preskaŭ tute neebla, sed almenaŭ ne tute malebla, ke liaj filinoj, kvankam ili estis multe pli aĝaj ol mia edzino, ŝin iam akompanis por montri al ŝi la internon de la monaĥejo. La mebloj interne, sed precipe la ŝranko de tridek jaroj ne plu estas forŝovitaj de sia loko, tiuj devenas ankoraŭ de la patro.'

Mia edzino konis la monaĥejon tute detale, ŝi sciis nomi la celon de ĉiu ĉambro. Mi ne malhelpis ĝin ĉe tio ĉion imagi al si kiel eble plej romantike. Mi ankaŭ ne povis konstati, kio je tio povas esti historie aŭtentika, kaj kio ne.

Ĉiuvespere ni foriis de hejme, ni promenis aŭ vizitis konatojn de mia edzino.

Ni loĝis tie proksimume dek kvar tagojn, kiam mi proponis forveturi aŭ almenaŭ denove transloĝiĝi en la hotelon. Por diri la veron, ne plu plaĉis al mi en la horora konstruaĵo, kvankam mi tiutempe ne travivis ion precipan. Mi estis tute forgesinta la pli fruajn okazaĵojn,

kaj mi venis pli kaj pli al la konvinko, ke ĉio, kion mi vidis antaŭe, estis rekondukebla nur al tio, ke miaj nervoj estis tro incititaj, sekve de la tomba kvieto de la domo kaj pro la penso esti la ununura loĝanto. Sed mia edzino ne volis scii ion pri pluvojaĝado, kaj same tiom malmulte pri la forlaso de la monaĥejo. Ŝi diris, ke ŝi ne povas foriri, ke alie ĝi ekhavis sopiron pri tiu domo, ke ŝi devos unue komenci esti tedita pri la domo; sed ke ĝi jam komencas enui ŝin; ke daŭros certe ne plu tre longe ĝis ĝi enuos pri ĝi por ĉiam, kaj ke tiam estos kontentigita la sopiro pri ŝia infaneco.

Tiel ni do loĝis tie plu.

Kelkajn tagojn poste ni volis kune promeni, sed jen mia edzino petas min, ke mi iru sola, ke ŝi volas okupiĝi pri legado. Mi venis tre frue hejmen. Sed estis jam tenebre. Nia ĉambro estis malhela. Mi supozis, ke ŝi foriĝis dum momento. Mi funkciigis lumon. Mi turniĝis kaj sur la lito kuŝis – la fantoma monaĥino de tiam. Mi tuj rekonis ŝin denove. Ŝi havis tiun noktoveston sur la korpo, tiun kun la stranga paliĝinta flava ekstermoda brodaĵo kaj sube antaŭ la lito staris la venene verdaj ŝuoj, kiujn mi same

konis. Mia unua penso estis: Kie estas mia edzino? Sed la monaĥino etendis sopire la brakojn kaj rigardis min kun siaj melankoliaj kaj tamen tiel voluptaj pasiaj okuloj. Mi vidis la ruĝajn torentojn de la hararo kaj la pufajn kusenojn de la lito. Mi volis turni min al la pordo por voki mian edzinon. Sed jen la monaĥino diras: 'Karulo, venu do al mi kaj kisu min. Ĉu vi koleras, ĉar mi jam kuŝigis min en la liton?'

Mi paliĝis, mi sentis, ke mia koro haltis – estis mia edzino. Mi sidigis min nun sur la litrandon al ŝi. Mi estis nervoza, mi provis konvinki min, ke mi devas fari ion kontraŭ tio. Sed jen mi vidas la strangan noktoveston. Mia edzino komprenis mian demandan rigardon.

'Nu, vi certe miras pri mia antikva dormovesto. La brodaĵo estas jam tre malnova. Mi alkudris ĝin al la batista ŝtofo, tiu estas nova, tion vi ja povas pensi al vi. Sed vi ja ŝatas antikvajn objektojn, jen mi ja volis iom ĝojigi vin. Tion mirindan brodaĵon vi ne plu vidas sur la tuta mondo. Tion kredu al mi.'

'Kaj la verdajn ŝuojn?'

'Ankaŭ tiuj estas ankoraŭ de mia praavino aŭ eĉ de pli antikva tempo.'

'Vi ja ankoraŭ neniam surhavis ilin, ĉu?'

'Ne, mi mem ne scias, kiel okazis, ke mi kunportis tiujn malnovajn aĵojn ĉi tien. Sed, ĉu vi scias, iutage mi trovis ilin en iu kesto, kiu ankoraŭ devenas de miaj gepatroj, kun la malnovaj aĵoj. Ili propre estas la ĉefa kaŭzo, kial mi pensis pri nia monaĥejo kaj la penso venis al mi, ke mi foje ekloĝu kun vi ĉi tie. Pripensu nur, ĝuste ĉi tie, kie pli malfrue loĝis nur monaĥinoj, kaj eble ankoraŭ neniam viro kisis inon. Ĉu tio ne estas terure drola, elpensi ion tian al si? Mi ankaŭ pensas, ke la malnovaj pecoj konservis sian propran vivon. Mi antaŭe jam iom endormiĝis, kaj pensu nur al vi, mi sonĝis, ke mi fariĝu morgaŭ monaĥino, ke la ordena vesto jam kuŝas preta. Sed mi ne volis fariĝi monaĥino, ĉar mi ja volis edzigi vin kaj vin tiom terure amas. Jen mi nokte eksaltis, ĉar vi ekstere fajfis ĉe la muro kaj volis liberigi kaj forkonduki min. Sed, kiam mi venis malsupren al la pordo, ĝi estis fermita, kaj mi tute malesperiĝis kaj staris tiam nur plu ĉe la kolono kaj amare ploris, ke mi nun devos fariĝi

monaĥino kaj vi fajfas ekstere vane.

'Kaj tute laste?'

'Jen mi havis bildeton de vi en la mano kaj daŭre premis ĝin al miaj lipoj, kaj dum tio mi vekiĝis, kaj jen vi staris en la ĉambro, kaj mi ĝojas, ke ĉio estis nur malbona sonĝo.'

Mi trankviligis ŝin kaj baldaŭ ni ne plu pensis pri tio.

Tri tagojn poste, povas estis ankaŭ kvar da ili, mi ricevis proksimume je la sepa vespere telegramon, urĝan telegramon, ke mi tuj interrompu la forpermeson kaj revenu morgaŭ matene per la unua trajno, ĉar la dua kuracisto de la hospitalo, en kiu mi laboris, eksuferis je grava sangotoksiĝo kaj anstataŭisto ne havigeblas tiel rapide por li. Mi iris tuj al la stacidomo, aĉetis veturbiletojn, mendis taksion kaj plenumis ankoraŭ kelkajn aliajn bagatelojn. Mia edzino dume prizorgis ĉion alian kaj iris ankoraŭ antaŭ mi hejmen por paki la kofrojn. Kiam mi venis hejmen ŝi jam estis preta. Ni ankoraŭfoje iris malsupren al familio Lemberger por

pasigi la lastajn vesperajn horojn kun ili. Mia edzino baldaŭ fariĝis laca, ni adiaŭis kaj iris en nian ĉambron.

Mi multe fumis kaj mia kapo iom doloris. Tial mi diris al mia edzino, ke mi iros ankoraŭ iom sur la straton por kapti freŝan aeron.

La frideta noktaero vere estis bonfartiga al mi. Mi fariĝis sobra kaj serena kaj fajfadis por mi. Jen la sonĝo de mia edzino venis en mian kapon. Mi volis mistfiki ŝin, mi iris al la malantaŭa muro de la monaĥejo kaj fajfis voksignalojn kiel enamiĝinta gimnaziano. Mia edzino aperis ĉe la fenestro, ŝovis la kurtenon flanken, kapjesis al mi, ŝovis manon tra la kadro, mansvingis kaj vokis ne laŭte malsupren: 'Mi ne povas veni, la pordo estas fermita.' Ŝi jam surhavis la noktoveston kaj ŝajne intencis enlitiĝi. Mi ĝojis, ke ŝi tiel rapide reagis al mia ŝerceto kaj mi pensis, ke mi diros al ŝi kelkajn amplenajn petolajn vortojn se mi ree estos supre.

Fine mi iris en la domon.

En la plej gaja humoro mi malfermis la pordon. Mi

senhaste refermis ĝin.

Dume mi do iris al la ŝtuparo, mi rigardis en la halon. Mi devis pensi subite pri tiu vespero, kiam mi trovis la monaĥinon pendantan je la kolono. La luno radiis kiel tiam, nur eble ne tute tiom blindige hela, ĉar la ĉielo parte estis kovrita de nuboj. Kaj efektive, kion mi preskaŭ jam esperis, tio okazis, la monaĥino pendis je la ringo, kiu estis masonita en la kolonon. Same tiel, kiel tiam. La verdaj ŝuoj iom treniĝis sur la planko. La flavecaj brodaĵoj de la noktovesto troviĝis en akra kontrasto al la blanka haŭto de la korpo, la okuloj estis fermitaj, la manoj kramfe kuntenataj kaj la ruĝa hararo lumis kiel frida fajro.

Mi rapide preteriris la kolonon, sur la ŝtuparo supren en nian ĉambron. La lampo lumis. Ĉe mia eniro moviĝis sekve de la aermovo la fenestra kurteno, ĉar la fenestra aperturo ne estis fermita, sed nur apogita al la fenestrokadro. Mi turnis min al la lito. Ĝi estas malplena. Laŭ ĉiu ŝajno mia edzino jam kuŝis en ĝi kaj ankoraŭfoje ellitiĝis. Mi prilumis la koridoron kaj vokis ŝian nomon. Nenio videblis, nenio aŭskulteblis. Mi kuris kun la hela

lampo malsupren de la ŝtuparo, prilumis la koridoron kaj vidis ankoraŭ pendu la monaĥinon je la kolono. Mi volis preteriri ŝin por kuri al la malantaŭa pordeto, ĝi estis fermita. Tiam mi rapide kiel sago rekuris, preteriris la kolonon kaj tuŝis ĉe tio firman homan korpon – tiun de mia edzino! – Dum horoj mi faris revivigajn provojn je ŝi. Vane.

Ŝi certe multe ploris mallonge antaŭe, ĉar sur ŝiaj vangoj montriĝis malsekaj plorosulkoj, unu apud la alia.

Pri kio ŝi ploris?

La plej sensencaj supozoj leviĝis, la prokuroro ekokupiĝis pri la afero. Aperis la onidiro, ke pli frua hontige rifuzita amanto faris krimon al ŝi kaj sufokis ŝin. Aliaj rakontis, ke ŝi memmortigis sin pro hejmsopiro, ĉar ŝi ne volis forlasi denove sian naskiĝurbon.

Enigme estis, ke ŝiaj kuntiriĝintaj manoj apenaŭ lasis malfermi sin. Sed kiam tamen sukcesis al mi, mi trovis en unu el la manoj porcelanbildeton kun mia portreto. Sekve de kaprico de la desegnaĵisto aŭ de mallerteco ĉe la

bakado, mia mentono sur la bildo havis strangan eĝohavan formon, kiu ŝajne estis konata al mi. Mi pripensadis, kie mi jam iam vidis tiun angulforman mentonon. Kaj jen mi rememoris: Estis la mentono de la viro, kies malnova bildo pendis en la loĝoĉambro de la domo de ŝiaj gepatroj, apud tiu de ŝia praulino. De tiam mi timas.

Tio estas ankaŭ la kaŭzo, kial mi jam post kvar monatoj edzigis mian nunan edzinon. Pli longan solecon mi ne estus elteninta. Vi nun ankaŭ komprenos, kial mi neniam partoprenis en viaj vesperaj renkontiĝoj. Mi ne volas lasi sola mian edzinon, eĉ ne minuton pli longe ol tio postulas mia profesio.

Klarigojn vi volonte volus havi, kvankam klarigoj tute ne eblas, ĉu? Kiel ajn oni metu la faktojn al si, estos ĉiam nur supozoj, al kiuj oni ne atribuu eĉ la plej etan valoron, sen oni ne volas perdi la grundon. Kaj nun, sinjoroj miaj, estas kvarono antaŭ noktomezo. Mi devos iri al la trajno. Mia edzino venos kun la lasta trajno, kaj mi volas saluti ŝin tie kaj akompani ŝin hejmen. Mi dankas al vi, ke mi rajtis pasigi la vesperajn horojn ĝis nun en via societo,

hejme mi ne povis restadi. Bonan vesperon! –“

Tradukis la karapacanoj Dorothea & Hans-Georg Kaiser & Frank Vohla laŭ „Die Klosterfrau“ el „B.Traven: La frua verko“

La ora buŝo

„Lia Moŝto, la reĝo, ne uzis sian rajton pri amnestio.

Antaŭlegita kaj subskribita – tien la nomon –

Se vi havas ankoraŭ iun deziron pro la regulado de viaj privataj rilatoj aŭ deziron pri la manĝo.“

„Ne!“

„Pripensu. Post paso de horo mi ankoraŭfoje demandigos. Ankaŭ gardisto troviĝas proksime. Li havas la komision sciigi certajn dezirojn viajn al mi. Ĉu vi deziras pastran konsiladon?“

„Mi petas pri tio.“

„Adiaŭ! Kaj tenu la kapon supre! Eltenu ĝin kun memregado. Tio ja devas esti. Iom regu vin. Vi ja estis soldato. Nu do! Tiuj kelkaj horoj rapide pasos.“

„Jes ja, sinjoro ĉefprokuroro!“

„Nu, bubeto! Morgaŭ matene je la kvina ili hakos vian melonkapon malsupren. Je via sano! Tio estas naŭza, ĉu? Nu, egale. Nu, kiel vi nun pensas pri tio, he?!“

Silento.

„Kaj nun vi povas deziri ion al vi, vi scias, ĉu? Bovida steko kun larĝa asparago. Kaj se vi volas, duonon de ĉampanbotelo vi ankaŭ povus permesi al vi. Cigarojn por dudek kvin groŝoj, eĉ ses cigarojn, he?“

Silento.

„Nu, tio estas iom malagrabra, ĉu? Jes, jes, se oni pensas pri tio, morgaŭ je la kvina kaj tridek la kapo estos for, tiam vi do jam kuŝos kun la piedoj ĉekape, kiel serpentohomo.“

Silento.

„Nu, parolu do, almenaŭ unu sonon. Kiel mi subtenu vin, se vi ne malfermas la bekon? Aĥ, tiel do, dentklakado. Ja, bubeto, ĉu vi ankaŭ klakis la dentojn, kiam vi tiun...“

„Filo mia, vi vokigis min.“

„Jes ja, sinjoro pastro.“

„Tio estas en ordo de vi. Tial ankoraŭ ne estas perdita
ĉio.“

„Sed, sinjoro pastro, la vivo estas ja nun fuŝita.“

„Sed la animon ni savos. Tio estas la plej grava afero.
Pripensu, filo mia, la iomo da vivo estas ja malgrava, ĉu
ne?“

„Ja, ĉu ne? Sinjoro pastro? La iomo da vivo estas ja
malgrava, ĉu ne? Kaj se mi nun rompus vian nukon, via
animo ja estus savita, la iometo da vivo estas ja malgrava,
ĉu ne – ?“

„Gardistoo! Garrrrdistoooo!“

„Kiel dirite, sinjoro pastro, la iometo da vivo estas ja
malgrava, ĉu ne? Se nur la animo estos savita. Sed tial vi

ja ne devus kii tiel murdospektakle. La iometo da da vivo, la iometo ja – “

„Ni volas paroli komunan preĝon, por ke vi fariĝu trankvila: „Patro nia, kiu vi estas en la ĉielo...”“

„Sinjoro ĉefprokuroro demandigas, ĉu vi decidis vin pro la bovida steko kun larĝa asparago? He, mi donas al vi la bonan konsilon, ke vi lasu doni al vi larĝan asparagon, tiun ili faros por vi tute delikata kun tute bruna butero. Ĉu mi mendu ĝin por vi?”

„Lasu min en paco!”

„Nu, se vi ne volas. Tiel malmultekoste vi ne plu ricevos bovidan stekon kaj larĝan asparagon.”

„He vi, mi ankoraŭfoje demandu vin, kion vi volas manĝi vespere. Aliokaze vi ricevos nur farunkaĉon, se vi ne mendos ion.”

„Lasu min finfine en paco, mi petas!“

„Nu, se vi ne volas mendi la bovidan stekon, vi ja tamen povus mendi ĝin, estas ja egale, ĉu manĝas mi tion ĉu vi. Tia azeno mi ja ne estas, ke mi ne komprenas, ke via apetito ne estas plu granda. Mi fartus tute same. Sed vi ja ne donacu al tiuj uloj la bovidan stekon kaj la larĝan asparagon kaj la duonon de la botelo kun ĉampano. Tiuj ja nenion donacas al vi, eĉ ne la nudan vivon. Nu?“

Silento.

He, vi, estas la naŭa vespere. La direktoro sendas min. Se vi ne povas dormi, vi sciigu tion, tiukaze mi alportu lampon kaj libron aŭ gazetojn. La direktoro donos al vi ankoraŭ kelkajn el siaj cigaroj, li diris tion, efektive. De siaj propraj.“

Silento.

“Ĉu ne? Ĉu vi scias, kio vi estas? Vi estas granda ŝtipkapulo. Vi ja povus doni al mi la cigarojn, se vi ne

volas fumi ilin mem. Vi ja tute ne scias, kiom ili dorlotas vin ĉi tie. Al mi la ĉefĉjo ankoraŭ ne ofertis cigarojn de si kaj mi servas ĉi tie jam dek jarojn.“

„Ne, ĉu?“

„Ne, efektive ne. Nu, ĉu mi mendu cigarojn por vi ĉe la ĉefĉjo?“

Silento.

„Vi estas ja freneza. Nu?“

Silento.

„Nu, do ne. Bonnokton.“

„He, ekstaru! Jam estas la tempo! Rapide! – Ha, tiel do, vi jam ellitiĝis! Jen pura ĉemizo. Kaj jen la kombilo por vi. Por ke vi aspektu laŭorde ĉirkaŭ la kapo.“

„Bonan matenon, filo mia! Nia Sinjoro kaj Savanto hodiaŭ subtenos vin pro sia senfina boneco.“

„Bonan matenon, sinoro pastro – “

„Ne lasu ĝeni vin dum la vestado, filo mia. Vi havas ankoraŭ nur dek minutojn. Ja parolu, se vi ankoraŭ havas ion, kio ŝarĝas vian koron. Mi ja aŭskultas.“

„Sinjoro pastro, tio ja efektive legeblas en la Biblio: „Se iu verŝos sangon de homo...“

„Jes, certe, filo mia!“

„Kie ĝi legeblas, sinjoro pastro?“

„En La Malnova Testamento, en Mozeo – “

„Ankaŭ tio legeblas ja en La Sankta Biblio: ne ĝis sep fojoj vi pardonu al via frato, sed ĝis sepdekoble sep fojoj – Kaj ne juĝu, kaj vi ne estos juĝitaj...“

„Ja, tio legeblas – “

„Kie, sinjoro pastro?“

„En – nu – hm! Hm! Preĝu, filo mia, vi havas ankoraŭ nur kvin minutojn.“

„Bonmatenon.“

„Bonan matenon, sinjoro prokuroro!“

„Ĉu vi estas preta?“

„Necesas nur plu kombi la hararon, sinjoro prokuroro.“

„Mi ĵus aŭdis, ke vi ne deziris ion.“

„Ne, sinjoro – sed, se mi nun ankoraŭ rapide tason da forta kafo kaj – “

„Kaj – ?“

„ – kaj kelkajn cigaredojn – “

„Tio estas fakte kontraŭ – – – Ĉu tio trankviligas viajn nervojn, la kafo kaj la cigaredoj?“

„Mi ne dormis dum la tuta nokto, sinjoro prokuroro, kaj mi apenaŭ plu povas stari pro laco.“

„Do, gardisto, kuru rapide en la kuirejon. Pro forta kafo. Rapide. Certe jam pretas iu. Kaj cigaredojn, ĉu? Ja-de kie? Haltu. Jen prenu, de mi. Jen la flameto! – Danke al dio, jen ja jam estas la kafo. Ne bruligu vian buŝon. Ŝajne ĝi estas tre varmega.“ – – – – –

„Venu kun mi! Jen ankoraŭ plia cigaredo. Jen, bonvolu. Jen, bonvulu, la flameto. La unuaj kvin enspiroj estas la plej ĝuindaj. Nu, kaj nun, tenu vin rekte. Tio ja ne estas tre danĝera. Post tri minutoj – mi volis diri, la tri minutojn – mi kompreneble celas diri, se la tri minutoj estos pasintaj, tiam – – – ne, ne, lasu nur, retenu la cigaredon trankvile en la buŝo, mi transprenos la respondecon por tio – –“

La atestantoj: iama urba konsilisto, selomajstro, tubista majstro, librobindisto, privatulo, du komercistoj, viandista majstro, du restaŭristoj kaj fabrikposedanto.

Kutime ankoraŭ tajlorista majstro ĉeestas. Sed en la lasta momento li sciigis, ke li li ne partoprenos, ĉar li povus garantii nenion. Pro despero oni kaptis verkiston anstataŭ li, kiu estas profesia poeto.

La atestantoj frostetas en la frideta matena aero. Je la nazo de la iama urba konsilisto pendadas travidebla guteto. De tempo al tempo li forviŝas ĝin per mandorso. Kelkfoje ĝi falas malsupren kaj stumbletas trans la vestajn butonojn.

„Ĉu vi konas la baladon pri la prizono de Reading?“ demandis la verkisto la tubistan majstron.

„Ĉu vi scias? Estas ja neagrable sento, se oni pripensas, ke tie supre – mia edzino opiniis laste, ke mi trinku antaŭe ankoraŭ kelkajn brandojn“, respondis la tubista majstro.

„Kompleta ŝtipkapulo“, pensas la poeto kaj diras al la iama urba konsilisto: „La mortpuno, oni povas diri kion oni emas, estas ja ĉiam postrestaĵo de la barbareco. Ni, la kulturhomoj, unufoje por ĉiam finu uzi tiajn punrimedojn, kiuj memoras la inkvizicion kaj estu sufiĉe

inteligentaj trovi aliajn rimedojn por protekti la homaron.“

„Nee, tion mi ja absolute ne akceptas, enmiksiĝas la viandisto en la interparoladon, „tia ulo estas senkapigenda.“

„Senkapigenda, ĉu? He, permesu, la homo ja ne estas buĉenda virŝafo.“

„Jen – jen ili ja jam venas, nun la afero ekas“, diras la komercisto kaj rigide rigardas siajn botopintojn.

„Rigardu nur, kiel la viro paŝas. Tiel fiera, mirinde pala vizaĝo. Kaj kiel li tenas la cigaredon en la buŝo! Kaj io tia estas nun post tri minutoj finita. Domaĝe, eterne domaĝe!“ La poeto turnas siajn okulojn de la grupo, kiu per hastaj paŝoj atingis sian celon.

La viandisto: „Kiel impertinente tiu ulo tenas la cigaredon en sia buŝaĉo. Impertinente kiel stratbubo.“

La tubisto: „Se oni ne senkapigos la patronon, li morgaŭ mortbatos du aliajn.“

La bindisto: „De kie vi scias tion?“

La fabrikestro: „Ha, li aspektas kiel socialdemokrato.“

La ŝuisto: „Nee, sinjoro komerca konsilisto, tion mi ne pensas, pli kiel antisemito.“

Unu el la gastejestroj: „Oni devus bati la cigaredon el la grimaco de tiu ulo.“

La alia gastejestro: „Ĉu li fumas *Queen*, ĉu *Aleksandria*?“

La selisto: „Nu, simple demandu lin. Sed rapidu, tuj estos tro malfrue.“

La poeto: „Fenomene! La povrulo. Sed fortajn nervojn li havas!“

Unu el la komercistoj: „Kial li ne havu ilin?“

La tubisto: „Kiel ĝusta fripono li aspektas, la bubo.“

La fabrikestro: „Pli kiel stratrabisto.“

La alia komercisto: „Mi ne volus renkonti lin sola vespere

post la naŭa sur strato.“

La poeto: „Rigardu, sinjoroj miaj, kiel la viro staras tie!
Tiu fiere remetita kapo, tiu malestimema grimacado
ĉirkaŭ la buŝanguloj, tiu frida sentimemo je la okuloj. Ĉu
li ne staras kiel reĝo enmeze de siaj vasaloj!“

La bindisto al la privatulo: „Ĉu vi vidas ion tian?“

La privatulo: „Eĉ ne spuron. La ulo ĉi tie apud ni estas
trafita de blindeco aŭ freneza aŭ pentristo.“

Ne laŭte oni aŭdas el la grupo de supre la voĉon de la
prokuroro. Intertempe insiste endormige aŭdiĝas la
obtuza voĉo de la pastoro.

La lipoj de la kondamnito ludas nerveze per la cigaredo.
Ĝi estas ankoraŭ je duono nefumita. En grize blua
tremanta fumo ĝi plu senkonturiĝas.

Maltrankvile li migrigas siajn okulojn tien kaj tien. Li
serĉas la hakilon. Li ne trovas ĝin. Tiam li rimarkas

faldotransŝoviĝon de la nigra tuko. Ĉu ĝi eble kuŝas sub ĝi, sub tiu tukofaldo? Li ankaŭ ne vidas ĉerkon.

Subite li pensas, ke ĉio estas nur tial tiel por timigi lin. Aliokaze devus ja stari tie ĉerko, kaj ankaŭ la trembrila hakilo devus estis mankapteble proksima.

Indiferente li rigardas al la verdikta notfolio antaŭmontrata al li de la prokuroro. Ne interesas lin, ĉu la subskribo surestas, ĉu ĝi mankas.

Poste falas la cigaredo el lia buŝo. Ĝi posttiras nebulan fadenon dum longa distanco post si.

Fulmrapide unu el la helpservistoj kliniĝis kaj kaptis la kapon tiel firme kaj rapide je la malseka hararo, ke ĝi eĉ ne tuŝas la plankon.

Li tenas ĝin bruste alte kaj volas meti ĝin en la nigran ĉerkon.

En tiu momento saltas per unu fojo la poeto proksimen,

ŝiras la kapon al si kaj rigardas fikse sur la paliĝantan konvulsian vizaĝon. Je la palpebroj de la kapo trembriletas linio kiel radiantata roso.

Subite krias la poeto: „Li havas oran buŝon! Efektive, rigardu ĉi tien, li havas oran buŝon!“

La prokuroro, la pastro, la ekzekutisto kun la nigra frako, kaj ĉiuj aliaj sekve de la impulsa ago de la poeto kvazaŭ rigidiĝis. Sed poste ili kuras tien kaj demandas ĉiuj samtempe: „Kie do? Montru!“

La poeto tenas la kapon per etenditaj brakoj vaste for de si al la aliaj kaj vokas: „Homo! Nur homo! Homo kun ora buŝo! Ni mortbatis strangan homon!“

„Donu la kapon foje al mi“, diris post tio la servisto al la poeto kaj forprenas la kapon de li.

La helpservisto prenas la kapon je la hararo kaj rigardas ĝin dum momento kaj opinias dum la ridado:

„Sensencaĵo, ora buŝo. Tio estas ja nur pro la cigaredo, ili havas ja oran buŝaĵon. Tion scias ja ĉiu. Kia idiotaĵo! Ora buŝo! Kion do ankoraŭ! Ke mi nur ne krevu pro ridado!“

Brutale gestante, li ĵetas la kapon al la cetera korpo. En la nigran lignoĉerkon.

La poeto staras tute forlasita tie. Per senfine doloriga gesto esprimiĝas je li la sentado kvazaŭ li sentus grandan solecon ĉirkaŭ si. Senhelpe li rigardas de unu al la alia, per la timemaj okuloj de infano, kies unua sunosonĝo disfluas.

La ĉeestantoj, ankaŭ la ĉefprokuroro kaj la pastro, elspiris kvazaŭ liberigitaj, ridetas devigite kaj diras laŭte al si reciproke: „Bonan matenon!“ La prokuro diras ankoraŭ kelkajn fojojn: „Mi dankas al vi, sinjoroj miaj, mi dankas!“

Dum ili foriras, kelkaj el ili faldas la vestokolumon supren, ĉar estas senteble fridete. Sed ĉiuj ŝercas pri la freneza poeto, kiu preskaŭ estus metinta akran miskonkordon en la sanktecon de la laŭleĝa agado. Sed sen tio, ke ili volus havi tion, miksiĝas en la ŝercadon sento de dankemo pri tio, ke li tiel facile levis ilin super deprimigan situacion. Pluirante, ili jam forgesas kelkajn detalojn.

La poeto diris nenion, ne adiaŭas sin. Li ankaŭ ne
returniĝas. Kun klinita kapo li iras kviete kaj reveme sian
vojon.

Kaj revas pri konvulsia ore pala buŝo kaj fajna briletanta
linio, kiu elradias inter firme fermitaj palpebroj, tiel, kiel
briletanta matena roso.---

*tradukis la karapacanoj Dorothea & Hans-Georg Kaiser &
Frank Vohla laŭ „Der goldene Mund“*

*Unua publiko: „Taggazeto de Berlin“, naŭa de junio en 1913
(komparu al gazeto „Vorwärts“ (ANTAŬEN), 20-a de aprilo
en 1914)*

La rakonto pri la neentombigita mortinto

Estis terure malgaje.

Kaj tamen la fakto ne kontestebblas, ke la kamparano Jozefo Malantaŭagro el Kokinbosko levis de la tero frostmortan viron kaj pakis ĝin sur sian ĉaron kaj kunprenis lin en la vilaĝon. Kiam oni pli precize rigardis lin, montriĝis, ke la viro estis jam delonge morta. Krome li estis metiisto-junulo kaj sufiĉe povre aspektanta vagabondo. Oni deŝarĝis lin antaŭ la pumpila dometo kaj tie kuŝigis lin sen grandaj ceremonioj kaj tiel, kiel decis en lia kazo, sur la firmtretitan nudan argilan teron.

Ankoraŭ je la sama vespero la pastro de la loko kaj la komunumestro inspektis la mizeran restaĵeton senviveco de la viro. Kaj kiam oni kontrolis la identigilon, strange montriĝis, ke oni kaptis protestanton, kiu krome estis eĉ naskita ie en malgranda de Dio forlasita provincloko de Saksujo, sed tie li perdis sekve de malĉeesto dum jardekoj ĉiujn civitanajn rajtojn.

La komunumestro sendube estis pia kristano. Ja kial ne?

Tial li konscie neniam permesus al si eĉ la plej etan neleĝan agadon. Kaj la pastro de la loko estis multe tro kara maljuna sinjoro por puni protestanton ankoraŭ post ties morto, ĉar li ne ĝustatempe ekkomprenis, ke li fakte troviĝas sur la malĝusta vojo al la sole vera savo, kiun serĉi kun seriozo kaj granda fervoro estus estinta la plej grava tasko de lia vivo.

Sed de la tuta vilaĝo ne kuŝis eĉ nur unu luterano en la tombejo. Kaj nun eĉ meti inter ĉiujn tiujn bonajn katolikajn virĉojn kaj inĉojn protestanton, tio certe provokus malican malpacon en la komunumo kaj tio aspektus ankaŭ tiel, kvazaŭ ne estus diferenco inter religio kaj religio. Krome estus grava neobeado pri la tombeja regularo. Kaj ĉar la tombejo apartenas al la katolika paroĥo, tiu kompreneble povas fari, kio plaĉas al ĝi, kaj kiun ĝi tie ne volas havi, tiun ĝi ne devas akcepti.

La sinjoro pastro pripensis la aferon.

Ankaŭ la komunumestro pripensis tion, sed pro aliaj kaŭzoj.

„Jozefo Malantaŭagro“, li diris al la kamparano, kiu sendecide staris apud li, „kial vi ne lasis kuŝi lin tie, kie li estis?“

Sed li rapide ŝanĝis sian opinion, kiam li rememoris pri la pastro, kaj diris: „Kompreneble mi opinias tion ne tiel serioze; ĉar oni ja tamen ne povus lasi putri kristanan homon ĉe la vojoj, tio estus ja peko kaj hontigo krome.“

„Jes, jes“, diris Malantaŭagro. Kaj la komunumestro havis alian ideon: „Sed eble la homo tute ne apartenas al ni, eble ĝi apartenas al Ŝmikel-vilaĝo. Kie vi do trovis lin?“

„Nu, li fakte kuŝis rande de la kampa vojo, apogate de arbo.“

„Kie do? Mi celas diri, je kiu loko?“

„Nu, ĉirkaŭ dek paŝojn distance de la salikaj arbustoj, kiuj staras ĉe la Kojten-rivereto.“

„Tio kompreneble estas stulta afero“, respondis la

komunumestro. „Se vi estus kolektinta lin dekkvin paŝojn pli supre, li apartenus al tiuj el Ŝmikel-vilaĝo. Jes, tio estas stulta afero. La ŝtipkapulo vere povintus sterni sin iom pli alte. Al ni tio denove kostos atentindan sumeton, kaj tio, kvankam ni jam sen tio ne havas ion en la komunuma kaso kaj kvankam ni sendu eĉ du virojn koste de la komunumo al la konferenco pri epidemioj. Tiukaze niaj elspezoj por tio estos treege limigitaj. Malantaŭagro, tion mi jam nun povas diri al vi. Kaj krome la malagrablaĵoj pro la registaro, tiom da skribado. Kaj lastfine ili eble eĉ trumpetos ĝin en la tutan mondon, ke ni lasis frostmorti kaj malsatmorti la homon. En ĉiuj gazetoj estos skribitaj, ke io tia okazas en vilaĝo nia, kie la riĉaj kamparanoj kunsidas tiel dense kiel la formikoj sur la surŝutitaj pasteroj de kuko. Jes, vi kulpos tion, Malantaŭagro, sole vi, se la hienoj de la gazetoj skribaĉos, ke Kokinbosko devus havi la nomon 'Avar-bosko', ĉar oni tie lasas malsatmorti la povrajn kunhomojn sur la kampovojo. Kvankam ili sidas en sia grasiga korto, kaj tie ekstere en la vintra frido mortas tia kompatinda povrulo pro malsato.“

„Ha, kial kulpu ĝuste mi tion?“ ekkriis Malantaŭagro kolerigite. „Kial koncernu via mortinto min? Ni ja decidis en nia komunuma kunsido, ke ĉiu travojaĝanto ricevu okdek pfenigojn, ĉu ne? Ĉu vi donis al li la okdek pfenigojn? - Ne. Nu, do! Jen lasu min en paco.“

„Li ja tute ne estis ĉi tie. Ĉu mi eble eĉ elportu la monon sur la straton kaj rekonte al li? Tiukaze serĉu do alian komunumestron al vi, tiukaze mi demisios. Nu, vi ja vidos, en kiun embarason vi puŝis nin.“

„Sed kial mi kaj ĉiam nur mi?“ kriegis Malantaŭagro plena de kolero.

„Kiu al vi ordonis porti lin ĉi tien?“

„Vi estas ja kristano bona“ respondis Malantaŭagro malice.

„Ĉu kristano ĉu ne kristano, sed se vi estus trovinta lin pli supre, 'trovinta' mi diras, jen tiuj el Ŝmikel-vilaĝo havus lin je la nuko, kaj tie li havus pli bonan lokon, ĉar ili tie ĉiuj estas protestantoj.“

„Sed li kuŝis ja sur nia tereno.“

„Ve, Malantaŭagro, pardonu al mi, sed vi estas azeno. Sur nia tereno oni simple ne trovu mortan vagabondon, tiel prudenta vi povus esti, ĉu ne? Sufiĉe olda por tio vi ja estas.“

„Sed tiel danĝera tio ja tamen ne estas. Ankoraŭ nun oni povus trovi lin sur la tereno de Ŝmikel-vilaĝo, se vere devos esti tiel.“

Pri tio la pastro diris, ke tio ne estas bona ekzemplo, kion ili prezentas ĉi tie per la kverelo, ke li estas laca aŭskulti ankoraŭ plu tian kvereladon, kiu tute ne atestas pri kristana spirito, kaj ke li volas iri al la botisto Franĉjo, kiu jam delonge estas malsana, kaj kiun li volas konsoli per diversaj vortoj.

Kiam la pastro forestis, la komunumestro kun Malantaŭagro levis la mortinton denove sur la ĉaron, ili kovris lin per pajlo, kaj kiam fariĝis malhele, ili ekveturis kun li kaj pli avantaĝe demetis lin.

Horon poste kelkaj loĝantoj de Ŝmikel-vilaĝo, reveninte

kun siaj ĉaroj de foiro, krucis la Kokinboskan kamparvojon, kaj hundo, kiu kuris apude, pribojis la mortan metiisto-junulon. Ĉar li nun kuŝis sur ilia tereno, pri kio ili detale konvinkiĝis, ili kunprenis lin kaj veturis kun li al sia komunumestro. Tiu jam kuŝis en la lito. Ili per pugnoj porde eltamburis lin, kaj kiam li estis lumiginta la vizaĝon de la mortinto kaj konvinkiĝis, ke li estas povra kiel muso en preĝejo, li ordonis la homojn en sian loĝoĉambron. Ekstere estis terure fride. Sekve de tiu fakto ili ĉiuj ege ĝojis pri tio, kiam la komunumestro diris al ili, ke lia edzino pretigos varmegan grogon por ĉiuj.

Tiam ili sidis ĉirkaŭ la tablo kaj trinkis la grogon. Kiam ili jam sufiĉe parolis pri la vetero kaj la grandaj malavantaĝoj de la nutraĵdonado en stalo, la gastiganto parolis paroladon, el kiu klariĝis, ke Ŝmikel-vilaĝo estas eta, je homosango povra protestanta insulo en katolika maro, kio trafis la veron, kaj ke aldone en la komunuma kaso estas preskaŭ nenio, kaj ke tio fine ne ĵetus tre bonan lumon sur la protestantan vilaĝon, se protestanta homo mizere frostmortis kaj malsatmortis en ilia tereno, eĉ se estas nur vagabondo, tre proksime de la vilaĝo, kaj,

ke li tute ne volas paroli pri la problemoj kaj la skribadado kun la instancoj. Sed, ke en la katolika Kokinvilaĝo sidas la dikaj grasaj kamparanoj kaj havas tiom da mono en sia komunuma kaso, ke ili nun volas eĉ pavumi la vilaĝstratojn kaj povas sendi du delegitojn al la konferenco pri epidemioj. Kaj li aldonis, ke la komunumo, kie oni trovis la mortinton, devas pagi la ĉerkon kaj ĉiujn aliajn kostojn, kaj ke la loĝantoj de Kokinbosko lin povus ja alporti enĉerkita, ke loketon sur ĉi-tiea komunuma tombejo oni tiukaze volonte disponigus al li por rabatita kotizo. Ke tio ĉio nun tiel kaj ankaŭ alie estus en la plej bela ordo, se la viro do estus trovita sur la tereno de Kokinbosko. Sed ke tial, ĉar li ne estas trovita sur la tereno de Kokinbosko... kaj tiel plu. Kaj fine daŭris ne longan tempon ĝis la viro denove survojis kaj poste tre baldaŭ kuŝis proksimume je la loko tie, kie lia vivsprito forlasis lin.

Tie li de tiam kuŝis ĝis la sekva mateno.

Je tiu tempo trovis lin Petro Veprohak, kamparano el Kokinbosko, kiu veturis kun junaj bestoj hejmen. Li surĉarigis la mortinton kaj deŝarĝis lin ĉe la

komunumestro, kaj li faris ĉe tio tiom grandan spektaklon pri la terura trovaĵo, ke ĉiu infano de Kokinbosko aŭdis pri tio kaj la komunumestro ne plu havis la eblon trakti sekrete la aferon. Aŭdinte ankoraŭ, kie oni trovis lin, li rimarkis, ke tiuj el Ŝmikel-vilaĝo estas almenaŭ tiom prudentaj kiel li mem.

Li nun ordonis deŝarĝi la mortinton je dua fojo kaj meti lin antaŭ la pumpilan dometon.

La kompatindulo kuŝis nun tie tutan tagon kaj la sekvan nokton, sen tio, ke iu cerbumis pri li. Sed kiam li volis foriĝi nek per nepensado pri li nek per reviviĝo nek per memforkurado, la komunumestro sendis iun transen al Ŝmikel-vilaĝo kaj sciigis, ke oni trovis ĉiloke en la komunumo protestanton, kaj ke oni transprenu lin kontraŭ la akcepto de la transportkostoj kaj la kostoj por la entombigo. Kaj kiam la mortinto ĝuste estis enĉerkgigata en malvasta kaj nerabotita kesto, alvenis la komunumestro de Ŝmikel-vilaĝo kun veturilo por akcepti la protestanton. La komunumestro de Kokinbosko volis nun transmanigi la identigilon de la mortinto. Sed kiam li serĉis ĝin vane, venise4n al kapon de la estro de Ŝmikel-

vilaĝo, ke li prenis ĝin el poŝo de la mortinto kaj sekve de la abunda grogotrinkado tiam forgesis remeti ĝin. Nun la identigilo kuŝis ĉe li hejme sub multaj aliaj paperoj. Kiam nun la komunumestro el Kokinbosko ne trovis la legitimilon, diris la estro el Ŝmikel-vilaĝo: „Nu, vi ja opiniis, ke li estas protestanto. Kiel vi do scias tion, se vi ne havas identigilon por li?“

La vilaĝestro el Kokinbosko nun ne bone povis koncedi, ke li jam vidis la identigilon antaŭhieraŭ. Ĉe tio ja montriĝus en la hela taglumo, ke li volis ege nekristane liberiĝi de la mortinto. Kaj al la estro el Ŝmikel-vilaĝo venis en tiu momento la ĝusta penso en la kapon, kial povas esti, ke la komunumestro el Kokinbosko scias, ke la mortinto estas protestanto, kaj kial krome povas esti, ke oni trovis la mortinton sur la tereno de Ŝmikel-vilaĝo anstataŭ, kiel estus multe pli logike pro la vojo, sur tiu de Kokinbosko. Sed pro bonaj kaŭzoj li gardis sin menciion pri tio, kaj ŝajnigis sin tute senafliktita. Post longa diskuto li fine diris: „Do, karulo, tiom longe, kiom vi ne pruvas al mi, ke li estas protestanto, li ne venos sur nian tombejon. Ĉe vi li estas trovita, kaj ĉe vi li devos trovi lokon en la

tero. Ni volas havi nenion komunan kun tio. Se vi laŭrajte identigos lin kiel protestanton, vi rajtos sendi lin al ni, alikaze ne. Lastfine li eble estas eĉ judo aŭ turko, kaj ion tian ni ja tamen ne volus havi en nia dioplaĉa tombejo. Fartu bone!“

Post kiam la komunumestro de Kokinbosko sufiĉe longe kaj sole pensis pri tio, kio do estu farenda rilate la aferon, li iris al la pastro kaj petis lin, ke li permesu, ke la mortinto restu en la tombejo. Sed tiu diris: „Kial mi faru tion? Mi konvinkiĝis per miaj propraj okuloj, ke la viro estas protestanto. Kiel mi respondecigu tion konscie entombigi lin en bone katolika tombejo? Eĉ je la cirkonstanco, ke protestanta tombejo estas atingebla laŭ distanco. Ja, se mi neniam estus vidinta, ke li estas protestanto, tiukaze eble jes, tiukaze mi povus senkulpigi min mem kaj antaŭ mia Dio, ke mi simple ne sciis tion pli bone, kaj oni ne lasu putri homon, kiu ajn estas, en ŝosefosaĵo kiel bonvenigatan manĝon por junaj kampokorvoj. Tio simple ne eblas. Estas almenaŭ eble, ke oni eltrovos tion, kaj ke oni tordos el tio ŝnuregon por mi. Tio kaŭzigus monstran spektaklon. Ne, ne, por tia peko

mi ne fordonas min kaj mian oficon.“

„Sed, sinjoro pastro, mi petas vin, kion mi do faru? Mi nepre devas enterigi la viron.“

„Nu, tiukaze mi bedaŭrinde ne povas helpi al vi. Pri tio vi estu pensinta pli frue. Ĉu vi ne povas havigi la identigilon al vi?“

„Se mi nur scius, kie ĝi estas. Se mi nun enketos pro ĝi, la tuta afero fariĝos konata, kaj tiam mi estos finita. Tio sekvigus laŭordan proceson. Do, pri tio oni eĉ ne pensu.“

Poste la komunumestro sidiĝis kaj skribis leteron al la distriktestro, kio okazu pri la morta metiisto, kiu estas sen legitimaĵo. Ĉe ĉiu vorto li havis terurajn konscienciproĉojn, ke ĉio, kion li skribis estas oficiala, kaj ke enviciĝas mensogo apud mensogo.

La mortinto intertempe trankvile kaj gaje kuŝis en sia lignokesteto en la pumpila dometo kaj havis eĉ ne iomete da kompato kun tiuj, kiuj faris al si tiom da zorgoj kaj ĉagrenoj pro li.

Post tri semajnoj venis de la distrikta oficejo la reskripto, ke oni fotografu la mortinton, por ke eble poste ankoraŭ estu identigebla la persono. Sed antaŭ ĉio oni enterigu la viron, se tio ne jam okazis, kaj ja sur la komunuma tombejo.

Sed la entombigo ne okazis. La pastro decide rifuzis lasi resti la mortinton en la tombejo. Kaj la komunumestro venis en grandan dilemon. Li ne havis rimedon por devigi la pastron.

Tuj kiam li intencis argumenti laŭ la oficiala postulo de la distrikta oficejo, la pastro klarigis, ke li prefere sciigus la verajn faktojn al la distrikta oficejo ol koncedi entombigi la protestanton sur katolika tombejo.

Kiu elirvojo por la komunumestro restis? Fine li havis la ideon, lasi stari la mortinton en la pumpila dometo. Eble li esperis sekrete, ke la dometo iutage forbrulu aŭ ke fine la diablo kunprenu la kadavorn. Sed la instancoj ne lasis deskui sin. Oni postulis pliajn detalajn informojn pri la vestoj de la mortinto, pri la trovloko, pri la eventualaj enhavoj de la poŝoj kaj pri aliaj aferoj. Tiam oni

demandis, ĉu la mortinto estas entombigita, je kiu tago, kaj kiu estas la ekzakta nombro de la tombo. La komunumestro sinkis en pli kaj pli hontigan embarason. Plej volonte li estus demisiinta. Sed ankaŭ tio ne tiel simple eblus. Ĉar la posteulo ne estus transpreninta la respondecon. Tial li faris tion, kion oni ĉiam faras en tiaj kaj similaj cirkonstancoj, li tute ne respondis la demandojn, kiuj koncernis la entombigon. Ĉar ĉiam pasis kvarona jaro, antaŭ ol alvenis la sekvanta urĝa demandaro de lia distriktestro kaj intertempe ankaŭ nova distriktestro transprenis la oficon, la komunumestro esperis, ke li tiom longe povus eviti respondon al la distriktofacejo ĝis la morto lin fine liberigus de la mortinto, kiu tage kaj nokte hantis en ĉiuj anguloj kaj ĉeloj de lia cerbo kaj prenis de li ĉiun vivoĝojon.

Kiu konas la eklezian kaj ekstereklezian burokratismon, tiu diros, ke neniuj kaŭzoj ekzistas dubi pri tio, ke la afero tiel tre bone kaj je ĉies kontenteco estas plenumbla. Oni konas ekzemplojn el la historio, kiam jam multe pli komplikaj aferoj tiamaniere trovis solvon.

Sed en tiu kazo okazis alie; ĉar ĉe la eksplodo de la milito

oni enloĝigis en Kokinbosko kompanion de la anstataŭa bataliono el la plej proksima garnizono. Ĉar tiam la loĝlokoj en la civitanaj gastdomoj ne sufiĉis, oni ekuzis la pumpilan dometon kiel kompaniĉambron kaj gardejon. Ĉe la malplenigado oni trovis inter jarmilojn antikva fatraso ankaŭ delonge polvokovrita kesto, pri kies celo kaj enhavo neniu el la vilaĝanoj povis sciigi ion.

Oni alvokis la komunumestron.

„Kio tie enestas?“ demandis la kapitano.

La estro turnis sin unue dum certa tempo ĉirkaŭ sin mem kaj tiam diris fine: „Metiisto-junulo“.

„Kio enestas?“ demandis la kapitano kun prononcita tono.

„Mortinto, morta metiisto-junulo.“

„Ja kion faras tiu tie?“

La tuta turmento kaj anima timo, kiujn travivis la suferinta komunumestro en ĉiuj tiuj multaj jaroj pro la

mortinto, kaptis lin nun per tia forto, ke per unu fojo ĉio estis egala al li kaj li per pendumoto-humoro respondis: „Kion li faras tie? Nu, li atendas la Lastan Tagon, sinjoro kapitano.“

„Kaj kial li ne atendas kiel ĉiu honesta homo en laŭorda tombejo?“

„Ĉar li estas protestanto kaj nia pastro ne volas akcepti lin sur nia tombejo, kaj alian tombejon ni ne havas.“

„Suboficiro Vitrovir“, diris post tio la kapitano, „malfermu la keston!“

Kion cent tridek sep funtoj da aktoj en senfine longa tempo dum jaroj ne kapablis, do enterigi laŭorde mortan homon, tion plenumis intertempe la vermoj, la musoj, la naturo kaj la kara tempo. Kaj ili faris tion senafliktite pri la homaj malvastanimaj kvereloj kaj kun tia granda zorgemo kaj kun tioma devfervoro, ke oni trovis en la kesto nur monteton da rompiĝemaj kote grizaj ostoĵoj, zonobukon kaj tri perditajn pantalonbutonojn el plumbo. Vidalvide al tiuj tre malmultaj restaĵoj la komunumestro

povis ne kompreni, kiel eblis, ke li pro tio povis sonĝi iam pri gravaj prizonpunoj, kiuj atendos lin surtere, kaj pri kruelaj inferaj punoj, kiuj atendos lin en la alia mondo.

Kaj tiam la kapitano donis la ordonon: „Suboficiro Vitrovir, post tridek minutoj vi raportu al mi, ke la viro estas entombigita en la ĉi-tiea tombejo.“

Sed tuj kiam la suboficiro forestis, venis la pastro kaj diris: „Sinjoro kapitano, pardonu, sed nenial mi povas toleri, ke protestanto estos entombigita en nia tombejo.“

Al tio la kapitano respondis: „Kara sinjoro pastro mia, mi tute ne volas limigi viajn rajtojn aŭ iel ĝeni la religian pacon, kiel vi ŝajne supozas. Mi povus apogi min sur tio, ke mi estas ekde hieraŭ la plej alta komandopotenco en tiu ĉi loko kaj respondecas nur al mia militista superulo. Tio tre afliktus min, se mi devus agi kun pli da insisto. Sed mi pensas, ke ni rigardu la tutan aferon de pli alta vidpunkto. Ĉu la kompatinda ulo estas protestanta aŭ katolika, tiun etan diferencon li kun sia Dio certe delonge intertraktis kontentige. Vi povas fidi tion al mi, Li certe ne tiom longe kaj tiel pedante haltas ĉe tiaj aferoj, kiel ni

ĉi tie surtere. Li certe ankaŭ ne havas tiom da tempo por tio. Sed, mia kara pastro, vi ŝajne forgesas la plej gravan: ni nun troviĝas en milito, en la plej streĉa, kiun Germanio iam devis elbatali. Kaj kontraŭ tiu fakto, kiu ŝovas ĉion alian en la fonon, estas vere sufiĉe indiferente, ĉu iu estas protestanto ĉu katoliko. Nun estas la ĉefa afero, ke li estas germano. Kaj germano tiu kompatinda homo tie certe estas; pri tio dubo ne eblas, kaj tial estas lia nekoruptebla rajto, ke li rajtas ankaŭ kuŝi en germana tero. Kaj germana estas la tero sur la katolika tombejo same tiel bone kiel sur protestanta. Aŭ ĉu vi pensas alie?“

„Jes – sed – “

„Mi elektis ne sen intenco tiun al vi ŝajne iom duran vojon. Se eventuale okazos, ke viro de la kompanio mortos en tiu ĉi loko, kaj li estas hazarde protestanto, ĉar ni ĝis nun ankoraŭ ne havas protestantajn kaj katolikajn regimentojn kaj espereble neniam havos tiajn, tiam mi ne volos havi similan kverelon kun vi. Kaj kvankam mi mem estas katolika, mi devus fariĝi malagraba al vi, kaj tion ni ja volas eviti, ĉu ne? Lasu min diri al vi la sekvan, tiom longe, kiom estos milito, kamarado estas al mi pli

proksimaj ol katoliko. Post la milito vi ja pro mi denove povos fari, kion vi volas, kaj se plezurigos vin, ankaŭ elfosi la povran ulon tie. Tion vi faru laŭ via plaĉo. Nu, sed nun mi esperas, ke vi, kaj eĉ ankoraŭ poste, donos la permeson al la entombigo jam ordonita de mi.“

Jen la suboficiro revenis kaj raportis: „Ordono plenumite, la viro kuŝas tri metrojn sub la tera surfaco.“

Per tio la afero estis finita kaj plenumita. Ankaŭ por la komunumestro. Kaj tial li apartenas al la malmultaj homoj, kiuj en la eksplodo de la monda milito trovis certan konsolon.

tradukis la karapacanoj Dorothea & Hans-Georg Kaiser & Frank Vohla laŭ „Die Erzählung vom unbegrabenen Leichnam“ el „B.Traven: La frua verko“

Glosoj

Jozefo Malantaŭagro = Joseph Hinteracker

Kokinobosko = Hennenholz

Ŝmikel-vilaĝo = Schmickelsdorf

La vizito ĉe la verkisto Pguwlkshrij Rnfajbzxlquy

Subite li ĉeestis: la giganta verkisto kaj nova speciulo de l' arto, Pguwlkshrij Rnfajbzxlquy, tute subite kaj senatendite aperinte el sana haŭto, kiel ĉiu aŭtentika geniulo. Pri iu, kies evoluon oni povas montri, eble eĉ la konsekvenca celcertecon de multaj antaŭaj generacioj, lastfine eĉ la diligenton kaj sistemon de iu verkisto, tiu estas de la vera geniulo tiom malproksima kiel meduzo de la plej uzebla akompana hundo de sanitara soldato. Pruvo, kontraŭ kies renversiga forto kaj konvinkeco mi malsukcese batalus: kvarcent mil sepcent kvardek tri memorartikoloj de okmil ducent dudek ses literaturhistoriistoj, kiuj estis destinitaj de la sorto buĉi ĉiujn naskiĝ- mort- geedziĝ- kaj infanbaptajn datojn de la ŝirfoliaj kalendaroj; aldona pruvo: du impresplenaj artikoloj en la oficiala gazeto de Schnüpstrüll.

Ĉiukaze (oni ne postulu de mi, ke mi ĉiufoje ripetu tiun cerbodetruan nomon Pguwlkshrij Rnfajbzxlquy por timentoj min kaj por turmentoj la kompostisto) oni fariĝis unue atentema pri P.R. pere de mallonga kaj spite al tio

des pli enhavoriĉa novelo en la monata gazeto „La Hyppery“ konata al ĉiuj erudiciuloj kaj antaŭ ĉio konata al la eldonisto. Ĉu la titolo ekestis per tro ofta tuŝado kun la eco histerio, nu, tion alia homo esploru. Neniu komprenis la novelon de P.R. (Kial mi skribas nur P.R., mi jam menciis). Kaj ĉar neniu komprenis ĝin kaj ĉiu sana homo sian tutan kritikon metis en la kunmetitan vorton: Idiotaĵo, idiotaĵo!, tial trovis sin tri kaj kvarono el dekduo da ekspertoj, kiuj sinkis teren pro adorado de P.R. Ke tamen entute trovis sin ankoraŭ tri kaj kvarono de dekduo el tiuj 'ekspertoj kaj malkovruloj' pruvas pli kaj pli bone ol ĉiuj statistikoj, ke la milito nek detruas ĉion nek devigas ĉiun al lernado de novaj vidpunktoj. La sekvo de tiu ŝildolevo estis, ke la bonaj kaj plej bonaj gazetoj kaj ĵurnaloj sentis sin devigitaj publiki pro la multaj esprimitaj deziroj de la ĉiam longjaraj abonantoj iom post iom kaj kun kaj sen rezisto novelojn, skizojn kaj poemojn de P.R..

Oni povis malfermi gazeton kiun ajn, sed certe en ĝi estis io trovebla de P.R. Kaj ĉiu, ankaŭ la plej longjara abonanto, diris post ĉiu nova ĝuo de P.R. al si: Hm! Nun

mi vere ne scias, ĉu estas mi bovo aŭ ĉu la kritikisto
Difavor' Grumbloknabet' aŭ ĉu P.R. ruza fripono? Mi
komprenas eĉ ne unu vorton de li, mi supozas, ke tio estas
la plej granda kaĉo, kiu imageblas, sed kion mi ne
kuraĝas diri al iu. Aŭ, kaj tio tiukaze certe estas la plej
verŝajna: „Mi estas efektive giganta bovo, kion mi ĝis nun
ne sciis, ĉar mi estas tre diligenta komercisto.

P.R. estis diligenta kaj strebema. Oni prezentis teatraĵojn
de li, kiuj estis tiom impresaj, ke oni nun ankaŭ ne plu
komprenis la kritikistojn kaj havis pro tio duoblan
konfirmigon de la nun ne plu rifuzebla fakto, ke oni
nerevokeble devos resti bovo por ĉiam kaj ne plu
interesiĝu pri la modernaj literaturaj trezoroj.

Kaj krome svarmis romanoj, tragedioj, noveloj, skizoj,
pensfragmentoj kaj profunde sentataj milit- kaj
ampoemoj, tiel, ke oni nur plu povis miri pri la granda
kreiveco de la verkisto kaj spirita heroo, kiu tronis sur la
senatingebla alto de lia nealirebla soleco. En soleco li ja
efektive tronis. Neniam iu vidis lin, li ŝvebis kvazaŭ kiel
transfiguriĝinta spirito super la eraroj de la homoj; li
evitis la tuŝadon kun la obtuzigita amaso kaj la nimbo,

kiu vualis lin, suspektigis inojn kaj tiujn, kiuj estis novaj speciuloj de l' arto suferi je religia frenezo. Kelkaj el ili retroviĝis en psikiatraj klinikoj, kie ili ankoraŭ nun vivas kaj imagas esti pensa fajrero de P.R.. Restu translasate al pli kompetentaj medicinistoj doni popolecan kaj tamen efikoplenan kaj kompreneman prezenton, en kiaj strangaj formoj kaj prezentoj montriĝas la frenezaj imagoj de tiuj, kiuj imagas esti pensfajrero de P.R. Mia fantazio ne sufiĉus por tio, kiom ajn mi streĉus ĝin, ĝi postlamirus la realecon.

Iutage de iu iel disvastiĝis la onidiro, ke P.R. (kial mi nomas lin nur P.R., mi jam plurfoje menciis) estas malsana kaj kuŝas sur la mortolito, ke li havas nek protekton nek kuratecon, ĉar de liaj adorantoj neniu kuraĝas paŝi en la neniigan brilon de Lia Moŝto, kiu eĉ la sunon ŝanĝas en elsekigitan plumban bulon. Sed mi estas fortika, mi ne kredas pri P.R. Kaj tial lia brilo ne povos mortigi min. Tial oni elektis ĝuste min vojaĝi al P.R. por transdoni en ties mortohoro la salutojn kaj ovaciojn de lia adepta anaro, kiuj ruliĝas en la polvo antaŭ li, kaj stari en liaj lastaj horoj helpeme flanke de li kaj surskribi laŭvere

liajn lastajn vortojn kaj konservi ilin al estontecaj jarmiloj. Ĉar oni konis mian malrespekton rilate al P.R., oni sciis, ke neniu krom mi povus havigi tiom da objektiveco noti sen ornamo kaj sen vualo la lastajn elverŝojn de tiu giganta spirita grandulo.

Per nekomparebla spursento, per aventuremaj alivestigoj, senkulpigitaĵoj kiel spiono, per plurfoja ŝvebado en morto pro malsato, pro bezono de akvo, de sukero kaj dum la minaco de rekrutigo, sukcesis al mi trovi la adreson de P.R. Li loĝis en arbarriĉa regiono malproksime de la tumulto de la urboj, forbarita de la scivolo de l' vorema mondo post alta muro, ĉirkaŭata de malgrandaj, afable aspektantaj multnombraj ĝardenetoj kaj de hedero prikreskataj dometoj en la kliniko „Domo Ripozrok“.

Jam nur tiu nomo bonfartigis. Kaj mi havis mirakle strangan pacan senton en la proksimo de „Domo Ripozrok“. Mi demandis: „Bonvolu, ĉu ĉi tie loĝas la verkisto Pguwlkshrij Rnfajbzxlquy?“ „Jes“, oni respondis al mi afable, „sed fakte la paciento havas la nomon Paul Napofotelo.“

Mi montris kompateman vizaĝon, kiu en certaj momentoj, kiam oni aŭdas la vorton „paciento“ vere necesas, kaj mi diris: „Ĉu lia stato estas tre malbona?“

„Ne pli malbone ol kutime. Dum la kvin jaroj, kiujn li ĉeestas ĉi tie – ?“

„Kion?“ mi kriis ekscitite. „Kvin da – ?“

„ – jarojn, jes ja. Unue li estis en la tria klaso. Ĉar li estis ellerninta ŝufaristo, ni okupis lin lin en la ŝufarejo. Sed de tri jaroj li verkas por gazetoj kaj estas tiom bone pagata, ke li povas loĝi en propra domo kun du okupataj flegistoj kaj havas la samajn privilegiojn kiel grafo Hegelsdorff, kiu havas posedon de miliono da germanaj markoj. Estas ja tute indiferece al ni, per kio okupiĝas niaj pacientoj, se nur distras ilin.“

„Jes“, mi diris tute konfuzite. Mi ne komprenas tion.“

Tute malkaŝe koncedite, ankaŭ ni ne“, diris la ĉefa kuracisto, „jen modela ekzemplo pri tio, ke oni neniam povas esti certa pri tio, ĉu tie ekstere estas aŭ ne estas pli da frenezuloj ol ĉe ni.“

„Haltu! Haltu!“ mi kriis. „Diru al mi pro ĉio en la mondo, kie mi estas ĉi tie?“

„En la sanigejo por nekureceblaj mensmalsanuloj. Ĉu vi ne sciis tion?“

„Ne! Ne! Kaj sinjoro Pgschwklwsch... „ pro ekscitiĝo mi ne povis plu translipigi la nomon, kiu antaŭe estis tute intima al mi, “kaj sinjoro Pguw – ?“

„Sinjoro Napofotelo, vi volis diri, li estas de tri jaroj nesaniĝebla malsana kaj de tiam dum daŭro en nia kliniko. Tute sendanĝera homo, se oni lasas nur verki lin, sed komplete paralizita. Li troviĝas en la komenco de la lasta kvarono.“

Mi staris ankoraŭ kiel trafita de klabo, la brilo de P.R. forte trafis min.

Kaj la kuracisto aldonis: „ Kiel statas pri li, vi devus vidi ja sen pliaj klarigoj je liaj verkaĉoj; se vi aŭskultus paroli lin, vi ne plu dubus. Ĉu vi volas iri al li?“

Mi dankis rifuzante, foriris kaj revenis al la fideluloj.

Ili prefere ne estus fidintaj al mia objektiveco. Ili ne rajtas plu atendi ĝin, ĉar mi ne volas esti mortĵetita per ŝtonoj kaj poste antaŭĵetita al hundoj. Tiom P.R. kaj la tuta prudento de la ekstere vivantaj kunhomoj vere ne gravas por mi.

Ili ja mem kulpas tion, ke tiel estas.

tradukis la karapacanoj Dorothea & Hans-Georg Kaiser & Frank Vohla laŭ „„Mein Besuch beim Dichter Pguwlkshry Rnfajbzxlquy“ el „B.Traven: La frua verko“

Nebulo

De tempo al tempo, kiam li pensis pri nenio, suboficiro Karl Veek rememoris pri sonĝo, kiun li iam havis. Li povis nur pene rememori la detalojn de la rava sonĝo, en kiu li estis inĝeniero por surtera domkonstruado, kiu vivas plej komfortan vivon kaj loĝas en propra lukse ekipita vilao; kiu estas la edzo de linda kaj eleganta ino, kiu havas ĉarman filineton kaj vivas la ekziston de diligenta, pacema kaj eksterordinare bonfarta viro.

Estis sonĝo. Tiel rava eble tial, ĉar ĝi tiel neatingeble fora estis, ĉar en vero Karl Veek estis tiom longe, kiom li povas pensi, soldato, almenaŭ ekde sia tria vivjaro. Li ne povis rememori, ĉu li iam faris ion alian krom atendi la malamikon en la tranĉejo kun fusilo ĉemane. De tempo al tempo, obeante la ordonojn, kiujn oni ne kritikis, sturmi kontraŭ la malamiko kun bajoneto kaj kun cerbo tute plenumita per la penso, ke ĉiu homo renkontata de mi kaj vestata alie ol mi, kiu volas mortigi min, min nur tiukaze ne povas mortigi, se mi mortigas lin antaŭe, kaj ke ĉiu sono aŭ bruo, kiun mi aŭskultas, ĉu tondro, knalo, ĉu sablogrincado, foliara susurado aŭ retenita spirado kun la

plej granda probablo signifas mian morton!

Kun la fusilo sur la tranĉea balustrado antaŭ si li palpis por serĉi sian dorsopakaĵon. Li eltiris foton kaj leteron, kaj pensis, ke estas efektive strange, ke la foto iomete similas la inon, pri kiu li iam sonĝis, ke ŝi estas lia edzino. Kaj la ŝajne tiel nepersonne skribitaj vortoj en la letero, kiuj por si mem estis tute sen vivo, vekis en lia animo eĥon, kiu memoris lin pri la ruĝaj lipoj de la bela ino el la sonĝo. Sed la sonĝo estis tiel malproksima, kvazaŭ sonus mirindaj arĝentaj sonoriloj mallaŭte el la profundo de la tero.

„Suboficiro Veek!!

„Ĉi tie!“

Sonĝoj preteriras, nenion diras, sensencaĵo, pensis Veek. Kiel mi nur povas elpensi tiajn stultaĵojn

„Tuj iru al la majoro por raporto, suboficiro Veek. Soldato Ehmig transprenos vian postenon.“

„Laŭ via ordono, sinjoro leŭtenanto!“

La soldato anstataŭis lin. Li pendigis la fusilon sur la ŝultron, marŝkuris al la subtera ŝirmejo de la majoro por raportti.

„Suboficiro Veek, mi havas malfacilan taskon, kiu postulas inteligenton, multe da ĝi. Alian viron mi ne havas, kiun mi povus sendi, iun el miaj oficiroj mi ne povus rezigni. Do, komprenu, kiel grava estas la afero laŭ mi. De la alia flanko ili ne pafas jam dum du tagoj. Oni observis eĉ ne movadon ian. Tri ebloj estas konsiderindaj: aŭ la pozicio estas forlasita, aŭ tio estas kaptilo, aŭ ili intencas fari ion specialan. Ni devas eltrovi, pri kio temas. Elserĉu du virojn je via subteno. Ne kunprenu fusilojn. Nur tranĉilojn kaj revolverojn. Mi ne volas, ke iu el la alia flanko eksci, ke ni elsendis patrolon. Manĝu iom, kaj poste retiriĝu. Revenu, kiam eknoktiĝos. Ĉu vi komprenas?”

„Jes ja, sinjoro majoro!”

Estis ankoraŭ hela fura posttagmezo.

Sed kiam Veek jam du horojn forestis, lante sinkis densa,

peza nebulo larĝe sur la terenon.

Tiam la nebulo tiom densiĝis kiel blanka kalkomuro.

Nun, Veek jam eĉ ne plu povis ekvidi tion, kio distancas pli ol du paŝojn de li. Li postlasis la du aliajn kaj markis la returnvojon al ili per la kalkanumoj de siaj botoj .

Li rektiĝis kaj nun iris kvazaŭ palpante per etaj hezitemaj paŝoj la vojon tra la densa blanka muro, kiu paŝon antaŭ li servoprete malfermiĝis por tralasi lin kaj senpere malantaŭ li sin same tiel firme refermiĝis, kiel ĝi antaŭe ŝajne estis masonita. Por ne perdi la orientadon li elprenis sian kompason kaj komparis ĝin kun la malgranda maposkizo.

Relevinte la kapon, li vidis, en distanco de eĉ ne du paŝoj antaŭ si francan oficiron, kiu perceptis lian rigardon kaj tuj haltis. Nek ili sentis teruriĝon, nek estis timo rigardeblaj je iliaj okuloj, sed profunda mirego. Ambaŭ rigardis la alian, kvazaŭ ili vivis ĝis tiu momento solaj sur la planedo tero kaj vidus nun subite antaŭ si la unuan homon. Ambaŭ pensis samtempe ekvidante la uniformon

de la alia, ke ili nun devus plenumi certan difinitan agon, tute kutiman, ĉiutagan, certo, kiu regas ilin kvazaŭ kiel devigo, kiun ili ne povas eskapi kaj kiun ili ne rajtas eskapi. Sed ambaŭ ne sciis, kio tio estas, kion postulas tiun devigon de ili. Ŝajnis al ili kvazaŭ krias interna voĉo en ili: „Agu! Vi scias, kiel!“

Sed tiom proksime kaj tiom trankvile kaj tiom neatendite kaj tiom soleca sur senhoma insulo ili ja ambaŭ dum jaroj neniam renkontis alivestiton.

Ĉiu el ili sentis la spiradon de la alia kaj ĉiu el ili vidis eĉ la plej delikatan linion sur la vizaĝo de la alia.

Kaj tiumomente ili tre ekmiris kaj subite ili ne plu komprenis la okazaĵojn de l' mondo.

Kaj ambaŭ levis samtempe malrapide manon al la ĉapo, rigardis sin reciproke kaj faris alluditan, sed konscie ne misinterpreteblan riverencon al la alia.

Iliaj vizaĝoj estis ekstreme severaj.

Sed en iliaj okuloj troviĝis mejlojn profunda mallonga

demando, ,kiun homoj komprenas ĉiam.

Lante ili mallevis siajn manojn.

Ili intencis foriri.

Jen de la eterneco alsaltis la plej eta parto de sekundo, senuniformigis ilin; kaj intuicie ili etendis, obeante al la sama pli granda volo, samtempe brakon antaŭen por preni la salutmanon de la alia, poste ili brakumis sin reciproke, kiel faras tion amikoj, kiuj devas adiaŭi sin dum eterneco. Same rapide ili finis la salutan manprenon kaj poste ambaŭ iris sur la propra vojo reen.

Ja kion alian ĉiu el ili estu farinta, post kiam li ekkonis, ke antaŭ li staras homo?

Sed ili estis ambaŭ frapitaj per blindeco kaj ne plu vidis la malamikon.

El angla tradukis Rob Blow, lingve korektis laŭ la originalo „el“ B.Traven: La frua verko“, la karapacanoj Dorothea & Hans-Georg Kaiser & Frank Vohla

Pentroarto

Juna bone kreskinta knabino staras kun forte ruĝa bluzo, jupo mezlonga kaj draste griza, ŝtrumpoj en alludita bruno, blankaj ŝuoj kaj larĝa flava pajloĉapelo enmeze de vasta plej saturita verda herbejo. Ie zigzage leviĝas nigra arbo en la senkoloran aeron. Kaj tute fone oni ankoraŭ vidas en vapora nebula briltremo montaran arbaron bluan kun aludo de lilo.

Tiel la bildo aspektis, en kiun Evald Henkeding metis grandan esperon, kaj kiu tamen migris de unu ekspozia komisiono al alia sen esti akceptita. Kompreneble „la ekspoziciaj ŝufaristoj“, kiel Evald Henkeding pro sia malica maniero nomis la membrojn de la ekzamenkomisionoj, iras en vasta arko ĉirkaŭ la vojo de tia granda talento, kia estas li. Kaj se li vagadis tra la ekspoziciaj ĉambroj hantis lin fridega hororo, se li vidis tiujn tristajn faritaĵojn el kolormakuloj kaj ŝmiraĉoj. Kontraŭ tio lia „ruĝa-grizo- en- verdo“, kiel li nomis sian pentraĵon, estis majstroverko, pri kiu eĉ Rembrandt ne devus honti.

La ruĝgrizulinon, tie starantan en la verdo, mi konis hazarde kaj lernis pro ŝi konatiĝi iun posttagmezon ankaŭ al Evald Henkeding je. Li kompreneble tuj trenis min kun si en sian atelieron, kiu pli similis al malbone meblita ĉambro ol al ateliero, kaj li montris sian majstroverkon al mi. Eĉ se ĝi efektive ne estis eksterordinare grandioza, li tamen pravis en tiu rilato, ke vere troviĝis en la ekspozicio pentraĵoj, al kiuj lia estis multe supera je pensriĉo kaj tekniko. Ĉiukaze mi vidis ankaŭ je liaj aliaj bildoj, ke li kapablas pentri kaj havas multe da kuraĝo iri proprajn kaj originalajn vojojn.

Kiam ni tiam jam pli amikiĝis reciproke, mi bedaŭris lin, ĉar li spite al sia fervora strebado havis malmulte da sukceso, fakte nenium. Mi volonte iel helpus al li, sed antaŭe li devus almenaŭ unufoje ekspozicii ion. Ĉar, kie kaj kiel oni ekplektu la fadenon? Li meritis iom avanci el al fono. Kaj malgranda sukceso certe spronus lin aktive ekdiboĉi en la koloroj.

Iutage, iam en la unuaj posttagmezaj horoj, ni promenis foje denove en la ekspoziciaj haloj. Mi vidis kiel liaj okuloj melankolie kaj sopire pendis je ĉiuj kartonaj ŝildetoj, kiuj

pro „vendita“-rimarko faris al la aĉetisto plej ofte tiom da ĝojo kiom al la vendisto.

En tiu tempo preskaŭ neniuj vizitantoj ĉeestis, kaj la gardistoj ĉie faris sian digestan dormeton. En tiu momento venis tute freneza penso en mian kapon, kaj mi miris eĉ ne iomete, kiam Evald Henkeding aldonis al miaj pensoj siajn vortojn, ĉar li diris: „Mi supozas, ke oni povus kontrabandi bildon je tiu tempo tute senĝene.“

„Jes“, mi diris, „mi pensas, ke tio eblus. Sed kiun sencon tio havu?“

Je la sekva tago mi ne havis tempon. Sed en la postsekva tago petis min Evald Henkeding, ke mi estu tiel bona observi iom la gardiston en la apuda halo, kaj se li vekiĝus, mi tusu.

Do, kial tio koncernu min, kion Evald Henkeding volas fari? Mi observos la viron, kaj kiam li vekiĝos, mi ektusos. Tre simple. Ĉio alia ne interesas min. Tial mi ankoraŭ tute ne estas helpanto de helpanto, en la plej bona kazo senviva objekta ilo, je kiu iu priservas sin, kaj kio ne

povas esti responsigita por agado, ĉar ĝi ne scias ion pri ĝi.

Post certa tempo Evald Henkeding denove venis al mi, kaj petis min iri en la apudan halon. Tie mi nun vidas la surprizan donacon. Lia „ruĝa grizo- en- verde“ pendis bonfartige kaj ridetanta sur la vando. Ĉi tie inter la aliaj senemociigaj kaj enuaj pripentritaj oleaj tolpentraĵaĉoj, oni tuj rimarkis, kiel gaja estas lia „ruĝo-grizo“. Sufiĉe freŝige vivanta ĝi efikis en tiu ejo. Ĝi faris la saman bonfartigan esprimon kiel freŝ-cinika ŝerco , kiu krevas kun aŭdaca mortosalto senpere en rigide dormeman vesperan societon.

„Kiel vi enportis la bildon?“ mi demandis.

„Kompreneble kunruligite.“

„Sed la kadron?“

„Mi fiksigo la bildon sur la dorsoflanko de fremda kadro, kun kelkaj malvastaj lignolisteloj.“

„Jes, kaj la antaŭa bildo, ĉu vi ŝtelis ĝin?“

„Tion mi farus neniam.“

Kie ĝi do estas?“

„Ĝi estas sur la dorsoflanko. Mi turnis nur la dorsflankon de la kadro antaŭen. Hazarde tio funkciis.“

Mi levis iom la kadron kaj vidis efektive la malaperintan bildon sur la dorsoflanko.

„Sed la katalogo - ĉu?“ mi demandis.

„Ho, tio estas egala“, li respondis petole.

En tiu momento envenis la gardisto. Li iris leĝere movante la brakojn renkonte al ni. Mi jam ektimis kiel pagano. Sed Evald Henkeding rigardis eksperte sian bildon. Foje el la proksimo, foje el al malproksimo, jen li premfermis la okulojn, jen li rigardis tra sia pugno kiel tra teleskopo. Poste li rigardis ĝin helpe de sia poŝspegulo de la dorsoflanko, balancadis la kapon tien kaj ĉi tien kaj elbuŝigis ripetante: „Hm! Hm! Tse! Tse! La! La!“

La gardisto ekhaltis apud ili kaj starante diris tre bone

kompreneble: „Je-e-s, nu jes! Ni havas nun ĉi tie tre belajn pentraĵojn. Ekzemple tiu juna belulino ci tie, kun la belaspekta ruĝa bluzo estas mia plej preferata bildo. Frumatene, kiam mi alvenas, mi rigardas ĉiufoje la ravan bildon. La rava verda herbejo estas bele pentrita. Mi estas ja kamparano, tion vi devas scii kaj tial...”

Estas foje avantaĝe, se tia gardisto ne tiel bone scias la objektojn, kiujn li devas protekti. Kelkajn tagojn pli poste mi subite pensis, ke mi foje rigardu, kion lia bildo efektive esprimas. Mi do foliumas en broŝuro kaj trovas sub la numero 635, kiu koncernas lian bildon: „Max Klett; Ruĝa papavo“. Nu, pro tio mi ankoraŭfoje devas rigardi pli detale la bildon al mi. Mi iras en la halon kaj vidas tabuleton sub ĝi: „2-foje vendita“.

Tio povos fariĝi interesa.

Dume mi ankoraŭ staras antaŭ ĝi kaj pripensas kiel oni povas vendi originalan bildon dufoje, kaj kion enspezigos sume al Evald Henkeding koncerne la proceskostojn ks. , venas vizitantogrupogrupa en la halon, ĉirkaŭantan jam ne junan viron kiel kokidoj ĉirkaŭ la kovokokinon. La

sinjoro jam ne juna kondutas brue, memtruda kaj docenta. Mi baldaŭ ekscias, ke li estas artakademia katedra profesoro, kiu prelegas jen al artlernantoj, jen al aliaj interesiĝantoj pri artscienco pere de la ĉeestanta objekto. Kun nekopiebla senpasieco li „klarigas“ la ekpoziciatajn pentraĵon. Nun li proksimiĝas al la „Ruĝgrizo en verdo“ de Evald Henkeding. Li rigardas dum momento, sin rapide orientiĝante en la katalogon, post tio kaptas rapidan ampleksan vidaĵon de la pentraĵo kaj poste elfosas siajn saĝojn: „Ruĝa papavo“ la artisto nomas sian verkon. Vi jam divenas el la titolo, gesinjoroj, la pensoriĉon de la eminenta majstro. Sur la tuta bildo ne estas eĉ unu ruĝa papavofloro. Sed ĝuste t i o estas la genia, la elstara ĉe la bildo. La sola ruĝo estas la bluzo de la simpla junulina figuro. Kaj tiu forta ruĝo de la bluzo en kuneco kun la substrekita simpleco de la figuro devigas la idean mondon de la rigardanto memori pri la saturita plena koloro de la ruĝa papavo. Montriĝas ĉi tie nova, plentuta moderna artformo -“

Unu el la cirkaŭstarantoj prenis notblokon el la poŝo kaj komencis fervore skribi.

„Jen moderna, delonge atendita kaj ofte jam tuŝita direkto: esprimi en la arto ne t i o n, kion oni vidas, ĉar tio estus la primitiva, senartista, sed esprimi t i o n, kion oni, instigite pere de la bildo, povus vidi kaj devus vidi. Mi do resumas: „arto ne prezentu kun fotografa simileco faktojn, sed faru videbla neekzistantajn aferojn kun helpo de instigita intelekto.“

La ĉeestantoj rigardis entuziasme supren al la majstro kaj pro emocio apenaŭ kuraĝis spiri. La sinjoro kun la notbloko alsaltis servoprete rapide al la aliaj, prezentis sin kaj petis la sinjoron artprofeso pri ĉirilata artikolo por lia artgazeto.

Estas ja nun enomeno de nia tempo, ke la homoj kun sovaĝa avido ĵetiĝas sur ĉion strange apartecan, eĉ se estus kiom ajn freneza kaj grotaksa. Tial ĝi estas eĉ ne iomete miriga, ke „la ruĝa papavo“ jam transnokte troviĝis en la centro de la intereso kaj ke pro ĝi okazis la plej ardaĵ bataloj de la pro- kaj kontraŭpartioj. En la pli posta kaj tute normala irado de la okazaĵoj la afero kompreneble malkaŝiĝis, tio kompreneble signifas - por la ekspozicia komisiono. Pro kaŭzoj, kiuj lasas tre facile

klarigi sin helpe de la homa starpunkto, la komisiono decidis favore al Evald Henkeding, ĉe kio Max Klett, same helpe de la homa starpunkto facile klarigeble, kontentiĝis kun honeste mezurita konvena sumo. La parafo same tiel bone povis signifi Klett kiel ankaŭ Henkeding.

Sed tiel, kiel ĉio en la vivo iras tute logike kaj sinsekve, tiel Evald Henkeding en ĉiu ekspozicio estas plurfoje prezentata. Li estas la esenca prezentanto de tiu direkto, kiu severe atentis pri tio, ke la subskribo de bildo havas eĉ ne la plej etan komunecon kun la prezentata enhavo. Ke la Henkedingismo baldaŭ kaj por ĉiam tretos subpieden la polmomalsanan futurismon, tio estas – ekzistas ekzemploj – ekster ĉia dubo.

Fine la arto ja tamen ne estas kreita por la plebo, kiu tro pigras por pensi.

Kaj do...

tradukis la karapacanoj Dorothea & Hans-Georg Kaiser & Frank Vohla laŭ „Malkunst“ el „B.Traven: La frua verko“

Trompisto

Estis iam patrino.

Ŝi naskis filon kaj honeste edukis lin.

Kaj ŝi tre amis lin.

La knabo volis ludi kun siaj malgrandaj kamaradoj kaj petoli kiel siaj malgrandaj kamaradoj. Sed lia patrino, kiu timis pri lia sano kaj vivo, diris al li: „Filo mia, restu ĉe mi. Ne saltadu kaj ne petoladu, ĉar vi povus fali kaj lezi vin. Ne forgesu, ke vi ŝuldas eternan dankemon al via patrino, kiu donis la vivon al vi.“

Kaj la filo obeis ŝian ordonon kaj rigardis el la fenestro al la sovaĝaj ludoj de siaj amikoj.

Li fariĝis dekokjara kaj volis lerni profesion, kiu ege feliĉigas lin. Sed lia patrino diris: „Filo mia, gajnu monon antaŭ ĉio, por ke vi povu faciligi kaj plibeligi la vivon de via patrino, kiu donis al vi la vivon, kaj al kiu vi ŝuldas eternan dankemon.“

Kaj ŝia filo elektis profesion, kiu plenigis lin per abomeno, sed tuj enspezigis monon al li.

Dudek ok jarojn aĝa li renkontis belegan kaj ĉarman inon. Ili ege amis unu la alian, kaj ambaŭ ili sentis ardan sopiron posedi unu la alian. Sed la patrino diris: „Filo mia, vi ja jam havas min, ĉu ne? Ĉu mi ne sufiĉas al vi, ĉu vi nun forŝovas min pro fremdulino? Neniam forgesu, ke vi ŝuldas eternan dankemon al via patrino, kiu donis la vivon al vi.“

La junulinon oni trovis morta en arbaro kun apuda pistolo, kaj la filo falis en melankolion. Dek jarojn li profunde malĝojis en sia koro. En lia dekunua profesia jaro liaj kolegoj venis al li kaj proponis sian amikecon, ĝis ili fine prenis lian brakon kaj diris: „Kara amiko, la nacio bezonas junajn virojn. Ni ne senagante staru apude, dum aliaj ofertas kaj sian sangon kaj la animon, por protekti la plej karajn havaĵojn de la nacio. Estas malice kaj neviro ne preni partion en tumultaj tempoj. Antaŭen, kun agantaj manoj! Temas pri la libereco kaj la venko de l' lumo!“

Sed la patrino diris: „Filo mia, rememoru, ke mi estas via plej proksima homo. Kial koncernu vin la popolo? Kun doloroj mi naskis vin; sen mi vi ne estus veninta en la mondon. Do, al mi, kaj nur sole al mi vi ŝuldas eternan dankemon.“

Li fariĝis kvindek jarojn. Jen venis homoj kaj diris: „Aŭskultu! Vi estas unu el la plej fervoraj viroj en nia lando. Helpu al ni. Ni volas alporti veran civilizacion al fremdaj landoj kaj portos bonfartojn al niaj malriĉaj fratoj. Ni gardos ilin kontraŭ kruelaj malsanoj, la hororoj de la milito kaj maldigna sklaveco.“

Tiumomente liaj okuloj ekbrilis, lia korpo rektiĝis kaj liaj tendenoj fortikiĝis.

Sed la patrino diris: „Filo mia, mi oldiĝas. Restadu ĉe mi. Ne permesu, ke mi mortos inter fremdaj homoj. Ne forgesu, ke vi ŝuldas eternan dankemon al via patrino, kiu donis la vivon al vi.“

Lia hararo blankiĝis, li ekiris kliniĝinte kaj liaj paŝoj peziĝis. En gaja horo de feliĉa memfororgesemo oni naskis

lin. Dekok jarojn lia patrino nutris lin kaj sindoneme edukis lin. Ĉar ĝi estis speciala plezuro por ŝi vidi, kiel li kreskas kaj ĝoji pri li. Rekompencante li oferis al ŝi sesdek jarojn da rezignado kaj abstemo. Sed kiam ŝi jam kuŝiĝis por morti, ŝi prenis lian manon, tiris lin pli proksimen al si. Skuiĝate per morta hororo, ŝi diris: „Ho, amata filo mia, kial mi ne povas preni vin kun mi, por ke vi eble povu subteni min, se mi stumblos sur tiu morna kaj malfacila vojo? Kial ne? Ho ve, kial ne? Estis mi, kiu suferante dolorojn donis la vivon al vi, kaj tial vi ŝuldas al mi eternan dankemon. Neniam forgesu tion, filo mia, tiom longe, kiom vi vivos.“

Je la sama tago, kiam oni intencis entombigi ŝin, li kolapsis ĉe ŝia kadavro kaj post horo li mortis je koratako. En lia poŝo li portis flakonon kun cianida acido, por la kazo de bezono.

Unu apud la alian oni metis ilin en komunan tombon.

Inter ĉiuj ĉi patrinoj, kiuj akompanis ilin ĝis la lasta vojaĝo, kaj ili estis multaj, neniuj hezitus prezenti tiun „fidindan“ filon al siaj infanoj kiel nepre sekvindan

ekzemplon, kiun indas imiti – – –

Kiam instruisto eksciis la historion, li surskribis ĝin vorton post vorto kaj lokigis ĝin en elstara loko en la legolibron por la malaltaj kaj mezaj klasoj.

Patrino, filo, instruisto.

Tri meritaj homoj, el kiuj unu tute certe estis trompisto.

Aŭ ĉiuj tri.

Ĉar ili trompis la vivon pri la plej bona, kion ĝi prezentas. Kvankam ĉiu el ili agis perfekte morale, kaj ĉiu kiel eble plej fidele plenumis sian devon.

Pli fidele ol oni aprobe povus atendi.

tradukis Rob Blow el la angla versio, korektis Hans-Georg Kaiser laŭ la germana originalo „Betrüger“ el „B.Traven: La frua verko“

REDAKTOFINO

24.11.2016